


ISSN 0023-3692

KIAXTO

numero 215-216 (2006:5-6)

Tutmondigo: la longa vojo... kien?





Saluton! Ĉi-foje **KONTAKTO** estas duoble pli dika ol kutime: ni kunigis la kvinan kaj la sesan numeron en unu grandan kajeron, kiu temas samtempe pri du temoj: Tutmondigo kaj Amo. Tion ni faris pro tio, ke mia laboro en la Ruĝa Kruco lasas tre malmulte da tempo, kaj do ni devis rekapiti la aperritmon de la revuo. Sed espereble, ĝuste en tiu ĉi duobla numero vi trovos duoble pli da artikoloj, kiuj interesas vin!

Malfermas tiun ĉi numeron artikolo pri la mondvojaĝanto, kiu estas jam konata al multaj **KONTAKTO**-legantoj pro la artikolo en **KONTAKTO** 2005:6. Temas pri italo Marino Curnis, kiu komence de 2006 komencis sian eksterordinaran vojaĝon. Kompletigas la vojaĝan temon artikolo pri Pasporta Servo.

Verŝajne, pri tutmondigo ekzistas same multe da opinioj, kiom da homoj ekzistas. En tiu ĉi numero ni strebis prezenti kiel eble plej diversajn vidpunktojn kaj sintenojn rilate al tiu ĉi fenomeno, kiu vole-nevole tuŝas nin ĉiujn. Al la temo de tutmondigo kontribuis aŭtoroj el pli ol deko da landoj, kun tre diversaj (foje tre malsamaj, foje kompletigaj) opinioj pri tutmondigo kaj diversaj fenomenoj, ligitaj al ĝi.

Parolante pri tutmondigo, ne eblas ne menci ankaŭ multajn interesajn interretajn iniciatojn – ja dank’ al la interreto ni estas ligitaj al la tuta mondo, kaj eble ĝuste en la reto plej bone sentiĝas bonaj flankoj de la tutmondigo. En tiu ĉi numero ni parolas pri la nova projekto de TEJO – retpaĝaro **Kunlaboru**, pri vikioj kaj ankaŭ pri Projekto Gutenberg.

La dua duono de la revuo estas tre romantika: ja temas pri amo. Malfermas tiun parton artikolo pri eksterordinara virino el Hindio, kies nomo mem sonas preskaŭ kiel amo – Amma. Ŝi amas la tutan mondon, kaj la tuta mondo amas ŝin. Daŭrigas la temon artikolo pri alia eksterordinara homo, kiu malgraŭ sia handikapeco sukcesis trovi sian “duonon”.

La sekvaj du artikoloj estas eseoj verkita de Johan Valano (multaj malnovaj legantoj de **KONTAKTO** certe bone memoras tiun nomon!) kaj famega Claude Piron; tiuj ĉi eseoj majstre priskribas esencon de amo – kaj montras la vojon al ama feliĉo. Atendas vin ankaŭ interesa (por kelkaj, certe, kontraŭdira) opinio pri poligamio, enigma artikolo el Nepalo, de neordinaraj beletraj rakontoj kaj atentokapta vojaĝa rakonto el Afganio. Krome, ankaŭ ĉi-foje atendas vin amuzega komikso pri Rat-Man – kaj ŝatantoj de sudoko trovos sian enigmon ĉi-numere!

Agrablan legadon – kaj feliĉajn festojn!

Genja

P.S. Bv. ne forgesu rektizi por UEA/TEJO-membreco kaj/aŭ por abono de **KONTAKTO** en 2007 (vd. la novan kotiztabelon sur p. 31).

Kiel sendi kontribuojn al **KONTAKTO**?

- ✓ sendu prefere tekston originale verkitan en Esperanto aŭ foton/bildon memfaritan
- ✓ se vi sendas tradukon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Ĉe fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi
- ✓ **KONTAKTO** ne estas movada revuo, do *ne sendu al ĝi rimovadajn raportojn!*
- ✓ indiku, ĉu via artikolo jam aperis, aŭ estas proponata al alia revuo
- ✓ fotoj devas esti bonkvalitaj, ne gravas ĉu nigrablankaj, ĉu koloraj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ dikajn kovertojn prefere sendu registritaj.
- ✓ rete bv. sendi vian artikolon kiel kutiman retmesaĝon aŭ RTF (bv. uzi x-kodon por supersignaj literoj); bildojn – kiel JPEG (150-300 dpi)
- ✓ ilustraĵoj kaj adresoj en la interreto, kiuj rilatas al via temo, estas tre necesaj! **Koran antaŭdankon!**

KONTAKTO: Dumonata sociokultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA). **Fondita** en 1963. **N-ro** 215-216 (2006:5-6), 43-a jarkolekto. **ISSN** 0023-3692. **Legata** en ĉ. 90 landoj. **TTT-paĝo**: <<http://www.tejo.org/eldonoj.jsp>>. **Eldonanto** (administrado, abonoj, anoncoj): **UEA**: ✉ Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@inter.nl.net>. **Redakcio**: **KONTAKTO**, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>. **Redaktoro, grafikisto**: Eugenia Amis (Ukrainio/Usono). **Vic-redaktoroj**: Joel Amis (Usono) kaj Paŭlo Moĵajev (Ukrainio). **Ĉef-korektisto**: Paŭlo Moĵajev (Ukrainio). **Presado**: SKONPRES, Bydgoszcz (Pollando), ret-adreso: <skonpres@poczta.onet.pl>. **Konstantaj kunlaborantoj**: Joel Amis (Usono), Tatjana AUDERSKAJA (Ukrainio), Etsuo Miyoshi (Japanio), SALIKO, (Finnlando), Jefim ZAJDMAN (Ukrainio). **Faciltingvaj artikoloj** estas verkitaj en la niveloj tre *facila* kaj *facila*, laŭ la vortolisto de **KONTAKTO**. Tiu listo aperas kun la unua numero ĉiujare. **Anonctarifoj**: Tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizadoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajn de 30 %. Por anoncoj bv. kontakti UEA. **Anoncoj**: por *Anonctabulo* kostas tri internaciajn respondkuponojn por dek vortoj. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA. **Abontarifoj**: varias laŭlande. Petu informojn de UEA. **Malfortvidantoj**: povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise LAUWEN, Fort Alexanderstraat 16, NL-5241 XG Rosmalen, Nederlando. **KONTAKTO en radioj**: Regiono / tempo (UTC) / metroj / frekvencoj (kHz): *Radio Havano (Kubo)* Okcidenta kaj Norda Ameriko kaj Pacifika Azio/ 7:00/31/9 820; Tuta Ameriko kaj Karibio / 15:00, 23:30/25/11 760; Eŭropo Mediteranea/ 19:30, 22:00/21/13 715; <<http://216.138.240.229/rc4>> (je la 15a horo UTC), <http://roi.orf.at/esperanto/es_demand.html> (laŭ mendo tra la servilo de Austria Radio Internacia). *Pola Radio*: elsendoj: 13:30/41,23/7 275; ripetoj: 18:00/42.07/7 130; 20:00 kaj 9:30 sekvan tagon (nur per satelito). La satelita ricevo eblas per: Eutelsat II F – 6 – Hot Bird – 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. <<http://www.wrrn.org/ondemand/poland.html>>, <http://www.radio.com.pl/polina/esperanto_eo.asp>, <<http://start.at/retradio>>

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

<ENHAVO>

Itala Donkiĥoto en Krimeo (Jefim Zajdman, Ukrainio).....	3-4
Pasporta Servo servas al ĉiuj!	
(Bernhard Maüerer, Germanio)	4
Unu planedo – unu “lando”! La politikaj aspektoj de tutmondigo (Ronald J. Glossop, Usono)	5
Fenestro al la tutmondigo (Aneta Muhlemann, Svislando).....	6-7
Tutmondigo aŭ tutmondigo? (José Salguero, Hispanio)	7
Esperanto prezentita dum konferenco pri tutmondigo en Oslo (Douglas Draper, Britio/Norvegio)	7
Eklaboru! (Judith Meyer, Germanio).....	8
Vikioj – pli ol Vikipedio (Chuck Smith, Usono/Germanio)	8
Justa komerco en Afriko (Maarten Deprez, Belgio)	9
La Liberŝtata Projekto (Steve Cobb, Usono/Rusio)	10-11
Vendopovo (Ken Schoolland, Usono)	11-12
“Verda lingvo” por verda junularo (Indiano, Rusio; Igor Chýra, Slovakio)	13-14
Projekto Gutenberg (intervjuo kun Roberto Read, Usono).....	14-15
Por ŝatantoj de sudoko (Dmitrij Cibulevskij, Ukrainio)	15
Loka Agendo 21: surloka civitana agado (Manfred Westermayer, Germanio)	16-17
Anna Politkovskaja: Ŝia vivo estis batalado, ŝia morto – venko (Indiano, Rusio)	18
Mistero: vitro, kiu venas... el la kapo? (Navin Lal S’restha, Nepalo).....	18
La patrino, kiu oferas nur simplajn brakumadojn (Daniele Binaghi, Italio).....	19
Malgraŭ suferoj – ami! (Etsuo Miyoshi, Japanio).....	20-21
Arto ami: arto feliĉi (Johán Valano, Svislando)	21-22
La sinsekvaj ŝtupoj de amo (Claude Piron, Svislando).....	23-24
Poligamio? Kial ne?! (Manfred Westermayer, Germanio).....	25
Ribelo de artefaritaj floroj (Saliko, Finnlando)	26-27
El la taglibro (Dmitrij Cibulevskij, Ukrainio)	28-29
Recenze: Supernova (Paŭlo Moĵajev, Ukrainio)	30
Rat-man en Esperanto!	30
Amo, ĉu granda aŭ malgranda vorto? (Guillermo Bes Salazar, Kubo)	31
Informe.....	31
Mia lasta vojaĝo en Afganion (Saidnabi Saidilhomzoda, Taĝikio)	32

Fotoj sur la kovrilo: Fukuda Toshiro, Japanio (dum vizito al Afganio).

Temoj de **KONTAKTO** en 2007

2007:1. MITOJ. Limdato: 10-an de januaro.

2007:2. LIBERO. Limdato: 10-an de februaro.

La temoj de la sekvaj numeroj ankoraŭ ne estas deciditaj. Proponu *vian* temon! Ĉiuj viaj artikoloj, ideoj, konsiloj, rimarkoj estas pli ol bonvenegaj kaj tre bezonataj! Kontakti la redakcion laŭ la adreso: **KONTAKTO**, 16800 Phillips Rd. Alpharetta, GA 30004 Usono; ret-adreso: <kontakto@tejo.org>.

Itala Donkiĥoto en Krimeo



Marino Curnis

Jefim Zajdman, Ukrainio

Kiam oni demandas lin pri la celo de lia kvinjara mondvojaĝo, li respondas: “Por pruvi, ke veraj limoj inter popoloj estas ne politikaj, sed kulturaj. La unuajn eblas trairi, la kulturajn endas studi por interproksimigi la popolojn”. Ĝuste tial li elektis tiel malfacilan manieron de la kvinjara mondvojaĝo – la piediran. “Kiam oni paŝas, – klarigas li, – ĉiu preteriranto povas aliri, eĉ kuniri, konversacii, inviti gastoj al sia hejmo. Sekve aperas la eblo studi kulturojn de diversaj popoloj”.

Pri Marino Curnis, itala mondvojaĝanto, mi eksciis antaŭ komenco mem de lia vojaĝo (vidu *KONTAKTON* 210, 2005:6). Inter la lokoj, kiujn li planis preteriri, estis ankaŭ mia urbo Jalto, fama ripozcentro ĉe la Nigra Maro en Krimeo (Ukrainio). Tial mi tuj komencis agiti lin viziti la urbon kaj esti gasto de la ĉi-tiea junulara E-klubo “Tero”. Tuj kiam li transpaŝis la limon de Ukrainio, mi ekkontaktis lin rete. Rezulte, kiam li atingis Krimeon, en ĉiu loko, kie li planis noktumi, lin gastigis esperantistoj aŭ iliaj familianoj.

La paŝado komenciĝis laŭlonge de la okcidenta marbordo de Krimeo. Mi sciis, ke de Eŭpatorio li paŝos suden al Sebastopolo kaj preteriros lokon, kie ĉiusomere okazas populara barda tendaro. Tiel naskiĝis la ideo organizi viziton de esperantistoj al la tendaro propagandcele kaj uzi por tio ankaŭ Marino-n. Li sciigis nin per poŝtelefono, ke li estas kun “bagaĝo sur radoj”. Veninte la rendevuan lokon ĉe marbordo, ni vane serĉis homon kun valizo sur

radetoj. Helpis iu knabo, kiu vidis lin ĉe ŝoseo kaj alkondukis nin tien. Tiam mi komprenis, kial mi ne povis trovi lin. La багаĝo similis al ĉareto sur unu granda rado, kiun Marino tiras kiel rikiŝisto. Krome, “ĉe-mare” por li signifis proksiman ŝoseon, kie li povis paŝi ne sur la sablo. Mi aliris kaj demandis ruse, ĉu li scias, kie estas barda tendaro. Li respondis ruse, ke li mem delonge serĉas ĝin. Post tio mi diris Esperante “ankaŭ ni” kaj ni ambaŭ ridis. Tiel ni konatiĝis.

Pri la ĉareto necesas rakonti aparte, ĉar ĝi aspektis tre impone kaj altiris rigardojn de scivolemaj preterpaŝantoj. Ĝi pezas kun la багаĝo ĉ. 30 kg kaj surhavas sunbaterion por ŝargi la poŝtelefonon. La ĉareto estas sponsorajo de iu usona firmao, kiu volis elprovi ĝian staton dum longa vojo. Sed la ĉareto rompiĝis jam en Italio, kaj necesis ŝanĝi aluminian tubon, sen kiu ĝi estus senutila. En Ukrainio Marino ŝanĝis ĝin denove je pli fortika fera tubo.

Malfruvespere en la tendaro oni donis al ni la eblon prezenti nin ĉe la lignofajro, ĉirkaŭ kiu sidis ne malpli ol 200 homoj. La grupo estis 10-persona, kaj krom la krimeanoj kaj kievanoj ĉeestis siberianino. Marino venis kun la ĉareto. Post rakonto pri Esperanto kaj plenumo de kelkaj Esperantaj kantoj oni superŝutis Marino-n per demandoj. La junulinoj, certe, interesiĝis, ĉu li havas edzinon. Post la nea respondo venis, kompreneble, la alia demando – ĉu li havas fianĉinon. La jesa respondo mirigis ĉiujn: ĉu ŝi atendas lin dum kvin jaroj? “Jes, – respondis li firme, – kaj krome ŝi alflugos ĉiun trian monaton”. Virino el Italio, leginte pri Marino, skribis al li, kiam li piediris Hungarion, petante la permeson kuniri dum du semajnoj en Rumanio. Marino konsentis, kaj baldaŭ komprenis, ke ŝi estas lia sorto. Mi ofte vidis lin verkanta poeziaĵojn en la itala por ŝi.

La fina demando de la publiko



Marino estas adepto de humana tutmondiĝo



Kun jaltaj esperantistoj, antaŭ la foriro al Turkio



Ĉe la Nigra Maro



estis por mi surpriza: “Kial la tradukisto ne uzas Esperanton”? Mi ege miris, ĉar mi opiniis, ke ĉiuj komprenas, ke ni parolas ja en Esperanto, ne en la itala.

Post dutaga estado en la tendaro ni disveturis al niaj loĝlokoj, sed Marino ekpaŝis al Sebastopolo, kaj post du tagoj li jam venis en Jalton. Ĉi tie li komence gastis ĉe mi kaj poste translokiĝis en la

apudan loĝ-lokon Miŝor, por ekverki en izoleco la unuajn ses ĉapitrojn (laŭ la nombro de la landoj, kiujn li jam vizitis) de la estonta libro.

Marino estas tre modesta, neparolema homo. Respondante al demandoj, li ridetas kaj kvazaŭ pardonpetas. Lia ŝatata heroo estas Donkiĥoto. Li eĉ similas tiun vizaĝe: la samaj lipharoj kaj barbeto. Li parolas kelkajn lingvojn. La rusan li bone komprenas kaj, se necesas, li povas klarigi, kion li volas.

Ni plene uzis lian estadon en Jalto por propagandi la Lingvon: ni organizis renkontiĝon kun li en angla lernejo kaj du televid-intervjuojn; en kvar ĵurnaloj aperis artikoloj kun elokventaj titoloj: “De Romo piede ĝis Krimeo”, “Piede dum kvin jaroj de Italio al Japanio kaj reen” kaj “Italan vojaĝanton oni prirabis en Kievo kaj ne enlasis Rusion”. La afero estas, ke

li devis veturi en Kievo por pripagi en doganejo la komputilon, senditan el Italio remburse, kaj por ricevi viziojn al Rusio kaj Kartvelio. En la doganejo li devis pagi 500 eŭrojn, sed sekvatage en metroo oni ŝtelis 150 eŭrojn kaj, kio pli gravas – la pasporton. La ordeno, kiun li ricevis de la itala prezidento komence de la vojaĝo, helpis plirapidigi la ricevon de la nova pasporto en la itala ambasadejo, sed ankaŭ iom kostis. Lin konsolis nur la 10-taga vizito de la fianĉino al Kievo.

Kompense, li ĝuis la estadon en Krimeo, kie li aktive pasigis pli ol monaton. Speciale por li ni organizis kelktagan turistan marŝon laŭlonge de la orienta marbordo de Krimeo. Vespere, tagon antaŭ lia forveturo, multaj klubanoj kolektiĝis por adiaŭi lin, kaj sekvamaten kelkaj eĉ piediris, akompanante lin ĝis la eksterurba haveno.

Pasporta Servo SERVAS AL ĈIUJ!

Bernhard Maŭrer, Germanio
<Bernardo@EsperantoLand.de>

Kiam mi en la jaro 1976 unuafoje aŭdis pri la Pasporta Servo, mi tuj entuziasmiĝis kaj tuj aĉetis la aktualan adreslibron. Tiam la libro havis nur 20 paĝojn kaj konsistis fakte el kopiitaj folioj, kunmetitaj kiel libreto. De tempo al tempo mi uzis la servon, plejparte ene de Germanio. Mia posedo de Esperanto estis tiam tre malbona. Nu, mi konis la vorton “Saluton”, la bazojn de Esperanto kaj mi posedis du vortarojn – tio estis tre grava por mi tiam! Ene de Germanio mi ja krokodilis kaj se mi foje estis eksterlande, mi klopodis interparoli pere de miaj vortaroj.

En la jaro 1991 mi ekhavis pli grandan loĝejon (kun du ĉambroj anstataŭ unu) kaj mi decidis fariĝi gastiganto. Mi faris tion, ĉar mi volis iom kontribui al tiu bona projekto, sed mi neniam kredis, ke iu vere venos al mi. Eraro! Tre baldaŭ mi akceptis la unuajn gastojn. Mi ricevis invitojn al reciprokaj vizitoj, mi ricevis leterojn, kiujn mi volis respondi kaj tiel

plu. Dank’ al tio mi lernis paroli en Esperanto flue, ĉar mi ja konstante devis okupiĝi pri Esperanto.

Do mi konstatis, ke Pasporta Servo servas al ĉiuj:

1. **Al la gastiganto**, ĉar li/ŝi ricevas interesajn gastojn kaj se la gastiganto ankoraŭ estas komencanto, la gastigado estas la plej bona maniero plibonigi la scion de Esperanto!

2. **Al la gasto**, ĉar li ne devas iri en multekostan hotelon, kie li eble neniun komprenas kaj ne povas kompreniĝi.

3. **Al la loka Esperanto-grupo**, ĉar la gastoj ofte vizitas la kunvenojn, se hazarde io okazas en la sama tago, kiam la gasto estas en la urbo. Do tio ja certe vivigas la Esperanto-vivon.

4. **Al Esperanto**, ĉar se la gastiganto konstante prezentas al siaj amikoj (kolegoj, najbaroj, ktp.) interesajn gastojn, iu el ili verŝajne ekvolos lerni Esperanton, ĉar ankaŭ ili deziros esti kapablaj interparoli kun la estontaj gastoj.

Laŭ miaj observoj, antaŭe oni lernis Esperanton plejparte por

plibonigi la mondon. Hodiaŭ pro la samaj motivoj la lingvon lernas ne multaj. Hodiaŭ oni lernas Esperanton, ĉar oni

- volonte lernas lingvojn kaj scivolas pri Esperanto;

- volonte akceptas la avantaĝojn, kiujn Esperanto kaj la Esperanto-movado donas.

Mi kredas, ke la dua grupo estas pli granda, kaj ke Pasporta Servo prezentas unu el tiaj gravaj avantaĝoj de Esperanto.

Jes, hodiaŭ la adreslibro de Pasporta Servo ne plu havas 20 paĝojn, la eldono de 2006 havas 187 paĝojn, kaj prezentas al la posedanto 1320 adresojn el 92 landoj. Do, vi povas vidi, ke tiu projekto ege kreskis.

Kaj mi estas konvinkita, ke la projekto Pasporta Servo povus kreski eĉ pli, se pli da esperantistoj vidus la gravecon de la projekto. Ekzistas ankoraŭ multe da esperantistoj, kiuj ofte akceptas gastojn, sed ne volas iĝi gastigantoj en Pasporta Servo. Mi persone tion ne komprenas, sed eble pri tio kulpas iuj miskomprenoj? Eble tiaj homoj pensas, ekzemple, ke ili devos akceptadi ĉiujn dezirantojn. Sed ja ne, PS ne funkcias tiel. La gastoj devas peti la konfirmon pri la akcepto, kaj la gastiganto povas rifuzi al eventuala gasto, se estas iu kaŭzo por tio (ekzemple, se en tiu tempo la gastiganto ne estas hejme).

Mi tre petas vin, kara legan-

to, se vi povas akcepti gasto(j)n en via loĝejo aŭ domo, bonvolu aliĝi al la Pasporta Servo kiel gastiganto. Vi ne nur ricevos interesajn gastojn laŭ viaj propraj kondiĉoj, sed vi ankaŭ rajtos senpage* ricevi la adreslibron kaj senpage uzi la servon.

Vi povas aliĝi kiel gastiganto rete, se vi vizitos la hejmpaĝon de Pasporta Servo ĉe <http://www.tejo.org/ps/ps_lingv/ps_eo.htm>. Vi povas aliĝi ankaŭ papere, se vi skribos poŝte al la administranto de PS: Derk Ederveen, Westenburgstraat 15, NL-2275 XR Voorburg.

Miajn personajn spertojn pri la Pasporta Servo vi povas legi en la Esperanto-parto de mia hejmpaĝo ĉe <<http://www.fen-net.de/~ea1448>>.

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas la landa organizanto de PS en Germanio.

* kvankam la gastigantoj de PS rajtas je senpaga ekzemplero de la libro, se vi havas la eblon pagi por la libro, tamen estas preferinde pagi. PS ne enspezas monon per vendado de la adreslibroj, sed ĝi ja bezonas monon por pagi la koston de presado kaj dissendado – Red.

Unu planedo – unu “lando”!

La politikaj aspektoj de tutmondiĝo

Ronald J. Glossop, Usono

La aspekto de tutmondiĝo, kiu multe interesas min, estas ĝia rilato al politikaj aferoj. Efektive, estas stranga afero al mi, ke oni povas multon legi pri la ekonomiaj kaj kulturaj aspektoj de tutmondiĝo, sed ne multe pri la politikaj aspektoj. Mi opinias, ke ĉi tie ekzistas tre gravaj demandoj. Kiel la tutmondiĝo influas kaj landajn registarojn kaj internaciajn organizojn kiel la Unuiĝintaj Nacioj kaj la Monda Organizo pri Komerco? Kiel la tutmondiĝo influas la internaciajn neregistarajn organizojn? Kio devus okazi rilate al la monda politika situacio?

Iom da historio

Dum la 16-19-a jarcentoj post Kristo en Eŭropo la nacio-ŝtatoj iĝis la ĉefaj politikaj strukturoj. La Tridekjara Milito, kiu finiĝis per la Traktato de Vestfalio (1648), estas ofte konsiderata kiel la komenco de la moderna nacio-ŝtata sistemo. Tiu milito komenciĝis kiel religia milito, sed finiĝis kiel milito, en kiu kelkaj reĝlandoj batalis kontraŭ aliaj reĝlandoj. En la 18-a jarcento evoluis aparta sento de naciismo, tiel ke en la usona kaj la franca revolucioj soldatoj batalis ne por sia reĝo, sed por sia lando.

Dum la 19-a jarcento evoluis nova tendenco krei *internaciajn* organizaĵojn por trakti problemojn, kiuj transiris landlimojn. Oni establis plurajn internaciajn organizaĵojn: neregistarajn, kiel la Internacian Ruĝan Krucon (1864), kaj registarajn, kiel la Internacian Telegrafan Union (1865), la Internacian Meteorologian Organizaĵon (1873), kaj la Ĝeneralan Poŝtan Union (1874). Kiel scias ĉiuj esperantistoj, ĝuste dum ĉi tiu periodo Doktoro Zamenhof eldonis sian libron, kiu prezentis “la internacian lingvon” al la mondo.

Dum la 20-a jarcento ĉi tiu internaciismo havis ĉiam pli da influo. Post la Unua Mondmilito oni starigis la Ligon de Nacioj, la

unuan ĝeneralan internacian organizaĵon. Post la Dua Mondmilito oni kreis la Unuiĝintajn Naciojn kaj ankaŭ multajn aliajn novajn internaciajn organizaĵojn, registarajn kaj ne-registarajn. Pro novaj aferoj, kiel internaciaj radiaj kaj televidaj elsendoj, rapida long-distanca vojaĝado per reakciaj aviadiloj, sen-landimaj fotoj de la Tero, faritaj el kosmo, kaj la evoluo de interreto, la graveco de la landlimoj iom post iom malaperas. Anstataŭe, iom post iom venas la epoko de tutmondiĝo.

La nuntempo

Ni nun spertas gravan transiron en nia vivmaniero: de la *internaciismo* de la 19-a kaj 20-a jarcentoj al la *terglobismo* de la 21-a jarcento. Ĉu oni rigardas al komerco, komunikado, sportoj, distrado, kulturo, turismo aŭ iu ajn alia kampo, oni povas vidi, ke ni komencas vivi en tergloba komunumo, kie la landlimoj ne plu estas tiel gravaj. Ni moviĝas preter internaciismo, en kiu la landaj registaroj ĉiam estas perantoj inter la homoj de diversaj landoj. Pro la novaj iloj de komunikado kaj transporto, nun evoluas nova speco de la mondo, kie individuaj homoj de malproksimaj lokoj interagas rekte unu kun la alia. Ni esperantistoj estas aparte bonŝancaj, ĉar ni havas komunan lingvon por uzo en tia tutmonda komunumo.

Do, kio okazas kaj *devus* okazi rilate al niaj politikaj instancoj? Iom post iom la

influo de la UN kreskas, malgraŭ la malkooperaj agadoj de la nuntempa registaro de Usono. La influo de diversaj internaciaj organizoj (registaraj kaj neregistaraj) multe kreskas, aparte rilate la liveradon de bezonataj materialoj al viktimoj kaj la protektadon de homaj rajtoj. Eĉ plu aperas novaj gravaj instancoj, kiel la Internacia Marfunda Aŭtoritato, la Internacia Tribunalo por la Juro de la Maroj, kaj la Internacia Krimtribunalo (denove malgraŭ la agadoj de la nuntempa registaro de Usono).

Tamen ankoraŭ mankas sufiĉe da mono por trakti gravajn grandajn terglobajn problemojn. Ni bezonas novajn metodojn por akiri pli da mono por subteni tian laboron. Kvankam la Unuiĝintaj Nacioj povas iom helpi, ĝi ne estas vera registaro. Ĝi ne povas kolekti impostojn, kaj ĝi ne povas fari leĝojn. Ĝi estas nur organizo *de* la landaj registaroj, *fare de* la landaj registaroj, kaj *por* la landaj registaroj. La landaj reprezentantoj ĉe la UN celas antaŭenigi la nacian intereson de siaj nacio-ŝtatoj, ne la bonfarton de la tutmonda komunumo. Aliflanke, multaj neregistaraj organizoj celas la bonfarton de ĉiuj homoj, sed ili devas dependi de necertaj, ofte tre malgrandaj, kontribuoj de ne-registaraj fondusoj kaj malmultaj individuoj.

Kio por futuro?

Nia situacio postulas pli bonan sistemon. Nia tergloba

komunumo devas havi *tergloban* politikan organizaĵon, *tutmondan* registaron. Ni bezonas *demokratian mondan federacion*, kiu pritraktos la problemojn de la tutmonda komunumo. La landaj registaroj ankoraŭ povus ekzisti, sed ili enfokusigos sian atenton al tiuj problemoj, kiuj ekzistas interne de la landaj komunumoj. Nur tia federacia sistemo povus limigi la influon de kelkaj potencaj landaj registaroj (kiel Usono), kiuj povas superregi la nuntempan internacian sistemon, inkluzive de la UN kaj aliaj internaciaj organizaĵoj.

Kial ĝis nun ni ne havas tian tergloban registaron? Ĉar la konscio pri la nova tutmondiĝo ankoraŭ ne estas sufiĉe forta por instigi homojn forĵeti la arkaikan ideon pri la nacia suvereneco. Ĝis nun la nova tutmondismo ne povas subigi la tradician naciismon. La sinteno de multaj homoj restas: ni estas pretaj elspezi multe da mono por naciaj militistaj aferoj, sed ne por dividi iom da nia abundo kun aliuloj, kiuj ne loĝas en nia lando kaj kiuj estas “malsamaj specoj de homoj”. Aliflanke, multaj homoj simple ne konstatas, kiel gravaj estas la politikaj aferoj. Ili ne volas “malpurigi la manojn” en politiko, ili ne komprenas, ke multaj problemoj de nia tergloba komunumo plu restas nesolvitaj pro manko de fortaj tutmondaj instancoj, inkluzive de demokratia tutmonda registaro.

Estas vero, ke niaj *landaj komunumoj* bezonas demokrati-ajn registarojn, kiuj laboros por la bonfarto de ĉiuj civitanoj *en la lando*. La tutmondiĝo devas montri al ni, ke *nia tutmonda komunumo* same bezonas demokratian registaron, kiu laboros por la bonfarto de ĉiuj homoj *sur la tuta Tero*.

La aŭtoro de la artikolo estas emerita profesoro de filozofio (Sud-Iliinojsa Universitato ĉe Edŭardsvilo), prezidanto de Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto kaj direktoro de la organizaĵo Infanoj ĉirkaŭ la Mondo <www.icxlm.org>.



Ĉe la UN-oficejo



Fenestro al tutmondiĝo

Aneta Muhlemann, Svislando

Oni daŭre parolas pri tutmondiĝo. Ĝi aperis kiel giganto sen koro kaj animo, kies sola zorgo estas forvori senkom-pate la identecon de kulturo kaj samtempe elimini la plej malfortajn individuojn. Nu, kia estas la situacio envere?

Tutmondiĝo – ĉu nur ekonomia procezo?

La nocio mem pri tutmondiĝo unufoje aperis antaŭ duonjarcento. Jam dekomence ĝi rilatis unuavice ekonomion, kiu ĝis nun tenas la torĉon de tutmondiĝo. La mobileco, kiun sekvigas tutmondiĝo, ebligas optimumigi la investojn. Kompreneble, tutmondiĝo donas konsiderindajn avantaĝojn ne nur al mon-cirkulado, sed ĝis nun multaj demandoj restas flankenŝovitaj pro troa atento al ekonomio.

Unue, necesas pritrakti kun ĉiuj intereso-taj ĉirkaŭ la internacia ronda tablo la problemojn pri la medio (ekologio, poluado ktp.). Jam urĝe necesas fari bonajn kaj ĝustajn decidojn rilate klimaton, ozon-tavolon kaj naturajn riĉaĵojn (unuavice – akvon, kiu jam nun estas malfacile akirebla por 1,5 miliardoj da individuoj).

Due, aldoniĝas la sociaj demandoj. Temas pri reguligo de la malekvilibroj kaŭzitaj de la homaro (politikaj tensioj, militoj, ekscesaj migradoj ktp.). Ĉiu unuopulo devus rajti libere moviĝi, elekti lokon por loĝi, vivi, labori. Ĉu ne paradok-sas, ke havaĵoj, kapitaloj kaj informoj libere vagas, dum homoj ne posedas tiun liberon? Necesas ankaŭ redukti malriĉecon kaj malsaton en la mondo.

La tria gravega temo estas la savo de

kulturo. Necesas lukti kontraŭ malriĉiĝo kaj unuformiĝo. Interne de la spiralo de tutmondiĝo la ŝoko, kaŭzita de interkul-turaj miskomprenoj, ŝajnas neevitebla. Tial necesas veni al universala konsento pri certaj etikaj valoroj kaj reguloj. Temas pri homaj rajtoj, etika kodo k.s. Atentindas ankaŭ la fakto, ke certaj limoj, altruditaj de etikaj konsideroj, estas ofte forpuŝataj de ekonomia logiko, kio tute ne ĉiam estas bona.

Nia mondo ne vendendas

Bedaŭrinde, la vojo, kiun nun iras tut-mon-diĝo, ne akcentas tiujn punktojn. Eĉ male – per sia koncentriĝo al nura ekonomio ĝi prezentas gravajn danĝerojn kontraŭ la homa sekureco kaj kontraŭ la daŭra evoluo. Komercestoj (ankaŭ la estroj de la Monda Organizaĵo pri Komerco – MOK) interesiĝas unuavice pri rapidaj profitoj, ne pri la daŭra evoluo; dum al aliaj internaciaj organizaĵoj (ekz., pri sano, laboro aŭ edukado) ofte mankas bona internacia kunlaboro. Malgraŭ tio, ke la MOK-respondeculoj senlace ripetas, ke profito kaj konkurenco kaŭzas ekono-mian kreskadon favore al la tuta loĝan-taro, sufiĉas eĉ suprajaj observoj por kon-stati, ke la meza klaso en la tuta mondo tendencas malaperi, ke la abismo inter riĉuloj kaj malriĉuloj plu kreskas.

La trofavorigo de la ekonomio minacas per universaligo de la plej sukcesaj ekonomioj – unuavice de la usona, kio kaŭzos (kaj kaŭzas jam nun) univer-saligon de la usona politika sistemo kaj de la usona lingvo, kiu en la internacia komunikado transformiĝas plejparte en degenerintan, preskaŭ brutalan anglaĉan lingvon, kiu ofte neniel sukcesas solvi la problemon de komunikado pro sia

neklareco kaj plursenceco.

Pro superregado de la angla aperas alia maltrankviliga demando: ĉu la homaro iras al unuformeco? Ja interproksimiĝo de la kulturoj pro tutmondiĝo plifaciligas la intermiksiĝon, kio malgrandigas la diver-secon. Al tio aldoniĝas la “kutimo” vivi laŭ la usona maniero. Ajnokaze, unuformiĝo de moroj kaj kulturoj ne ŝaj-nas ĝojiga.

Por alia mondo

Alimondistoj volas alternativon al la ludreguloj de la komerca mondo. Ili batas la alarman sonorilon por averti pri la danĝeroj de tro rapida tutmondiĝo. Laŭ ilia konstato, nun la planedo kaj ties indi-viduoj estas konsiderataj nur kiel varo. Ankoraŭ pli maltrankvilige estas, ke la tutmondiĝo rekte dependas de neniu – nek ŝtata, nek superŝtata – strukturo. Konsiderante tion indas demandi sin, kiu vere tenas la povon.

La alimondistoj certas, ke eblas ankoraŭ postuli ŝanĝojn por la bono de la homaro kaj indas lukti por ili. Tamen, estas naive ataki tutmondiĝon kaj postuli ĝian haltigon. Estas efektive tute logike, ke la disvolviĝo okazu en la monda skalo. Televido, vojaĝoj kaj interreto ĉiukaze jam konsciigis nin, ke la mondo vastas, kaj ke niatempo ne plu eblas vivi sur izolita insu-lo. Tutmondiĝo estas fakto. Ĝi tuŝas ĉiun el ni, ĉar ni partoprenas la estontecon de la homaro. Venis la momento forlasi la deba-tojn “por aŭ kontraŭ”. Ni strebu eltiri ĉion plej bonan el tutmondiĝo, kunlaborante internacie laŭ la konsilo de Kofi Annan: “La problemo estas ne decidi, ĉu ni volas tutmondiĝon aŭ ne, sed scii, kian formon ni donu al ĝi. Nia celo devas esti transfor-mi ĝin al malfermita kaj justa procezo”.

La diverseco kiel garantianto de sukcesa tutmondiĝo

Por eltrovi la sekvendan vojon oni povus sekvi la valoran ekzemplon, donitan de la patrino Naturo. Jam de jarmilionoj la naturo disvolviĝas dinamike kaj produktas neimageblan kvanton de riĉaĵoj sen misuzi infanojn, sen adjudikoj kaj eĉ sen alistrukturado de entreprenoj. Kio estas la sekreto? Ekvilibro bazita sur diverseco. Necesas pensi kaj plani tutmonde, sed efike agi loke sen malhelpi la ĝeneralan ekvilibron. Tiu proceso helpas ankaŭ pretigi la rektan kontakton inter makroekonomio kaj homa ĉiutageco. Por atingi tion necesas sekvi plurajn principojn, el kiuj menciendas toleremo, respondeco kaj antaŭvido. Pro

neevitebla apero de internaciskala toleremo, la ŝtatoj kiel politikaj strukturoj riskas trafi veran ekzisto-krizon. Unesko siavice povus ludi gvidan rolon redifinante ilian novan funkcion en la kunpremiĝanta mondo.

Konklude, la atingebla celo estas progreso de teknologio kaj komerco kun samtempa zorgo pri nia medio kaj pri la homoj. La plej gravaj valoroj devas esti justeco, solidareco, libereco kaj paco. Tutmondiĝo certe estas bona ŝanco por la homaro, kondiĉe de egalrajta distribuo de la fruktoj de la monda produktado sen oferi la naturan riĉecon kaj la median kaj kulturalan diversecojn, kiuj faras nian planedon tiel ĉarma.



Nia mondo ne vendeblas!

Tutmondiĝo aŭ tutmondigo?

José Salguero, Hispanio

Tutmondiĝo estas tre kompleksa kaj ampleksa afero. Multaj homoj parolas pri ĝi kaj plej verŝajne ne ĉiu samopinias, ke tutmondiĝo estas precize ununur-aspekta afero. La unua demando, kiun oni povus starigi, estas: ĉu tutmondiĝo aŭ tutmondigo? Plej multaj parolas pri tutmondiĝo kvazaŭ ĝi estus natura procezo kiel ekpluvo aŭ nebuliĝo.

Tamen Esperanto ebligas tiun nuancon, ke oni parolu anstataŭe pri tutmondigo,

kaj ne tutmondiĝo – en la senco ke iuj komercaj kaj politikaj interesoj estas gravaj agantoj, kiuj vere vigle baraktas por sukcesi en tiu procezo tutmondiga. Do, ne temas pri spontana disvolviĝo, kaj pro tio almenaŭ en tiu ĉi artikolo mi parolu pri tutmondigo, por ke almenaŭ ĉi-foje oni konstatu alian vidpunkton pri la afero.

Tia tutmondigo permesas al la monda homaro pli facilan atingon de komercaj kaj kulturaj varoj. Tio estas bona. Tamen ne ĉie tutmondigo samas. Por loĝan-

toj de evoluintaj landoj estas normalega la uzado de produktoj ne atingeblaj antaŭ jarcento: ĉina restoracio, arabidevena benzino, singapura komputilo, usona filmo, sveda laborilo ktp.

Sed grandegaj sociaj tavoloj de la samaj landoj kaj ĉefe preskaŭ la tuta loĝantaro de neevoluintaj landoj (afrikaj, amerikaj aŭ aziaj) ofte ne havas monon por ĉiutaga manĝo, kuraciloj aŭ homa hejmo. Multe malpli ili povas alproksimiĝi al tiuj tutmondigaj varoj.

Sed estas ankoraŭ pli

terura flanko de ekonomia tutmondigo. Internaciaj bankoj kaj ekonomiaj organizoj devigas kelkajn landojn produkti specifajn varojn (kafo, ligno, kotono, valoraj metaloj, poluantaj industriaĵoj ktp.), tre ofte kontraŭ iliaj propraj interesoj, sed favore al la ekonomio de evoluintaj landoj, kiel Usono, Okcidenta Eŭropo kaj aliaj. Kiam konsciaj sociaj tavoloj de tiuj devigitaj landoj kontraŭas tiun devon, kvazaŭ hazarde okazas revolucioj, militoj kaj renversoj de registaroj. Kaj mortoj, sufero kaj malsato.

Esperanto prezentita dum konferenco pri tutmondiĝo en Oslo

19-22-an de oktobro en Oslo (Norvegio), kadre de la Norvega Socia Forumo (kiu estas parto de la Monda Socia Forumo) okazis Konferenco pri Tutmondiĝo – Globalising-skonferansen. Tie ĉeestis (kaj informadis pri Esperanto) sekretario de Norvega Esperantista Ligo, Douglas Draper.

*Douglas Draper,
Britio/Norvegio*

Mi ĉeestis ĉefe por mas-trumi informbudon pri Esperanto, sed ankaŭ por organizi kolektadon de subskriboj por leĝoŝanĝo, kiu

ebligu al ĉiuj deturni sin de la persona militimposto kaj anstataŭe kontribui al fonduso por paca konflikt-solvado. Do mi ne povas raporti pri la temoj de la konferenco mem, sed el la resuma parolado mi povas mencii, ke partoprenis ĉ. 1600 homoj, de ĉiuj aĝoj, sed plej multaj estis junuloj (aŭ fakte junulinoj!); kaj ke kontraste al la antaŭaj similaj konferencoj en Oslo, prelegis tri ministroj kaj multaj ministrestaj sekretarioj kaj aliaj oficialuloj. En la 70 kunvenoj – multaj el ili, bedaŭrinde, okazis samtempe – oni amplekse traktis la temojn, kiel la militado de NATO (ĉu ankaŭ de

Norvegio?) en Afganio, la konflikto inter Palestino kaj Israelo, la revizio de la regularo de la Monda Organizaĵo pri Komerco kaj la konstruo de nova norvegia gasenergia centralo.

Mi mem ĉeestis tri tre viglajn kunvenojn – pri kampanjo por forigo de la Muro en Palestino, pri la norvega politiko pri (mal)akcepto de enmigrintoj kaj pri norvega produktado kaj eksportado de armiloj (eĉ al militzonoj, kvankam tio estas formale kontraŭleĝa). Favoraj ŝanĝoj tamen okazas, ekzemple lastatempe en Latin-Ameriko, kaj ofte danke al iniciatoj de (kaj novaj alian-

coj inter) sindikatoj, bienularoj kaj popolaj movadoj, kia tiu de la sociaj forumoj – la tutmonda, la regionaj kaj la lokaj.

Bedaŭrinde, pluraj el la prelegoj kaj eĉ tutaj seminarioj okazis en la angla, sen traduko. Multaj gejunuloj eĉ ne aŭdis pri Esperanto, sed ni disdonis ĉ. 500 flugfoliojn kaj vendis dudekon da “ŝlosiloj” kaj vortolistoj al interesiĝantoj. Kaj ni estas kontentaj, ke en la TTT-ejo de la norvega socia forumo <www.globalisering.no>, resumita en pluraj lingvoj, unu el la resumlingvoj estas Esperanto.



Judith Meyer, Germanio

La tempo neniam estis pli bona por Esperanto. Dank' al la tutmondiĝo, la mondo kuniĝas, homoj el diversaj landoj sentas sin pli proksimaj ol antaŭe, ili lernas multe pli da fremdaj lingvoj kaj ekinteresiĝas pri aliaj kulturoj. Malgraŭ la pasinteco, nun tiu movado estas subtenata de la plej granda konata potenco: la mono.

En la pasinteco, riĉaj homoj ofte subtenis malpacon por la realigo de siaj intereso. Nuntempe ili deziras pacon, internacian komprenon kaj la forigon de limoj inter nacioj, ĉar ili ja deziras agadi en diversaj landoj. Hodiaŭ eblas fabriki kelkajn produktopartojn en Orienta Eŭropo, aĉeti la aliajn el Azio, kunmunti la tuton en

Usono kaj vendi la produkton ĉie en la mondo. Dank' al interreto, firmaoj eĉ povas dungi laboranton el tre malproksima lando kaj ricevi iliajn labor-produktojn sen ĉeesti tie. Tio speciale bonvenas, kiam oni serĉas parolantojn de fremda lingvo. Ekzemple, eble en Brisbano troviĝas nur unu sufiĉe sperta sveda tradukisto – sed per la interreto oni ja povas dungi kiun ajn tradukiston el la tuta Svedio!

La interreto estas grandega helpo por Esperanto. Tie Esperanto havas egalajn

Hodiaŭ eblas fabriki kelkajn produktopartojn en Orienta Eŭropo, aĉeti la aliajn el Azio, kunmunti la tuton en Usono kaj vendi la produkton ĉie en la mondo

kondiĉojn, kiel aliaj lingvoj: per la interreto facile eblas lerni Esperanton, trovi aliajn esperantistojn kaj amikiĝi kun ili, disvastigi la esperantan kulturon kaj la novaĵojn de la Movado.

Esperanto perdis sian preskaŭmonopolon ebligi internacian komunikadon inter simplaj homoj, sed kompare al aliaj lingvoj ĝi ankoraŭ havas lastan atuton en la mano: sian facilecon. Jes, multegaj homoj provas lerni la anglan nun, sed

eĉ post kelkaj jaroj da studado nur malmultaj el ili sukcesas paroli ĝin. Nemultaj homoj lernas Esperanton, sed la plejparto sukcesas esprimi sin bone post nur malmulte da tempo. La kondiĉoj neniam estis tiel favoraj, nun Esperanto devas pruvi sin! Aŭ pruvi sin aŭ esti enterigita, ĉar nia tempo estas tro malpacienca pri eksmodaj kaj malsukcesaj ideoj.

Kion fari? Kiel pruvi, ke Esperanto estas serioza, moderna mondlingvo – kaj sukcesigi la ideon? Unue, ne indas, ke Esperanto simple estu celo per si mem. Oni agu *per* Esperanto, ne nur *por* Esperanto. Oni renkontu kaj parolu kaj skribu en Esperanto por komunikiĝi pri temo, ne nur por uzi la lingvon. En aliaj lingvoj oni ne parolas kun homoj nur ĉar ili parolas la saman lingvon, oni parolas kun ili ĉar oni interesiĝas pri tio, kion ili povas komuniki. En aliaj lingvoj oni ankaŭ ne korektas sian paroladpartneron tiom ofte, ĉar la enhavo de la parolo pli gravas ol ĝia aspekto.

Due, oni kreu pli da aplikobloj de la lingvo, kiuj jam estas naturegaj por aliaj lingvoj. La kreado de Pasporta Servo, la esperantlingva Vikipedio, Ĝangalo, Farbskatol' kaj la Internacia Televido estis grandaj progresoj, sed oni ne rajtas endormiĝi nun. En la interreto Esperanto havas egalajn kondiĉojn kiel aliaj lingvoj, do oni ne permesu, ke eblas fari ion rete en la hinda aŭ la hispana, kion oni ne povas fari en

Esperanto. Se Esperanto povas esti pioniro en tiu kampo, des pli bone, ĉar retuzantoj informos unu la alian pri novaj servoj.

Trie, pli da esperantistoj devas konsciigi, ke nuntempe mono estas unu el la plej gravaj instigoj. Homoj pretas investi multe da mono kaj tempo por lerni la anglan nur ĉar ili kredas, ke ili tiel povos ricevi pli altan salajron. Kompare, multaj homoj ne pretas lerni Esperanton eĉ senpage, ĉar tio, laŭ ili, havas nur amuz-valoron. Certe oni ne povas tuj fari el Esperanto gravan karrierilon – sed oni povas provi montri, ke Esperanto povas esti pli ol nur amuzaĵo. Chuck Smith, Melissa Robertson kaj mi faris paŝon en tiu direkto kreante <www.Eklaboru.com>, retejon por serĉi laboron aŭ laboranton en Esperanto. Ni kredas, ke ekzistas esperantistoj, kiuj preferu dungus esperantistojn, se ili agadas same profesie kiel aliaj kandidatoj. Ni kredas, ke eĉ ekzistas postulo specife pri Esperanto-parolantoj, ekzemple por tradukado aŭ instruado, kaj ke homoj simple ne scias, kie trovi bonajn kandidatojn. Kaj ni kredas, ke kaj Esperanto kaj la esperantistoj multe gajnos, se ni disvastigos Esperanton kiel lingvon por ĉia aspekto de la homa vivo, eĉ komerco.

Vikioj – pli ol Vikipedio

Chuck Smith, Usono/Germanio

Kiam oni aŭdas la vorton “vikio”, oni kutime pensas pri la granda reta enciklopedio, Vikipedio, sed vikioj estas multe pli ol tio! Vikio simple estas retejo, kiun ĉiuj rajtas redakti, do pli-malpli komuna retejo. Per ĝia paĝo “Lastaj Ŝanĝoj” oni povas vidi, kio ŝanĝiĝis lastatempe. Do, krei enciklopedion estas la plej granda vikia iniciato ĝis nun, sed certe ekzistas aliaj. Fakte nun, la Vikipedio en Esperanto havas pli ol 60 mil artikolojn kaj

estas la 15-a plej granda lingvo en la projekto. Tio donas al Esperanto pli da respekto en la mondo ĝenerale, speciale inter aktivuloj de la projekto. Eĉ la ĉefprogramisto de la multlingva Vikipedio, Brion Vibber, estas esperantisto kaj partoprenis la E@I-seminaron en Bostono.

Krom Vikipedio ekzistas diversaj aliaj vikioj. Ĝus estis lanĉita VikiVojaĝo en Esperanto (www.wikitravel.org/eo), kiu estas turisma gvidlibro por la tuta mondo! Grupo de subtitolantoj uzas vikion por listigi, kiom da filmoj oni tradukis en Esperanton

(<<http://esperantopanorama.net/subtitoloj/index.php?FilmListo>>, nun 35). Ankaŭ tre furoras la Kantaro-Vikio <<http://www.ikso.net/kantaro>>, kiu havas tekstojn de jam 650+ kantoj. Kompreneble, ankaŭ multaj organizoj havas vikion – kiel UEA <www.tejo.org/uea>, TEJO <www.tejo.org/vikio>, kaj Esperanto@Interreto <<http://vikio.ikso.net>>. Ankaŭ firmaoj ofte uzas ilin por sia interna informejo.

Mi nun prilaboras novan projekton: VikiKreolo. Ĝi estas nova sintakso por redakti vikiojn, kvazaŭ Esperanto inter vikio-sintaksoj. En la VikiSimpozio en Danio en 2006 mi gvidis labor-

grupon konsistantan el vikiprogramistoj (inkluzive de Vibber kaj la inventinto de vikioj, Ward Cunningham), kaj ili ellaboris novan sintakson, kiu estas intuitiva kaj facila. La ideo estas ne anstataŭigi ekzistantajn vikisintaksojn, sed doni novan manieron por ke vizitantoj de nova vikioprogramo povu facile redakti ilin sen la devo lerni novan sintakson. VikiKreolo nun funkcias por la jenaj programoj: Oddmuse, MoinMoin, DokuWiki kaj TiddlyWiki.

Do, mi esperas, ke vi ĝuos vian “vikivojaĝon” dum vi malkovros ĉi tiun novan teĥnologion!

Ĉu estas iuj problemoj pro tut-mond-iĝo? Kompreneble, jes, kaj multaj. Al-iĝo de diversaj landoj kaj nacioj al tut-mondaj kun-ag-adoj estas malfacila, ĉar ĉiu lando havas siajn apartaĵojn. Inter-alie, multaj problemoj rilatas la komercon. Tamen, estas ankaŭ la ebloj forigi tiujn problemojn.

Por multaj homoj tutmonda komerco alportas **malavantaĝojn**. Tion volas ŝanĝi la just-komerca movado. La ideo aperis ĉirkaŭ 1950, kiam grupoj en Nord-Ameriko kaj Eŭropo komencis vendi aĵojn faritajn de malriĉaj homoj, **fuĝintaj** aŭ loĝantaj en aliaj landoj.

En 1958, la unua justkomerca vendejo ekestis en Usono, kaj post fondiĝo de justkomercaj en-port-organizaĵoj en Britio kaj Nederlando en 1969 malfermiĝis la unua *monda vendejo*. En tiuj vendejoj, kie ĉefe laboras **volontuloj**, oni vendas produktaĵojn – komence manfaraĵojn, poste ankaŭ manĝaĵojn – faritajn de ekonomie malfortaj homoj plejparte en Azio, Afriko kaj Sud-Ameriko. La produktantoj ricevas interkonsentitan, fojfoje antaŭpagatan prezon, kiu ebligas al ili **digne** vivi. Oni helpas ilin fari pli **kleraj** kaj **sendependaj**, plibonigi la produktaĵojn kaj produkti per medi-amikaj kaj **daŭrigeblaj** manieroj. La laboro okazas en **sekuraj** kaj sanigaj **cirkonstancoj**, kun egaleco inter viroj kaj inoj kaj sen **malavantaĝigi** infanojn.

Ekde 1988, kiam naskiĝis la **etikado** *Max Havelaar* por kafo, justa komerco pli kaj pli videblas en aliaj lokoj. Nun FLO (*Fairtrade Labelling Organizations International* – Justkomerca Etikediga Organizaĵo) kontrolas diversajn produktaĵojn. Krom propra komerco, la movado agas ankaŭ por tio ke la internaciaj komercaj reguloj estu pli bonaj por malriĉaj landoj. Oni faras tion ne pro kompatemo, sed pro **respekto**!

En la jaro de sia 35-jara ekzisto la Belgia organizaĵo *Oxfam wereldwinkels* (mondovendejoj) organizis Afriko-tagon por studi komercon en kaj kun tiu mondoparto, kiu malriĉas kaj eĉ malriĉiĝas. Oni invitis specialistojn pri internacia komerco, politikistojn kaj homojn kiuj laboras pri just-komercaj projektoj. Kompreneble dum tiu tago multo estis dirita; mi provos skribi nur pri kelkaj gravaj aferoj, kiel mi komprenis ilin.

Granda parto de la komerco en Afriko sub Saharo konsistas el ter-kulturaj produktaĵoj kaj **krudaj** materialoj. Ĝuste la prezoj de tiuj aĵoj multe malpliigis dum la lastaj jaroj, kaj la Afrikaj produktantoj malmulte povas influi tion. Usono kaj Eŭropa **Unio subvencias** siajn terkulturistojn, tiel ke por la Afrikaj terkulturistoj malfacilas aŭ ne eblas **konkuri** kun la malaltaj prezoj de enportataj produktaĵoj, kaj tiom pli – por elporti siajn varojn. Dume oni **instigas** Afrikon liberigi sian komercon, tio estas, forigi la enportajn **impostojn**. Tamen libera komerco ne ekzistas, diris Jash Tandon, Uganda ekonomisto, dum la studotago, tio estas **preteksto** por komerco, kiun EU kaj Usono volas kontroli.



EU faras bonajn promesojn sed ofte ne plenumas ilin (ĉu pro kontraŭado de aliaj EU-aj reguloj?).

Afriko pli multe partoprenas en la monda komerco ol ekzemple Usono (internacia komerco estas 50% de la **malneta enlanda produkto** en Afriko kontraŭ 10% en Usono). Estas multaj eksterlandaj investoj en Afrikon, sed malklaras, kion tio alportas por la afrikanoj. Multaj specialistoj opinias, ke Afriko mise partoprenas en mond-komerco; necesas ankoraŭ konstrui rimedojn por mem prilabori, do plivalorigi, siajn produktaĵojn kaj plivigligi la lokan komercon (tamen, en kelkaj lokoj militoj aŭ batalado malfaciligas la aferojn). Ekonomisto Tandon esprimis la ideon, ke Afriko devas unue rompiĝi disde la monda komerco, kaj nur poste ĝi povos pli taŭge realiri ĝin, kvazaŭ rompita kaj malĝuste saniĝinta osto, kiun oni denove rompas. Oni donu al ĝi la necesan tempon kaj helpon.

cirkonstanco – flanka okazo

daŭrigebla – ne eluzanta la naturajn rimedojn

digna – ĝusta, konvena al ies valoro

etikado – informas sur produktaĵoj
fuĝi – forkuri pro danĝero
imposto – mono pagenda al la ŝtato
instigi – provi influi iun
klera – kapabla, lerninta
kompanio – komerca aŭ industria societo
konkuri – provi ricevi pli bonan rezulton ol iu alia
kruda – kiel la naturo produktis
malavantaĝo – kio kaŭzas malbonon
malneta enlanda produkto – suma valoro de produktaĵoj en unu lando
preteksto – ŝajna kialo por kaŝi la veron
profito – gajno
respekto – montrado de estimo
sekura – sendanĝera
subvencii – helpi per mono
unio – unuigo de ŝtatoj
volontulo – iu kiu laŭvole laboras sen ricevi monon por tio

<Rete>

<<http://www.ifat.org>>, <<http://www.european-fair-trade-association.org>>, <<http://www.world-shops.org>>, <<http://www.fairtrade.net>> (angle)

La Liberŝtata Projekto



Dum Histrik-festo, Nov-Hampŝiro, 2006



Steve Cobb, Usono/Rusio

La Liberŝtata Projekto (LŜP) estas peno agiti 20 mil ŝatantojn de libereco por translokiĝo en la ŝtaton Nov-Hampŝiro, kie ili strebos krei socion, en kiu la plej grava rolo de la registaro estos la protektado de vivo, libereco kaj personaj havaĵoj. La filozofio, kiu gvidas la organizantojn de la projekto, estas relative nova, ĝin eblas nomi simple “libertarianismo*”. Ekzistas kelkaj definoj de tiu filozofio, sed unu estas pli ofte uzata: vi havas la rajton uzi perforton nur por defendi vin kaj viajn posedaĵojn.

Vi povas supozi, ke libertarianoj estas senesperaj, se ili pretas fari tiel koston agon – translokiĝon, kaj ili vere estas tiaj. La libereco filozofio ne estas populara, ĉar ĝi rezignas perforton kiel rimedon por atingi la celojn. Libertarianismo permesas la uzon de perforto nur en unu situacio: la defendo de homaj rajtoj, strikte difinitaj. La plejmulto da homoj *diras*, ke ili kontraŭas perforton, sed ili pretas akcepti ĝin en multaj kazoj, ekz. kiam ĝi estas uzata “demokratie” de la registaro. Iuj homoj eĉ aktive *serĉas* la eblojn por uzi perforton por “plibonigo” de socio! La subtenantoj de la ŝtata kontrolado kredas, ke ekzistas multe da mirindaj, gravaj projektoj, por kies efektivigo bezonatas

devigi la homojn partopreni. Ili kredas, ke ni devas limigi la liberon de homoj, ĉar alie ili povas malutili al si mem. Ili diras, ke ni devas forpreni monon de homoj, ĉar ili ne scipovas uzi ĝin saĝe, ekz. ili malbone klerigas siajn infanojn, ŝparas por sia maljuneco aŭ faras donacojn al filantropaj fondusoj.

Libertarianoj havas alian opinion. Homoj havas la rajtojn, kaj certaj agoj povas neniel esti aplikataj al ili, eĉ kun bonaj intencoj kaj eĉ kun la subteno de la plejmulto. Libertarianoj kredas, ke ĉiu homa interago devas okazi surbaze de ambaŭflanka *konsento*, eĉ se atingi ĝin estas malfacile. Libertarianoj kredas, ke oni ne rajtas perforte forpreni monon forme de impostoj por efektiviĝi la revojn de politikistoj – militojn, monumentojn, kosmoŝipojn kaj eĉ bonaĵojn por la malriĉularo, ĉar eĉ ordinaraĵoj povas havi siajn revojn, kvankam malgrandajn kaj modestajn. Libertarianoj akceptas, ke liberaj homoj povas ja fari malbonan elekton, ekz. ili elektas manĝi, trinki aŭ fumi malsanigajn aĵojn. Sed libertarianoj kredas, ke tio estas la prezo por plenkreskeco kaj libero, ke pli bone informitaj kaj pli liberaj homoj iĝos ankaŭ pli respondecaj. Kompreneble, la malfido de ŝtatistoj al ordinaraĵoj homoj postulas demandon: se vi ne povas fidi homojn individue, kiel vi povas fidi ilin kolektive? Kaj kiel vi povas fidi politikistojn: ĉu ili ne estas elektitaj de homoj, kaj ĉu ili mem ne estas homoj?



Libertarianoj kredas, ke grandkvantaj kolektivoj kaj grandpovaj politikistoj estas daŭra minaco al homaj rajtoj.

En la lando, en kiu la plejmulto povas trudi sian volon al la malplimulto, mistraktita malplimulto havas kelkajn eblojn: ĝi povas klopodi klerigi kaj konvinki la plejmulton; ĝi povas batali kontraŭ ĝi; ĝi povas elmigri aŭ ĝi povas migri kaj koncentriĝi. Dum multaj jaroj libertarianoj penis persvadi la alipensulojn, sed kun malgranda sukceso. Registaro de Usono daŭre kreskas, kutime preze de libereco. Ekzemple, la “lando de la liberuloj” nun havas *la plej altan* procentaĵon de enprizonigitoj en la mondo! La Libertarianisma Partio estas la tria plej granda politika partio en Usono, sed pro la voĉdonsistemoj uzataj en Usono ĝi preskaŭ neniam sukcesas. En la jaro 2001, en senespero, grupo da libertarianoj decidis sekvi novan strategion: anstataŭ peni reformi tutan Usonon, landon de 300 milionoj da homoj, ili translokiĝos en unu ŝtaton kaj koncentros siajn fortojn tie.

Malgraŭ la daŭra kresko de povo en Vaŝingtono, pli multe da povo en Usono ankoraŭ restas ĉe la individuaj kvindek ŝtatoj: ĉiu ŝtato havas sian propran konstitucion kaj ofte tre malsimilajn leĝojn. Per malgrandigo de siaj atendoj kaj elekto de malgranda teritorio, libertarianoj povus atingi veran reformon. Sed kiu ŝtato estos la ĝusta? Jason Sorens, aspiranto en la Universitato Yale [jejl], fondis la Liberŝtatan Projekton kiel inter-

retan komunumon, kaj dum du jaroj la kreskanta membraro debatis interrete pri la demando “kiu ŝtato?”. Ĉiu havis diversajn kriteriojn, ekz. grandeco de la loĝantaro, loko sur la mapo de Usono, jam ekzistanta libereco etoso, klimato, havebleco de laborlokoj – almenaŭ cent konsideroj. Finfine la membraro voĉdonis, uzante la voĉdonmetodon *Condorcet* [kondorset] (t.e. voĉdonon laŭ ordo de preferoj), kaj gajnis Nov-Hampŝiro, ŝtato de la regiono Nova Anglio, kun 1,5 milionoj da loĝantoj.

Laŭ la komencaj reguloj de la projekto, kiam oni aliĝas al la LŜP, oni promesas translokiĝi nur post kiam aliĝos 20 mil homoj. D-ro Sorens konservative taksis la nombron de libertarianaj aktivistoj, bezonataj por efektivigo de la reformo, je 20 mil, kaj la estraro supozis, ke homoj pretos translokiĝi nur se la sukceso estas garantiita. Fakte, ni ege mistaksis la bezonatan nombron kaj subtaksis la entuziasmon kaj malpaciencon de la homoj, kiuj volas ŝanĝojn jam nun. Nun estas pli ol 7,3 mil partoprenantoj, sed pli ol cent jam translokiĝis, kaj novaj homoj venas ĉiusemajne!

Kial homoj aliĝas al la LŜP? Ofte ili estas pasiaj pri unu aparta libero por si aŭ siaj familioj. Kelkaj interesiĝas pri la rajto de sindefendo aŭ la rajto doni al siaj infanoj pli bonan klerigon ol tio, kio haveblas en la registaraj lernejoj. Kelkaj revas lanĉi sian propran firmaon kaj volas malpli altajn impostojn kaj malpli da kontrolado.

Kelkaj serĉas la rajton geedziĝi libere, eĉ kun iu de la sama sekso. Aliaj deziras libere fumi kanabon, ĉu pro plezuro ĉu pro medicinaj kialoj. Ĉiu individuo havas siajn individuajn esperojn kaj revojn. Sed la plej granda parto de la LSP-partoprenantoj estimas liberecon kiel ĝeneralan principon. Ili volas montri al la mondo, ke libereco funkcias. En Usono tio eble sonas amuze, sed la stato de aferoj en Usono ne estas tia, kia ĝi estis antaŭe. Nia konstitucio estas rompita kaj ne plu protektas la rajtojn kiel antaŭe. Libertarianoj adoras la usonan konstitucion kaj volas restarigi ĝin.

Nov-Hampŝiro vere estas mirinda ŝtato. Ĝi havas kvar sezonojn, ĉiu el kiuj allogas turistojn, aparte "foliajn turistoj", kiuj venas por rigardi la nekredablajn aŭtunajn kolorojn. La slogano de Nov-Hampŝiro estas "Vivi libera aŭ morti", kaj ĝi ja estas unu el la plej liberaj ŝtatoj en Usono. Nov-Hampŝiro ne havas vend- kaj laŭenspezan impostojn, civitanoj havas la rajton porti pafilojn, kaj ĝi estas la sola ŝtato en Usono, kie plenkreskulo rajtas veturi sen gardrimeno. Nov-Hampŝiro estas unu el la plej sekuraj kaj plej

prosperaj usonaj ŝtatoj, kaj ĝi ofte aperas en la unua loko en la listo "la plej bona usona ŝtato por loĝi". Ĝia norda najbaro estas Kebekio, kaj sude troviĝas Masaĉuseco, do la granda urbo Bostono estas proksima.

Ni esperas fari Nov-Hampŝiron eĉ pli bona. Historio subtenas libertarianismon: landoj kun registaroj pli similaj al la libertarianisma idealo estis multe pli pacaj kaj prosperaj; landoj, situantaj ĉe la mala ekstremo spertis stagnadon, korupton, militon kaj eĉ genocidon. Libertarianoj foje diras, ke la ideala lando devas havi la neŭtralecon de Svislando, la personajn liberecojn de Nederlando kaj la ekonomiajn liberecojn de Honkongo. Ŝajnas ke, se ni havas tiom multe da datumoj, la problemo pri dezajnado de la plej bona politika sistemo devus esti jam solvita, tamen la solvon kontraŭas la mallong-tempaj memintereso. Senlima nombro da parazitaj grupoj kun apartaj intereso konsideras la registaron ne ilo de justeco, sed ilo por ilia propra profito.

Ni povas resumi la libertarianisman vidpunkton jene:



1. Homoj havas la rajton fari tion, kion ili volas, se tio ne tuŝas la rajtojn de la aliaj.

2. Perforto estas permesata nur por defendi la rajtojn.

3. La plej grava rolo de la registaro estas la defendo de la rajtoj.

4. Havante la povon uzi perforton, registaro mem fariĝas minaco al rajtoj, do politika povo devas esti limigita, malcentralizita kaj kontrolebla.

Usono antaŭe havis tian sistemon, kaj la Liberŝtata Projekto ĝin restarigos, eĉ se komence nur en unu malgranda ŝtato.

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas vic-prezidanto de la Liberŝtata Projekto.

* La vortoj "libertariano" kaj "libertarianismo" ne estas N.PIV-aj, tamen, por eviti konfuzon, ni uzis ĝuste tiun ĉi vortumon. Pli da informoj pri libertarianismo kaj la Libertariana Partio troviĝas ĉe <http://eo.wikipedia.org/wiki/libertarianismo> (Esperante), <http://www.lp.org> (la paĝo de la Libertariana Partio, angle).

<Rete>

Vi povas legi pli en Esperanto pri libertarianismo en la paĝaro de la Internacia Societo por Individua Libereco: <http://www.isil.org/libereco>



Steve Cobb (maldekstre) kaj Ken Schoolland

Ken Schoolland, Usono

Dum Jonatano staris kaj pripensis, kien iri poste, aliris lin fortika, gaja virino. Ŝi senhezite kaptis lian dekstran manon kaj komencis entuziasme skuegi ĝin. "Kiel vi fartas? Hodiaŭ estas bona tago, ĉu ne?" – ŝi diris fulmrapi-dege, daŭre prilaborante lian manon per sia dika brako. "Mi estas Sinjorino Bess Tweed*, via amikema kvartal-reprezentanto en la Konsilio de Lordoj, kaj mi estus pli ol danka ricevi

Vendopovo

vian kontribuon kaj voĉdonon por mia reelektio – vi ja komprenas, tio estas prema situacio por nia bona komunumo".

"Ĉu vere?" – demandis Jonatano. La rapideco kaj forto de ŝia parolo puŝis lin reen je unu paŝo. Li neniam antaŭe renkontis homon, kiu povus diri tiom da vortoj per unu spiro.

"Ho jes, – daŭrigis Sinjorino Tweed, preskaŭ sen aŭskulti lian respondon, – kaj mi ankaŭ pretas bone pagi al vi, ho jes, mi pretas pagi al vi, vi eĉ ne povas imagi pli bonan negocion, kio pri tio?"

"Pagi al mi por kontribuo kaj voĉdono?" – demandis Jonatano konsternite.

"Nu certe, mi ne povas doni al vi kontantan monon – tio estus kontraŭleĝaĵo, subaĉeto – ho, diru nenion pli, diru nenion pli", – diris Sinjorino

Tweed, ruze palpebrumante al li kaj puŝante liajn ripojn per sia kubuto. Ŝi daŭrigis: "Sed mi povas doni al vi ion sambonan kiel mono, kaj ankaŭ valoran multoble pli ol la sumo de via kontribuo al mi. Estas same facile, kiel lanĉi pumpilon. Kelkaj paperoj en mia mano jam nun kaj fontano da bonaĵoj poste. Jen kion mi faros, kio pri tio?"

"Tio estus bona", – respondis Jonatano, kiu rimarkis, ke ŝi ĉiukaze ne aŭskultas lin.

"Kio estas via profesio? Mi povas aranĝi helpon – pruntedonojn aŭ licencojn aŭ subvenciojn aŭ impost-malaltigojn. Mi povas detrui viajn konkurantojn per reguloj kaj reguligoj kaj inspektado kaj monpunoj. Do, vi vidas, neniun investo en la mondo pli bonas ol investo en bone lokitan poli-

tikiston. Eble vi deziras novan vojon aŭ parkon en via ĉirkaŭaĵo aŭ eble pli grandan domon aŭ..."

"Atendu, – kriis Jonatano, penante haltigi la torenton de ŝiaj vortoj. – Kiel vi povas doni al mi pli multe ol mi donas al vi? Ĉu vi estas tiel riĉa aŭ malavara?"

"Mi riĉa? Ho ne, ĉielo kaj tero, ne, – repafis Sinjorino Tweed. – Mi tute ne estas riĉa, mi ne dirus tion. Malavara? Eblas diri tiel, sed mi ja ne intencas pagi tion el mia propra poŝo. Nu certe, mi respondas pri la oficiala trezorejo. Kaj, verdire, mi ja povas esti malavara pri tiuj ĉi fondusoj, por ĝustaj homoj". Ŝi rikanis, dufoje palpebrumis kaj denove puŝetis liajn ripojn: "Ho, diru nenion pli, diru nenion pli".

Jonatano daŭre ne komprenis, kion ŝi celis: "Sed se vi aĉetas mian kontribuon kaj mian voĉon, ĉu tio ne estas simple speco de, nu, la sama



afero kiel subaĉeto?” Sinjorino Tweed rigardis lin ruze. “Mi diros al vi rekte, mia kara amiko”, – ŝi metis sian brakon ĉirkaŭ lian ŝultron kaj malkomforte tiris al si. – Tio estas subaĉeto. Sed estas tute laŭleĝe, kiam politikisto uzas monon de aliaj homoj, ne sian propran. Tute same, estas kontraŭleĝe se vi donos al mi monon por specifaj komplezoj, krom se vi nomas tion “kampanja kontribuo”. Tiam ĉio estas bona. Vi povas aĉeti centon da ekzempleroj de miaj memuaroj kaj ne legi eĉ unu. Ĉu vi sentas vin malkomforte donante kontantan monon rekte al mi? Simple petu vian amikon aŭ parencon aŭ kolegon doni pruntaĵon, akciojn aŭ bonaĵojn por mi aŭ mia familio – nun aŭ poste”. Ŝi haltis atendente: “Ĉu nun vi komprenas?”

Jonatano skuetis la kapon: “Mi tute ne vidas la diferencon. Mi celas, ke subaĉeto de homoj por iliaj voĉoj kaj komplezoj estas ĉiukaze subaĉeto, ne gravas, kiuj ili estas kaj kies monon oni uzas. La algluita etikedo ne gravas, se la faro estas la sama”. Sinjorino Tweed indulge ridetis: “Mia kara, kara amiko, vi devas esti pli fleksebla. Etikedo estas ĉio”. Per sia libera mano ŝi ĝentile prenis lian mentonon kaj turnis la vizaĝon de Jonatano flanken: “Kio estas

via nomo? Ĉu vi scias, ke vi havas belan profilon? Vi povus havi sukceson, se vi kandidatigus por publika ofico. Se vi estas fleksebla, mi certas ke mi povus trovi por vi bonan postenon en mia buroo post la reelektio. Aŭ ĉu vi volas ion alian?”



Jonatano skuis la kapon kaj provis liberiĝi de ŝia mano. “Kion vi ricevas per disdonado de la impostmono? Ĉu vi povas konservi la monon, kiun oni donis al vi kiel kontribuojn?”

“Ho, io el ĝi utilas por miaj elspezoj, kaj

mi ankaŭ promesis al mi amason post la emeritiĝo, sed plejparte la mono aĉetas por mi rekonon aŭ konfidon aŭ popularacon aŭ amon aŭ admiron aŭ lokon en la historio. Ĉio ĉi – por mi kaj mia idaro, – Sinjorino Tweed subridetis. – Voĉoj estas povo, kaj estas nenio kion mi ĝuas pli ol influo sur la vivon, liberon kaj posedaĵojn de ĉiuj homoj sur tiu ĉi insulo. Ĉu vi povas imagi, kiom da homoj venas al mi – al mi – por grandaj kaj etaj komplezoj? Ĉiu imposto kaj reguligo prezentas la okazon ke iu ricevu de mi specialan esceptokazon. Ĉiu problemo, granda aŭ eta, donas al mi pli da influo. Mi premias kiun ajn mi volas per senpagaj tagmanĝoj kaj senpaga transportado. Ekde kiam mi estis infano mi revis pri tia graveco. Ankaŭ vi povas dividi la gloron”.

Jonatano provis liberiĝi la manon, sed Sinjorino Tweed firme tenis ĝin. “Certe, – diris Jonatano, – vi kaj viaj geamikoj havas multon, sed ĉu aliaj homoj ne malĝojiĝas, kiam vi uzas ilian monon por aĉeti iliajn voĉojn, komplezojn kaj povon?”

“Certe, – ŝi diris, fiere

suprenigante sian dikan duoblan mentonon. – Kaj mi scias iliajn zorgojn. Pro tio mi antaŭenigas reformon”. Finfine liberiginte la manon de Jonatano, Sinjorino Tweed ŝovis supren en la aeron sian grandan, ornamitan pugnon. “Dum multaj jaroj mi skizis novajn regulojn por elpreni monon el politiko. Kaj mi akiris pluregajn voĉojn per la promesoj de reformo, – ŝi haltis por ridetaĉi kaj poste daŭrigis. – Bonŝance por mi, mi ĉiam scias la manieron trakti miajn regulojn, dum kaŝiĝas en ili valoraj vendeblaj komplezoj”. Ŝi palpebrumis kaj denove kubutpuŝetis Jonatanon: “Ĉu vi min komprenas, ĉu vi komprenas?”

Sinjorino Tweed kritike rigardis Jonatanon, ekzamenante liajn ĉifonojn. “Neniu pagas al vi ion por komplezoj, ĉar vi, almenaŭ nun, havas neniujn komplezojn por vendi. Ĉu vi ne vidas? Sed kun via senartifika aspekto – kaj ĝusta subteno fare de mi, vi povus iri tre longan distancon. Hmmm... novaj vestaĵoj, luksaj ŝuoj, stila hararango kaj konvena fianĉino. Jes, mi tutcerte povus triobligi la komencantan voĉdonkvanton por vi. Tiam, post deko aŭ dudeko da jaroj de zorga gvidado, ne plu estos iuj ajn limigoj al viaj ebloj. Vizitu min en la Palaco de Lordoj, kaj mi vidos, kion mi povas fari”. Sinjorino Tweed rimarkis grupon de laboristoj, kiuj kolektiĝis trans la strato, senespere rigardante la fermantan fabrikon. Ŝi subite perdis intereson pri Jonatano kaj rapide formarŝis, serĉante freŝan predon.

“Elspezi monon de aliaj homoj ŝajnas esti problema afero”, – murmuris Jonatano.

Kun la oreloj agorditaj al ajna sono de malkonsento, Sinjorino Tweed haltis kaj rapide turnis sin: “Ĉu vi ĵus diris ‘problemo’? Ha. Vere, tio estas kvazaŭ forpreni bombonon for de bebo. Tion, kion la homoj ne donas al mi devige, mi prunteprenas de ili.

Vidu, mi estos jam antaŭlonge foririnta kaj ame rememorata, kiam iliaj ankoraŭ nenaskitaj beboj ricevos la fakturon. Kiu estas via nomo, knabo?”

“Aa, Jonatano Gullible, sinjorino”.

La vizaĝo de Sinjorino Tweed fariĝis akra kaj malvarma: “Mi memoros vin, Jonatano Gullible. Se vi ne estas kun mi, vi estas kontraŭ mi. Mi premias miajn geamikojn kaj punas malamikojn. Vi ne povas stari meze, ĉu vi komprenas? Ĉi tio estas prema situacio por nia bona komunumo. Diru nenion pli”. Ene de sekundo ŝia vizaĝo denove lumis per larĝa, brila rideto. Ŝi malaperis sur la strato.

Tio ĉi estas elĉerpajo el la libro “La Aventura de Jonatano Gullible. Libermerkata Odiseado”, de Ken Schoolland, Usono (trad. el la angla J. Amis), eldonita de Impeto (Moskvo, 2006). La libro (en Esperanto) aĉeteblas de la libroservoj de UEA, ELNA kaj aliaj libroservoj (detalaj informoj - ĉe <http://www.isil.org/eo>). Tiu ĉi libertaria libro estas tradukita en pli ol 35 lingvojn. Vd. detalojn ĉe <http://www.jonathangullible.com/languages.htm>

* Bess Tweed [tuid] – aludo al Boss Tweed (ĉefo Tweed), usona politikisto, estro de la novjorka politika maŝino dum la plej korupta periodo en la 19-a j.c.



“Verda lingvo” por verda junularo

Rakonto pri tio, kiel verda internacia tendaro en Slovakio fariĝis pli verda kaj eĉ stela



KOMPLEZE DE D. KOKOREV

Indiano, Rusio; Igor Chýra, Slovakio

“Arto kaj aktiveco” estis la temo de Ekotopio 2006 – internacia ĉiujara kunveno por “verda” junularo: bonega eblo samtempe havi ripozadon, aktivadon kaj trovi novajn samideanojn, geamikojn, rimedojn por sekvaj projektoj. Tia tendaro povus esti perfekta se ne mankus en ĝi Esperanta parolado. Por ŝanĝi tiun situacion mi venis al Zajeĵovo – vilaĝo en Slovakio, kie okazis Ekotopio. Kaj la evento, plena je diversaj programeroj, pliriĉiĝis ankaŭ per esperantaĵoj: prezentado, parolado ktp...

Iomete pri la historio de Ekotopio

Komence Ekotopio-tendaro aperis en Germanio, ĝi iĝis ĉiujara kaj nun ĝi okazas regule diverslande. Poste oni organizis Ekotopio-bicikladon, kiu komenciĝas de iu malproksima al la tendaro loko de Eŭropo kaj daŭras dum unu-du monatoj. Ambaŭ projektoj – la tendaro kaj la biciklado – ekzistas jam preskaŭ 20 jarojn. Ili estas organizataj kun helpo de EYFA (*European Youth For Action*) – Eŭropa Junularo por Agado, kiu de la pleja komenco okupiĝas pri ili. Ekotopio estas loko, kie

renkontiĝas centoj da homoj, kiuj interesiĝas pri ekologiaj kaj sociaj problemoj.

La ideo de Ekotopio estas simpla kaj natura. Ekotopio estas festivalo de daŭripovaj alternativoj, en kiu partoprenas homoj de la tuta Eŭropo kaj eĉ la mondo. Ekotopio estas ne nur feria etostendaro, ĝi estas spaco por aktiveco, lernado kaj memlernado kun laboro kaj amuzo. Tendaro estas bazita sur la reciproka helpo kaj toleremo. Ĝi ne havas lokon por ksenofobio kaj drogkonsumado. Ekotopio estas sukcesa provo fari funkciantan modelon kaj praktikan ekzemplon de memorganizata komunumo.

Grava afero en la tendaro estas la principoj de decidfarado. Ĉiuj decidoj rilataj al la ĉiutaga vivo kaj strategiaj aferoj estas farataj dum Matena Rondo. Estas uzata la ĝenerala konsento – sistemo de decidado, kiam ĉiuj jesas. En Ekotopio estas uzata alternativa monsisistemo nomata “*ecorates*” [ekorejts]: ekotarifo. Ĝi estas bazita sur la vivnormoj kaj enspezoj de homoj: tio signifas, ke dum Ekotopio vi pagas la saman prezon por manĝado ktp., kiun vi pagus en via lando.

Ekotopio subtenas kaj uzas la principojn de amikeco al naturmedio: recikligo de rubaĵoj, vegetarana kaj vegana kuirado, uzado de alternativ-

fonta energio ktp... La tendarejo havas lokon por tendoj, komuna kuirejo, improvizitaj duŝejoj kaj kompostaj necesejoj. Ĉiuj aktive partoprenas en la ĉiutaga vivo de la tendaro kaj kreado de la programo. La programo konsistas el diskutoj, praktikaj kaj teoriaj kreivaj metiejtoj kaj ankaŭ spektakloj.

Laŭ niaj impresoj kaj scioj, Ekotopiaj eventoj aspektas sufiĉe simile al la Esperanto-aranĝoj. Se diri tre mallonge, la ideo de Ekotopio estas konstrui kaj uzi komunumon, en kiu regas egaleco kaj amikeco ktp. Kaj dum Esperantaj renkontiĝoj ni fakte faras la samon. Malgraŭ multaj malfaciloj por realigi niajn idealojn, ni ĉiuj daŭrigas la

laboron kaj esperas. Jen kial mi nomas la partoprenantojn de ambaŭ projektoj “samideanoj”.

Ekotopio 2006

Ĝi unuafoje okazis en Slovakio kaj daŭris pli ol du semajnojn de la komenco ĝis la 20-a de aŭgusto en parto de la vilaĝo Pliešovce Zajeĵová proksime al la urbo Zvolen. La ĉef-temo de la ĉi-jara aranĝo estis “Arto kaj aktiveco”. La ligita projekto – “Karavano de arto kaj aktiveco” – komenciĝis pli frue ol la tendaro. Komence la karavano partoprenis en Eŭropa socia forumo en Grekio kaj havis sian finhaltejon en nia tendaro. Ĝi estas internacia translima projekto de EYFA. Praktikaj kreiv-metiejtoj de la karavano estis dediĉitaj al sambo, kreado de kostumoj, irado per stilzoj, strata teatro, klaŭnaj spektakloj ktp. Aktivisma arto traktas problemajn sociajn temojn per nova metodo. Ĝi klopodas kontribui al ŝanĝo de la mondo per kreiveco, instigado kaj malfermiteco. Alia grava parto de la projekto estis la bicikla veturado. Ĉi-jare ĝi komenciĝis la 18-an de junio en Litovio, trairis Pollandon kaj Slovakion, kie ĝi restis por du semajnojn en Ekotopio. Poste ĝi daŭris en Hungario, Slovenio kaj Kroatio. La bicikla karavano dum siaj haltoj vizitis diversajn ekologiajn kaj homrajtajn



KOMPLEZE DE D. KOKOREV

movadojn, helpis al ili turni atenton al certaj problemoj kaj subtenis iliajn sociajn kampanjojn. Tia biciklado finiĝis la 22-an de septembro per la internacia kontraŭaŭta festo “Senaŭta tago”.

Ĉu lingvaj problemoj?

Same kiel dum ordinaraj internaciaj kunvenoj, preskaŭ la plej grava problemoj de Ekotopio estis la problemoj de komunikado. Se vi ne scipovas la anglan bone, vi ne povas babili, bone kompreni, vi estas eligita el normala aktiva vivo de la tendaro. Eĉ se vi havas bonajn amikojn, kiuj pretas ĉiam traduki ĉion por vi, tutegele ili certe ne povas esti kun vi senfine.

Mi jam la trian fojon partoprenis la Ekotopio-tendaron kaj mi ĉiam reklamis Esperanton. Somere 2004, kiam mi partoprenis en biciklado kaj tendaro, mi havis la eblon prezenti Esperanton, rakonti pri ĝi kaj eĉ organizi la instruadon. Tiam partoprenis ĉirkaŭ dek homoj. De tendaro al tendaro mi regule faris programerojn, rilatajn al Esperanto. Ekzemple: simpla rakonto pri historio de la lingvo, interesaj faktoj pri lingvoj ĝenerale, pri “verda lingvo” speciale kaj ĝiaj pozitivaj flankoj. Interalie, la homoj scias pri Esperanto preskaŭ nenion! Mi kun granda miro rimarkis, ke eĉ

eksterlandanoj (pri rusianoj ĉio klaras), kiuj estas sufiĉe aktivaj, spertaj kaj certe saĝaj, tre malmulte scias pri Esperanto. La “argumento”, ke “ĝi estas morta lingvo” estis tre populara... De alia flanko, mi devas diri, ke se homoj tamen komencis diskuti kun mi pri Esperanto kaj lingvaj problemoj, plejofte ili estis konvinkitaj kaj multaj promesis eklerni “tiun bonan lingvon”. Tiukaze mi ĉiam donis la adreson de “Lernu”.

Kiajn konkludojn mi diru? Tutmondiĝo kaj Esperanto estas tre forte interligitaj, kaj oni povas klare montri tiujn ligojn al sociaj aktivuloj – potencialaj

esperantistoj. Tiel tiaj homoj esperantistiĝos tre rapide.

Kiel partopreni en Ekotopio?

Tre facile – vi devas nur voli. Kaj se vi volas renkontiĝi kun multaj interesaj homoj de la tuta Eŭropo por dividi siajn opiniojn, spertojn, lerni ion novan, akiri inspiron kaj aktive eniri en vivprocezon de la komunumo, ĉi tiu taŭga loko estas por vi! Partopreni povas ĉiu, kiu respektas Ekotopiajn principojn kaj volas ŝanĝi ion – en persona vivo aŭ en la mondo. Ĝis la revido en Ekotopio-2007 en Portugalio!

Projekto Gutenberg:

La plej malnova cifereca biblioteko, kun pli ol 19 mil titoloj!



Projekto Gutenberg kaj Kreiva Komunumo estas unuj el multegaj bonegaj kaj tre perspektivaj interretaj iniciatoj, en kiuj ankaŭ Esperanto ludas gravan rolon. En la numero pri Tutmondiĝo ni ne povis maltrafi la okazon rakonti pri Projekto Gutenberg, kaj Roberto Read – aktiva usona esperantisto, doktoro kaj komputilemulo – afable konsentis prezenti la projekton al KONTAKTO-legantoj.

- Kio estas Projekto Gutenberg kaj kio estas Kreiva Komunumo? Ĉu ili estas interligitaj?

- La vortoj “kreiva komunumo”, aŭ miaj nunaj preferataj – “publika liberverkaro”, signifas publike uzeblan aron da verkoj, artaĵoj, softvaro kaj ideoj ĝenerale. Sed “publika liberverkaro” ankaŭ esprimas la

ideon, ke tiu libere havebla aro vere riĉigas la homaron kaj ke ni kreskigu ĝin. La enhavo de la publika liberverkaro estas diversa, kaj la diverseco kreskas. Libro kaj literaturo ĝenerale estas unu el la plej gravaj kaj utilaj kategorioj. Projekto Gutenberg* (PG) estas esprimo de tiu ĉi ideo por libroj. Pli konkrete, ĝi estas retpaĝaro, de kiu oni povas elŝuti 19 mil senpagajn kaj libere uzebajn librojn. Iu ajn kun retumilo povas fari tion ĉe <<http://www.gutenberg.org>>.

- Rakontu ĝenerale pri la strukturo de la projekto: mi legis, ke la “supro” (direktoroj ktp.) preskaŭ ne havas influon sur la laboron de la “subo”. Ĉu vere?

- Fakte, la “supro” kaj la kreinto de PG, Michael [majkl] Hart, aktive gvidas ĝin, kaj nome li bonvenigis Esperanton per retmesaĝo rekte al mi. Sed vi pravus, ke li kaj malgranda skipo ne faras la plejparton de la laboro. Ilia ĉefa rolo nun estas aprobi librojn kaj certigi, ke eldono per PG estas taŭga laŭ la leĝoj de Usono. Ĉi tio estas grava afero, ĉar ĝi garantias al ĉiuj, kiuj deziras uzi la librojn, ke ili rajtas fari tion, sen la timo de jura proceso, ekzemple.

- Kiun konkretan laboron faras vi kaj aliaj partoprenantoj de la projekto? Kiel oni certigas senerarecon de libroj en PG?

- La konkreta laboro farata de miloj da volontuloj estas prepari librojn por elektronika eldono. Estas tri bezonoj: akiri elektronikan tekston, aranĝi ĝin laŭ la reguloj de PG kaj pruvi al PG, ke ne estas posedanto de kopirajto, kiu malpermesas la eldonon. Por la lasta punkto estas du ebloj: montri, ke la kopirajto estas sufiĉe malnova (t.e. ke la libro estis eldonita antaŭ 1923, laŭ la nuna leĝo de Usono), aŭ prezenti subskribitan

leteron de la posedanto de kopirajto, kiu donacas la verkon al la publiko. Por enretigi malnovan verkon, oni kutime devas skani la libron, “rekonigi” la tekston kaj provlegi ĝin: tion faras Distribuitaj Provlegistoj de PG <<http://www.pgdp.net>>. Sed por pli moderna verko, kiu plejparte haveblas ankaŭ en elektronika versio, oni devas kontakti la aŭtoron kaj peti la permeson. PG zorge kontrolas formaton, do, se oni laboras pri moderna elektronika libro, oni devas kontroli la formaton, sed supozeble la tekstoj estas sufiĉe seneraraj dekomence.

- Ĉu oni rajtas reprodukti en ajna formo librojn, aperintajn en PG, eĉ por profitaj celoj?

- Jes, libroj, kiuj aperis en PG (krom malmultaj esceptoj), estas tute uzebaj por kiu ajn celo, eĉ por profiti. Ekzemple, oni povas krei filmon laŭ scenaro, kiun oni prenas rekte de teksto de libro en PG, kaj vendi ĝin, se oni tion deziras, kontraŭ milionoj. Eble pli facilas presi libron kun enhavo el PG – tiel oni devas pagi al neniu, kaj oni ja povas profiti (bondezirojn pri tio!). Oni povas krei ankaŭ tradukon de PG-teksto sen timo, ke oni procesos kontraŭ vi.

- Ĉu estas io komuna inter PG kaj eLibrejo? Ĉu iuj libroj de eLibrejo aperas en PG kaj inverse?

- Franko Luin kaj la kontribuantoj al eLibrejo faris bonegan ekzemplon de libera publikverkado, kiu celas la samon kiel PG. Mi fakte ne tute komprenas la kopirajtan situacion de eLibrejo. Teorie, multaj libroj de eLibrejo estos publikigeblaj ankaŭ ĉe PG, kun la permeso de la kopirajt-posedanto. Mi certe invitas eLibrejon kunlabori kun PG: same kiel ĉiuj, eLibrejo rajtas uzi la 17


Esperantaj librojn, kiuj nun estas en PG. Libro en ambaŭ paĝaroj disvastigas Esperanton pli bone ol libro en nur unu, kaj PG estas tre bone videbla aparte al neesperantistoj.

- Ĉu enmetado de libroj en la interreton ne gvidus al tio, ke oni ne plu aĉetus paperajn librojn? Tia estas la situacio pri muziko – ja senpaga apero de E-muziko en la interreto nun kaŭzas grandajn problemojn al Vinilkosmo, kiu pro tio perdas klientojn kaj monon, kaj do se tio daŭrus, Vinilkosmo ne povus reinvesti en la produktadon de E-muziko...

- Jes – kaj ne. Papera libro restas luksa, facile legebla, bela amiko. Mi neniam preferas legi longan romanon sur ekrano. Mi rajtas elprinti libron de PG, sed ofte tio kostas pli, malŝparas paperon kaj estas maloportuna.

Persone, mi uzas PG-on por foliumi librojn, kiujn mi poste aĉetos. Tamen, mi ne pensas, ke ĉiu aŭtoro devas donaci siajn verkojn al PG. Se vi posedas kopirajtojn, kiu donos al vi enspezon, bonvolu enspezi! Tamen, estas Esperantaj libroj, kiujn la aŭtoro aŭ tradukinto kreis pro amo al famo, aŭ al la Movado, aŭ al la libro mem. Ekzemple, Edwin Grobe tradukis multajn rakontojn, kaj neniam atendis monon. Li donacis ilin al PG, kaj nun oni povas legi ses liajn rakontojn per PG. Oni ankaŭ povas aĉeti ilin. Kreintoj deziras, ke oni ĝuu ilian kreaĵon. Oni ankaŭ deziras enspezon; sed iam libro atingos la finon de sia enspezanta vivo. Post tio, aŭtoro povas pensi: ĉu ĝi estos legota per PG senprofite, aŭ ĉu ĝi estos perdita en la mondo senprofite – kion mi preferas?

Mi ĵus aŭdis, ke s-ro Donald Broadribb donacos al la mondo siajn tradukojn de la "Oz"-libroj! Ĉi tiu grandega donaco donos al li grandegan "enspezon" de honoro, se ne



mono. Aldone, estas aŭtoroj, ekzemple Cory Doctorow kaj Eric Raymond, kiuj trovas, ke senpaga haveblo de iliaj libroj tute ne malprofitigas ilin.

- **Kiaj ĝenroj, aŭtoroj, landoj estas plej bone reprezentitaj en PG? Kiu fakte elektas librojn por interretigi?**

- Iu ajn povas elekti librojn, pri kio ajn, kaj elspezi iom da tempo por enretigi ĝin. Estas granda diverseco de libroj: la plejparto estas en la angla lingvo, sed estas centoj da libroj ankaŭ en aliaj lingvoj. Pro la usona leĝo, la plejparto de la libroj estas malnovaj, klasikaj libroj, eldonitaj antaŭ 1923. Estas ankaŭ fikciaj kaj teknikaj libroj. Estas multaj manlibroj de la ĝenro "Kiel fari...". Estas klasikaj libroj en la latina kaj antikvaj anglaj libroj.

- **Kiel homoj, kiuj ekinteresiĝis, povas partopreni en la projekto?**

- Ĉiu rajtas skribi mesaĝon al PG aŭ Distribuitaj Provlegistoj de PG kaj lerni, kiel helpi. Mi estas nur reklamanto, sed se vi interesiĝas, bv. kontakti min ĉe <read@roberttread.net>. Uzi la sistemon de distribuitaj provlegistoj estas la plej facila metodo por helpi, sed ni ĉiam rapide finas la provlegadon de la libroj. Fakte, ni havas



problemon: manko de materialo por provlegi. Niaj du bezonoj nun estas akiri novajn librojn (kaj ni tre deziras ion, kio ne devenas de la angla lingvo), kaj inviti homojn, kiuj pretas lerni kiel aranĝi librojn laŭ la reguloj de PG (kio estas sufiĉe facila por komputilemuoj). Oni devas kompreni, ke Esperantaj libroj en PG estas videblaj al la tuta mondo, kaj, same kiel la Esperanta Vikipedio, ili montras al la mondo nian fortecon. Baldaŭ, eble en 2007, ni havos 50 Esperantaj librojn en PG, kaj Esperanto eniros la liston de aliaj popularaj lingvoj tie. Oni povas imagi 500 librojn; fakte, per traduko de libroj el multaj landoj, mi povas imagi, ke ni havos milojn da libroj en PG dum mia vivo. Mi honeste kredas, ke ĉiu Esperanta libro en PG estas porĉiama donaco al la mondo, kaj argumento ke oni devas lerni Esperanton!

* Johannes Gensfleisch zur Laden zum Gutenberg (inter 1395 kaj 1405 – 1468) – germana metalfaristo kaj inventisto, famiĝis pro siaj kontribuoj al la teknologio de presarto. Tradicie oni nomas lin la inventisto de apartaj tipoj, kio estis granda avantaĝo super la bloktipa presado uzata en Eŭropo tiam (laŭ Vikipedio).

Por ŝatantoj de sudoko

Dmitrij Cibulevskij,
Ukrainio

Bonvolu plenigi liberajn ĉelojn per ciferoj de 1 ĝis 9, tiel ke en ĉiu linio, en ĉiu kolumno kaj eĉ en ĉiu el 9 kvadratoj (3 x 3) ne ripetiĝu eĉ unu cifero.

Respondoj troviĝas sur p. 31.

7		6				9	1
			9	6	7		5
9				4			2
	9				2	1	6
	3	1					8
	7		8		1		5
			3			6	8
1		5	2		9	3	
3	8		4	7			

		4	8		1		5
	2			9		3	
1		5	3			9	
7		2			5		3
	8				7	4	2
4			6	2			7
	4	1		5			6
2				6	4	5	
			1		9		

Loka Agendo 21:

surloka civitana agado

Manfred Westermayer, Germanio

Jam en la 60-70-aj jaroj de la pasinta jarcento aperis pluraj libroj pri la naturmedio kaj la stato de nia mondo, kiel ekzemple *La Silenta Printempo* (1962) kaj *Global 2000: Raporto al la Usona Kongreso* de Rachel Carson, *Raporto al la Roma Klubo** (1977) de Donella Meadows, kaj *Malgranda estas Bela* (1973) de Ernst Schumacher.

Ne nur la ekspluatado de la naturrimoj kaj de la naturo, sed ankaŭ la minaco de atombomba milito, kaj la “duobla moralo”, kiu gvidis al socia ekskludo de kulturaj kaj etnaj minoritatoj, ekzemple samseksemuloj kaj indiĝenoj, instigis la homojn en diversaj landoj fondi neregistrajn organizaĵojn (NRO-oj) kaj Verdajn Partiojn.

Ankaŭ la Unuiĝintaj Nacioj finfine rimarkis la bezonon ŝanĝi la prioritatojn, ĉar natursciencistoj kaj sciencistoj rimarkis, ke la mondo ne nur perdas animalajn speciojn, sed ke ankaŭ la klimato konstante ŝanĝiĝas. La forhakado de la grandega praarbaro de Amazonio por soja agrikulturo kaj viandoherbejoj finfine postlasis dezerton kaj elradikigitajn indiĝenajn arbarojn. Fakte temas pri homfarita ŝanĝo, kaj ne pri natura ŝanĝiĝo.

La Konferenco de Rio

La Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo (konata ankaŭ kiel Tera Pintokonferenco), 1992, en Rio-de-Janeiro, mallonge “la konferenco de Rio”, estis la unua tutmonda okazaĵo por kunlaboro pri limigo de nedezirataj homaj efikoj al nia planedo. Tie ŝtatestroj, UN-respondeculoj kaj amaso da homoj, kiuj aktivis en la koncernaj NRO-oj, diskutis la manierojn solvi la plej urĝajn ekologiajn, ekonomiajn kaj sociajn problemojn alfrontantajn la homaron en la 21-a jarcento. Oni decidis daŭrigeblan – aŭ daŭripovan – agadon, kiu baziĝas sur socia justeco, daŭripovaj ekonomisistemoj kaj protekto de stabila naturmedio. Ĝi estis nomita “Agendo 21” – por la 21-a jarcento (laŭ la okcidenta tempo-kalkulado). Ĝi estis ratifikita de pli ol 178 registaroj. Ĉapitro 28 de tiu

Agendo 21 devigas la registarojn instigi siajn civitanojn al kunlaboro cele al daŭripoveco de la homa mastrumado sur la planedo Tero.

La aalborgaj ĉartoj

La Eŭropa Konferenco pri Daŭripovaj Urboj kaj Komunumoj en 1994 akceptis la “Ĉarton de Aalborg”. Ĝi postulas de la eŭropaj urboj kaj komunumoj, kune kun iliaj civitanoj, prilabori komunuman agoprogramon, la “Lokan Agendon 21”. Depende de la politika sistemo, “simplaj homoj” rajtis aŭ ne rajtis partopreni en la decidoj, kiuj rilatas al iliaj komunumoj; kaj ofte ili estis ekskluditaj pro la (juna) aĝo, (ina) sekso aŭ (margena) socia aparteno; la (viraj) patriarkoj opiniis, ke sole iliaj decidoj gravas kaj ĝustas – sed ofte ili sekvis nur egoismajn celojn. Intertempe multaj urboj ratifikis tiun ĉarton, kaj en 2004 okazis aktualiga konferenco “Aalborg+10”.

Pluraj komunumoj evoluigis Sistemon de Indikilo (akceptita en Seatlo, Usono, en 1998), kiuj ebligas “mezuri”, kiomgrade la bezonoj de la daŭripoveco estas plenumitaj. Sumo-indikilo – “Ekologia Piedspuro” – montras, kiom grandan areon foruzas unuopuloj de diversaj regionoj kaj kiom da planedoj estus bezonataj, se la tuta homaro vivus same, kiel ĝi vivas nun.

Ekzemplo: Frejburgo

La urba konsilio de Frejburgo ratifikis la Ĉarton de Aalborg en 1996 kaj komisiis al la urba administracio evoluigi agado-programon kune kun diversaj asocioj kaj la civitanoj, cele al “Daŭripova Frejburgo”. Pluraj laborgrupoj ellaboras surlokajn agendo-planojn kaj diskutas ilin kun la urba administracio. Unu el la kernoj de la Agendo 21 estas la Pripensejo, kaj la urbestro proponis Frejburgon kiel renkontiĝejon por diversaj asocioj. Tie partoprenas ankaŭ la Esperanto-Grupo, kaj tiel ĝi havas kontaktojn kun multaj asocioj.

Sociala, kleriga kaj kultura agendo

Evoluigi la socialajn aferojn estas ampleksa tasko, kiu efikas sur ĉiujn sociajn kampojn.

Intertempe la partoprenantoj de la Agendo observas diversajn gvidocelojn en la vivo- kaj laboro-interplektiĝo de la civitanoj. Ili invitas kunlabori fakulojn pri lernejoj kaj aliaj klerigejoj, pri porinfana kaj porjunulara agado, kaj ankaŭ fakulojn pri projektoj por laboristoj, virinoj, enmigrintoj kaj senhejmuloj. La celo estas doni ŝancoegalecon kaj partoprenon de ĉiuj grupoj en evoluigaj kaj decidaj procezoj, atingi la socian inkluzivecon de la marginaj grupoj kaj meti la respondecon rilate venontajn generaciojn kaj naturon kiel devigan kondiĉon en ĉiujn urbajn evoluplanojn – same kiel en Porto-Alegro (Brazilo) oni komencas pli influigi ĉiujn civitanojn en la urban buĝetoplanadon (temas pri la t.n. Civitaneca Buĝetopropono). Ekde 1989 pluraj miloj da civitanoj kunsidas en la urboparto de Porto-Alegro, diskutas la prezentitan urbo-raporton kaj proponas prioritatojn. Tiel oni klopodas eviti, ke la buĝeto ĉefe utilu nur por la riĉaj kaj influhavaj grupoj; lasante malriĉajn kvartalojn subevoluintaj.

Seksa demokratio

La seksa demokratio signifas ebligi la partoprenon de virinoj en ĉiuj ekonomiaj, ekologiaj kaj socialaj decidoprocezoj, ekzemple:

- Egalrajta partopreno de virinoj en **la urba politiko**, kio signifas, ke la partioj en la urbaj konsilioj konsistu el virinoj kaj viroj similkvante. Ekzemple, la Verda Partio ekde sia komenco metas sur la elektolistojn alterne virinojn kaj virojn.

- **Urba kaj regiona planado**, kiu plenumas virinajn bezonojn, kiel:

- kvartalaj strukturoj por infanvartejoj kaj infangardenoj;

- survoja sekureco kontraŭ perforto, kiel lumigitaj trotuaroj, noktaj busoj – ankaŭ por gejunuloj – kiuj veturigas homojn proksime al iliaj loĝlokoj.

- Justa partopreno de ambaŭ seksoj en **ĉiuj laborkampoj** kaj sur ĉiuj niveloj, ne nur en la fakoj jam klasikaj por ili, ekzemple, edukado kaj klerigado.

- Egalrajta partopreno en **la kultura vivo**.

Areo kaj rimeadoj

La urba administracio (de Frejburgo – Red.) starigis oficejon, kiu organizas la partoprenon de la civitanoj kaj NRO-oj rilate la urbevoluigan agadon pri uzado de areo kaj rimeadoj. Ĝi ellaboras konceptojn por daŭrigebla urba evoluo laŭ la postuloj de la Agendo 21 kaj laŭ la jenaj premisoj:

- La urbo kaj la ĉirkaŭa regiono formas komunan vivareon.

- La rilato inter urbocentro kaj urboparto estu en bona ekvilibro.

- La integreco de la urboparto estu konsiderata.

- Trafiko- kaj pejzaĝoplanado apartenas al la urboplanado.

- Permanentaj kostoj de la infrastrukturo (stratoj, publika trafiko, akvomastumado) estu konsiderataj pli severe, aparte kiam temas pri la plivastigo de la urbo.

- Oni evitu hejtokostojn pere de energiefika (re-)konstruo de la konstruaĵoj.

Trafiko

Moviĝi de unu loko al alia apartenas al la bazaj homaj bezonoj. El la diversaj bezonoj kaj la celo al daŭripovo sekvas la jena orientiĝo:

- Partoprenigi la civitanojn en la trafik-evoluiga planado.
- Preferi novajn metodojn de la veturado, kiu nuntempe estas dominata de vira individueco; en busoj ja kutime pli oftas virinoj.
- Plibonigi la allogecon de la publika transporto.
- Fleksebligi la uzadon de aŭtomobiloj, ekzemple, instigi al komuna uzado de aŭtoj.
- Sekurigi la vojojn por piedirantoj kaj biciklantoj, kaj aparte por la infanoj, pere de rapid-dec-limigo en la loĝkvartaloj kaj apartaj biciklovojoj.
- Malpliigi la bruon kaj la nocajn gasojn de la trafiko.
- “Senvestigi” la statusan valoron de imponaj limuzinoj, ĉar ili troe forvoras la aeron kaj la rimedojn.

Natura kaj akva agendo

La temo “akvo kaj homo” estis grava jam en la antikvaj tempoj; oni ĉiam instalas oficialajn instancojn por gardi la akvoprovizon kaj kvaliton de akvo; sed ĉiam ili devas lukti kontraŭ la senzorgeco de la individuoj aŭ firmaoj rilate la eksterajn rimedojn, kiel akvo, aero kaj tero. Kvankam en la regiono pieddistance de la Nigra Arbaro en suda Germanio estas sufiĉe da akvo, oni devas zorgi por ke ĝi restu pura kaj daŭre restu loĝloko por la bestoj; kaj la Agendo 21 gvidas la distriktajn administraciojn kontroli la plenumon de la striktaj reguloj por surloke kaj tutmonde gardi la akvon.

Tio signifas la plejblan renaturigon de fluantaj akvoj kaj zorgon, ke ili restu kvazaŭ nature puraj. Aparte forĵetado de rubaĵo ĉirkaŭ akvofluejoj estas severe punata, ĉar tiu rubaĵo dum niaj modernaj tempoj ofte konsistas el plasto kaj aliaj materialoj danĝeraj por la akvobestoj kaj birdoj (paroli pri la estetiko el la homa vidpunkto estas malgrave ĉi-rilate). La enverŝado de malpurigitaj akvoj aŭ eĉ venenaj likvaĵoj flanke de firmaoj estas persekutata kiel krimo.

Tio ankaŭ rilatas al:

- la fekundigo de la kampoj fare de la kamparanoj;
- la planado de akvogeneratoroj, por ke oni konstruu fiŝoŝtuparojn kaj lasu sufiĉe da akvo post la digo por diversaj akvobestoj;
- la konstruo de domoj ĉe la akvo-rando;
- bremsado de la erozio kaj dezertiĝo, ĉefe pro senrespondecaj agrikulturaj teknikoj, sed tio rilatu ankaŭ al tia organizado, ke la turistoj ne deflankiĝu de piediraj padoj.
- La planado celu ankaŭ malpliigi la severecon de akvokatastrofoj je inundoj.
- Finfine mastrumi la akvon en kaj ĉirkaŭ la domoj, kiel ekzemple ne malŝpari trinkakvon kaj eble kolekti pluvakvon.

Unumonda agendo

La tutmondiĝo signifas i.a., ke nia konsumo rekte rilatas al la ekspluatado de la kamparanoj kaj de la naturo. La tutmonda ekonomio bezonas barojn kontraŭ tia (troa) ekspluatado;



WIKIPEDIO

Frejburgo, Germanio

tio signifas, ke necesas starigi bazajn, homrajte adekvatajn laborkondiĉojn, pri kio devus zorgi ILO (Internacia Labor-Organizo, instanco kadre de UN) kaj eble poste tion traktos nova tutmonda sindikato. Sed ankaŭ ni mem havas ĉi-rilatajn taskojn:

- Subteni la pripensitan konsum-konduton rilate ekologiajn kaj socialajn normojn de la produktado kaj vendado de varoj; ekzemple, preferi produktojn kun sigelo, kiu garantias la socialan kaj ekologian kvaliton de la produktad-maniero (ekzemple, sigelojn FSC aŭ MSC **).
- Subteni la klerigon rilate nian interplektitecon en la mondo.
- Ebligi dignan vivon por fremduloj en nia urbo.

- Uzadi urbopartnererecojn (urbo-ĝemeliĝojn) por interŝanĝi ideojn rilate la Agendon 21. Ekzemple, ekzistas laborgrupoj en lernejoj kaj asocioj, kiuj organizas vendejojn por varoj, praktikante Justan Komercan, kaj vendas laŭtemajn librojn. En Frejburgo ili kreis kafo-markon *Freinica* kunlabore kun kafokamparanoj en la partnera urbo Wiwili en Nikaragvo.

Finaj komentoj

Kompreneble, ni ĉiuj havas nur limigitajn eblojn fari ion alian krom niajn tute personajn ĉiutagajn devojn. Tamen al moderna homo “apartenas” la aktiva civitaneca kunlaboro. Ĉu en asocio por defendi la homajn rajtojn, ĉu en naturprotektata asocio, ĉu en kvartala civitana grupo, ĉu en partio; ĉu finfine en la laborloko mem. Mi donas kelkajn ret-adresojn, sed serĉu ankaŭ mem.

* plena nomo: *Limits to Growth: A Report for the Club of Rome's Project on the Predicament of Mankind* – *Limoj de kresko: raporto por la projekto la Roma Klubo pri la malfacilaĵoj de la homaro*; la Roma Klubo estas internacia neregistara organizo, kreita en 1968, kiu faris grandan kontribuon en la studado de biosfero kaj propagando de ideoj pri harmonio inter la homoj kaj la naturo – Red.

** FSC (de la angla) – Arbarprizorga Konsilio (*Forest Stewardship Council*) – organizo, kiu okupiĝas pri mastrumado de arbaroj laŭ daŭripova kaj ekologiama maniero. MSC: (de la angla)

– Marprizorga Konsilio (*Marine Stewardship Council*) – organizo, kiu okupiĝas pri fiŝkaptado sen detrui la ekologion de la maro, kaj evitas la kaptadon – kaj dronigadon – de maraj mamuloj, kiel delfenoj.

<Legu>

Germanaj retejoj: <www.treffpunktfreiburg.de/agenda21> (Frejburgo); <www.fest-heidelberg.de> (Germanio, evangelia studgrupo); <www.lfu.baden-wuerttemberg.de> (Germanio, Agendo 21 en Baden-Virtembergo, apliko de 24 Indikiloj); <<http://berlin21.net>> (Agendo 21 en Berlino)

Internaciaj retejoj: <www.un.org> (UN-hejmapaĝo, Jarmilaj celoj (*Millenium Goals*) similas al Agendo 21 – araba, ĉina, angla, franca, hispana, rusa); <www.unep.org> (mediprogramo de UN, serĉu “Agenda 21” – angla, franca); <www.foeeurope.org> (Amikoj de Tero – angla); <www.iclei.org> (Internacia Konsilio pri Lokaj Medirilataj Iniciatoj – angla); <www.iclei.org/index.php?id=global-programs> (pli pri Agendo 21 – angla); <www.ipcc.ch> (UN: Interregistara Spertulgrupo pri la Klimat-Ŝanĝiĝo – UN-lingvoj); <http://ec.europa.eu/environment/news/efe/14/article_276_de.htm> (ĵurnalo *Umwelt für Europäer* – hispana, germana, angla, franca, itala); <www.climatic-suisse.ch/spip.php?rubrique41> (Klimatoprojektoj por Gelemantoj – germana, angla, franca, itala); <www.fedre.org> (Eŭropa fondaĵo por Daŭripova Disvolviĝo de la Regionoj – germana, angla, franca, itala, rusa, serbokroata); <www.eco-label.com> (montras la energikonsumadon de elektraj aparatoj – multlingva); <www.agir21.org> (Agendo 21 – Genevo – franca); <www.agir21.org/flash/empreintecoweb/loadcheckplugin.html> (via ekologia Piedspuro, de Genevo – franca)

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo estas sekretario de Asocio de Verduloj Esperantistaj <www.com-link.apc.org/ave/welcome.htm>.

Anna Politkovskaja:

Ŝia vivo estis batalado, ŝia morto – venko

Indiano, Rusio

“Anna Politkovskaja, ĵurnalisto – plej fama, plej kuraĝa, plej... mi ne povas aldoni ion ĉar mi estas vere ŝokita. Hodiaŭ en Moskvo ŝi estis murdita. Ŝi ĉiam skribis kaj diris la veron. Niaj aĉaj politikistoj malamegis ŝin! Jen, ŝi jam ne estas viva...” – tiujn vortojn mi dissendis al miaj amikoj perrete, alvokante al aktivaĵo memore al Anna. Ĝi okazis dum sekva tago en Moskvo.

Kion mi faris? Kompreneble, mi aliĝis al tiu kunveno. Krome mi enskribis en la “Viva ĵurnalo”... ne, mi skribis nenion – simple aldonis foton de Anna sen iuj vortoj. Tute similan aferon faris miaj virtualaj amikoj ĉe <http://dmitry-kokorev.livejournal.com/>. Ĉiuj homoj estis ŝokitaj okaze de la murdo.

Morto de Anna estas sufiĉe klara ekzemplo de reala situacio en Rusio. Homoj de la

tuta mondo ekvidis tion, kion nia ŝtatestro ne volis montri. En Rusio neniam ekzistis vera stabileco, nek sendanĝereco, estimado de la homaj rajtoj, socia justeco... kaj bonaj politikistoj.

“Murdo de Politkovskaja faris pli da malbonaĵoj por Rusio ol ŝiaj artikoloj”. Nekredeblas, sed tiujn vortojn diris prezidento de Rusio Putin. Li estis forte kritikata de Politkovskaja, kaj ŝia morto estas fakte “profita afero” por li kaj lia Sistemo.

Murdoj, malaperado de homoj, kriminalaj aferoj de militistoj – kaj la registaro de Rusio respondencis pro tio, laŭ la opinio de Politkovskaja. Ŝi skribis pri tio sentime. Eĉ senrigarde, ke gazetaro de Rusio timis eĉ paroli pri tio. Situacio en respubliko Ĉeĉenio estis la plej grava temo por Anna Politkovskaja. Ŝia lasta artikolo – pri torturoj en Ĉeĉenio, kiun ŝi ne finis – estis publikigita dank’ al kolegoj de Anna...

Anna esploris la plej famajn teroristajn atakojn en Rusio. Kiam Putin fariĝis prezidento, okazis serio da teruraj teroristaj atakoj en Rusio. Centoj kaj centoj da homoj estis mortigitaj en ili. Sed neniu en la ŝtatestro estis oficiale akuzita aŭ punita. Kiam en Beslano (malgranda urbo en



WIKIPEDIO



Kaukazo) centoj da infanoj trafis manojn de teroristoj, ŝi tuj ekveturis al Beslano, sed estis perforte haltigita de sekretservanoj. Ŝi regule skribis artikolojn pri la situacio en diversaj plej problemaj rusiaj regionoj. Faktoj en ŝiaj artikoloj estis preskaŭ nekredeblaj. Tre malfacilis kredi, ke tio eblas en la nuntempa Rusio.

Kolegoj-ĵurnalistoj, kolegoj-defendantoj de la homaj rajtoj ne sukcesis gardi ŝin. Ŝi estis kuraĝega ĵurnalistino, disidentino, batalanto por justeco. Bedaŭrinde, en sia batalado kontraŭ la Murdema Sistemo, ŝi restis sola. La sepan de oktobro ŝi jam ne revenis de sia lasta batalo. Sed eĉ ŝia nereveno estis venka, kiel kutime...



Dum la funebro

Mistero: vitro, kiu venas... el la kapo?

Navin Lal S'restha, Nepalo

Sarita Bista studas en mezlernejo de la urbo Tikapur (regiono Kailali), kiu troviĝas preskaŭ 800 km sud-okcidente de Katmanduo, la ĉef-urbo de Nepalo. Tiu ĉi 12-jara knabino ĉiu-tage el-puŝas unu malgrandan pecon de vitro el sia kapo.

Ĉu vi kredas tion? Eble ne! Sed tio vere okazas. Tio ne estas el-pens-aĵo. Tio estas vera **mistero**, kaj tio okazas ĉiu-tage. La peco de vitro estas ĝis kvin **centimetrojn** longa, kaj ĝi faras **vundon** en ŝia kapo, kiam ĝi eliras. Tio ankaŭ multe doloras, kaj eliĝas sango. Tamen la sangado sen kuraciloj ĉesas en mallonga tempo. Antaŭ du jaroj ŝi **svenis**, kiam ŝia kapo ne-atendite elpuŝis pecon de vitro.

Oni kolektis jam pli ol ducent pecojn de vitro el la kapo de la knabino. La pecoj estas malmolaj, tra-vid-eblaj kaj rompeblaj, same kiel kutima vitro. La sango-ekzameno en Nepalgunj, Nepalo, kaj en Lucknow, Hindio, kune kun **tomografio** montras,

ke ŝi fartas bone, sed ŝi kaj ŝiaj gepatroj kaj geamikoj zorgas, kiel haltigi ŝiajn suferojn: ili ne scias, kial tio okazis kaj ĝis kiam ŝi devas suferi...

Ĉi tiu nekutima historio, kiu venis de esperantisto el Nepalo, ne povis ne vekti nian intereson – kaj emon esplori pli. Rezulte ni trovis multajn artikolojn pri tiu ĉi knabino en pluregaj diverslandaj gazetoj kaj ĵurnaloj. Tamen, ni ne sukcesis trovi sciencan kaj medicinan klarigon pri la afero – Red.

centimetro – 0,01 m

mistero – (ĉi tie) – io ne klarigebla

sveni – por iom da tempo perdi konscion (t.e. senperan scion,



kiun la menso havas pri siaj statoj)

tomografio – tre detala medicina esplorado, per specialaj radioj, kiu donas detalan bildon pri la korpo

vundo – ekzemple, se oni tranĉas sin, oni faras vundon



Facila

Kun la patrino

La patrino, kiu oferas simplajn brakumadojn

Daniele Binaghi, Italio

Antaŭ unu semajno mi akceptis inviton de geamikoj por iri kun ili al speciala renkontiĝo en Sesto San Giovanni, en la ĉirkaŭaĵoj de Milano (Italio), por renkontiĝo kun Amma, la “Patrino” de la brakumadoj.

Amma* estas filino de simplaj fiŝkaptistoj el Kerala, suda Hindio. Ekde kiam ŝi estis junega, ŝi mirigis ĉiujn per siaj profundaj dediĉeco kaj meditado, kaj pasigis grandan parton de sia tempo helpante aliajn malriĉulojn kaj spontanane brakumante ilin. Kompreneble, tio kaŭzis multe da problemoj en ŝia lando, kie strikta kasta sistemo regas la rilatojn inter malsamnivelaj homoj; tamen, Amma neniam zorgis pri tio, kaj ŝi daŭre akceptis kiun ajn por doni brakumadon, kelkajn ĝentilajn vortojn, kelkfoje florpetalon aŭ bombonon.

Nuntempe, ŝi ĉiujare vojaĝas al aliaj landoj kaj kontinentoj por renkonti la homojn, kiuj ŝin adoras kiel sanktulinojn, kelkfoje kiel diinon. Ŝi vizitas ankaŭ Eŭropon, kaj dum la restado en Italio mi renkontis ŝin. Mi vicis, kiel ĉiuj, por preni numeron, kaj atendis: estas tiom multaj homoj, kiuj deziras alproksimiĝi al ŝi (ŝi jam donis pli ol 25 milionojn da brakumoj!), ke oni devis starigi sistemon por ordigi kaj faciligi la aferon; do vi atendas, kaj kiam vi vidas, ke via numero estas proksima, vi iras al iu renkontiĝa punk-

to, kaj denove atendas; post iom da tempo vi atingas la zonon, kie oni devas promeneti surgenue, ĉar viaj piedoj ne devas “rigardi” al la sanktulino. Kiam vi troviĝas nur kelkajn metrojn for de ŝi, ŝiaj asistantoj donas al vi papertuketon por purigi vian vizaĝon, kolektas la florojn aŭ aliajn oferojn, kiujn vi estas portanta, kaj fakte puŝas vin al ŝi. Ŝi metas vian kapon ĉe la dekstra ŝultro kaj brakumas vin, tuŝante vian vangon per la sia (tiom multe ŝi jam faris, ke ŝi nun havas malhelan makulon sur la vango); kaj ŝi diras ion al vi, kaj eĉ se vi ne komprenas kion ŝi diras, ĉar ŝi parolas sian gepatran lingvon, vi tamen komprenas, ke ŝi estas parolanta kun vi, kaj ke tiuj vortoj en tiu momento estas por vi. Kelkajn sekundojn, kaj poste vi jam devas lasi la lokon al la sekva homo, sed ne antaŭ ol ricevi iun donaceton kaj revidi ŝian rideton.

Kiam oni demandis al ŝi, kiu en ŝia lando estas konsiderata kiel Mahatmo (Granda Animo), pri ŝia dieco, ŝi klarigis: “Mi jam donis min al la mondo antaŭ multe da tempo. Mi estas tio, kion ĉiu homo deziras vidi en mi. Mi mal-multe interesiĝas pri tio, kiel homoj vidas min. Mi vidas la aliajn ekzakte same kiel mi vidas min mem en la spegulo. Dio? Ĉiukaze mi ne kredas je Dio sidanta sur nuboj en Paradizo. Mia Dio estas tiuj ĉi homoj. Mi kredas, ke mi amas ilin kaj ke mi estas ĉi tie por ili. Se ili vidas min

Fakte

Amma aktive partoprenas multajn gravajn internaciajn eventojn kaj ricevis multajn premiojn pro sia paca agado. Ekzemple, en 2002 en la Ĝenerala Asembleo de UN ŝi ricevis premion pri Senperforteco, kiujn antaŭe ricevis Kofi Annan kaj Nelson Mandela.

Amma foje brakumas pli ol 50 mil homojn tage (!), kaj foje ŝi sidas brakumante ĉ. 20 horojn tage.

La filmo pri Amma “*Darŝan* – La Brakumo” (reĝisoro – Jan Kounen) estis montrita en la fama filmfestivalo en Kanno.

Amma estas konata ankaŭ pro ĉantado de tradiciaj hindaj ĉantoj; ŝi mem komponas ilin kaj ĉantas en pli ol 30 lingvoj.

Krom konstruado de hospitaloj, orfejoj, ŝirmejoj, domoj (ŝi intencas konstrui 100 mil domojn por malriĉuloj) ktp., en multaj centroj de Amma en Usono volontuloj preparas vegetarajn supojn por malriĉuloj – tiaj centroj nomiĝas “La patrino kuirejo”.

Septembre 2005, Amma donacis milionon da usonaj dolaroj al la fonduso *Bush-Clinton* por helpi al la viktimoj de la uragano Katrina, kaj en oktobro 2005 ŝi sendis milojn da kovriloj por la viktimoj de la tertremo en Kaŝmira regiono. (el Vikipedio)



© M. A. CENTER

kiel Dion, eble mi estas ilia bildo de Dio”. Kaj kiam oni demandis ŝin: “Kion vi konsilas al la homoj? Kiu estas la ĉefa instruado, kiun vi prezentas?”, ŝi respondis: “Dio estas amo kaj kompato, kaj tiuj ĉi estas la kvalitoj, kiujn la mondo vere bezonas. Tiom multe da homoj ne estas amataj. Kompato estas kapablo pardoni la aliajn. Kiu el ni neniam eraris?”

Demandante al aliaj ĉeestantoj, kion ili sentas kiam ili estas apud Amma, preskaŭ ĉiuj diris, ke ili sentas grandan energion, grandan trankvilecon, kvazaŭ ripozigan senton; kaj kiam mi demandis, kial ili estis tie, ĉu nur por renkonti Amma-n aŭ ne, oni respondis al mi, ke jes, la proksimeco estis grava parto, sed multaj ankaŭ deziris redoni ion al Amma pro ŝia granda amo, kaj ne havante multe da mono por ŝiaj projektoj, ili deziris helpi per siaj manoj.

En Parayakadavu, ŝia naskiĝloko, ekzistas la *aŝram*** de Amma, la spirita centro kaj samtempe la ĉefa sidejo de tio, kio jam fariĝis giganta socia organizo; pli ol tri mil homoj el la tuta mondo loĝas tie, kaj de tie oni organizas kaj kunordigas la multnombrajn homamajn projektojn: Amma helpegis milojn da homoj okaze de natur-tragedioj, kiel la tertremo de Guĝarato en 2001 kaj la cunamo de 2004 en sudorienta Azio, ŝi daŭre helpas al

malriĉuloj, malsanuloj, maljunuloj, forlasitaj virinoj kaj orfoj; kaj ŝi jam konstruigis dekmilojn da domoj, plurajn malsanulejojn kaj lernejojn, eĉ universitaton. Kaj ŝi petas nenion. Ho, jes, vi povas lasi monferon, aŭ pli bone rekte iri por helpi per viaj manoj, sed ŝi brakumos vin ĉiukaze, sen diferencoj inter vi kaj la aliaj. Kiam oni demandis ŝin, kie ŝi povas trovi energion por helpi al tiom multe da homoj kaj samtempe konstrui kaj zorgi pri tiom granda socia organizo, ŝi simple respondis: “Se vi vere sentas amon al tio, kion vi faras, nenio iam lacigas vin”.


* ŝia vera nomo estas Mâtâ Amritanandamayî Devi, “amma” signifas “patrino” en la dravida lingvaro

** *aŝram* (ne N.PIV-a) – de la sanskrita “*aaśraja*” – protekto, estas spirita centro, aŭ ermitejo, en Hindio, kie saĝuloj vivis (kaj vivas) en paco kaj trankvileco, plenumas spiritajn kaj fizikajn ekzercojn (kiel jogon), kaj instruas.

<Legu>

Por ekscii pli pri Amma kaj pri ŝiaj projektoj kaj por helpi aŭ simple renkonti ŝin, oni povas serĉi informojn en la retejoj <<http://www.amritapuri.org>> kaj <<http://www.ammachi.org>> (angle). Estas ankaŭ multaj diverslingvaj artikoloj en Vikipedio <www.wikipedia.org>.

Malgraŭ suferoj – ami!



Estas tre malfacile trovi sian veran amon – kaj centoble, miloble pli malfacilas trovi sian “duonon”, se oni estas handikapito... La suba vera historio temas pri amo, sindediĉo kaj sinofero – kaj ĝi refoje pravas, ke amo venkas ĉion!

Etsuo Miyoshi, Japanio

Laŭ la libro “La vivo, barakta sufero” de Yasuo Mitani, 50-jaraĝa. Swany Novaĵoj, januaro 2006

S-ro Mitani tuj post sia naskiĝo suferis cerboparalizigon, kiu trafis liajn kvar membrojn kaj kaŭzis parolperturbon. Tamen li akiris radio-amatoran inĝeniercon, komputilan licencon, praktikan diplomon pri la interreto kaj multajn aliajn kvalifikaĵojn. Krome, li estas estro de la Rulseĝ-Vojaĝa Asocio de Kagaŭa.

Lia malklara prononco apenaŭ kompreneblas, sed elstaras lia intelekta kapablo, kaj iel li veturigas elektran rulseĝon kaj povas manipuli komputilon per unu stango simila al manĝ-bastoneto. Lia maldekstra mano tute ne moviĝas, kaj li bezonis neimageblan tempon por elpensi metodon uzi komputilon nur per la dekstra mano. Se li faligas la stangeton, li devas

atendi horojn ĝis kiam iu preterpasos.

En iu somero, kiam li estis bebo, li perdis la konscion, kiam longa serpento glite malsupreniĝis de la centro de moskita ret-kaĝo pendants de la plafono kaj volvis sin ĉirkaŭ lian senmovan kolon. Lian krion aŭdis la gepatroj, kiuj laboris en proksima kampo; ili savis lian vivon. Ankaŭ, kiam lia elektra rulseĝo enkreĉiĝis ĉe fervoja transirejo, hazarda preterpasanto apenaŭ sukcesis savi lian vivon.

Nun li vivas en publika handikapulejo *Maŝimizuso*, kie ĉirkaŭ la 5-a komenciĝas lia tago “per vindaĵ-ŝanĝo”. Deĵorantoj kuŝigas lin sur korpo flanko, almetas urinujon kaj fine viŝas la pubon. Poste, tenante liajn brakojn, ili enrulseĝigas lin kaj, alŝnurinte liajn kruojn por eviti falon, vestas lin. Post ĉio ĉi lia tagtasko estas sidi ĉe komputilo, sen kiu lia vivo estus kvazaŭ morto.

Antaŭe li luktante povis manĝi mem, sed nun deĵoranto ĉion mem manĝigas al li. Nur post plena mobilizo de lango, buŝo, gorĝo, kolo kaj brakmuskoloj, manĝaĵoj enbuŝiĝas. Li penas, disĵetas, malpurigas, tute ne sentas guston. Iam inter liajn dentojn enpenetris kulero, kaj kiam la helpanto subite tiris ĝin, dento elfalis.

Ĉi tie mi citas liajn frazojn.

“Mi estas favorato de virinoj. Tio ne estas mensogo. Ial, ĉu mi ekscitas ilian patrinan instinkton? Mi disdiras spritaĵojn kaj ankaŭ volonte debatas pri seriozaj aferoj. Partneroj foje eksplodas per rido, foje ĉagreniĝas pro malvenko en argumentado. Tia virino devas viŝi la ŝviton kaj enbuŝigi manĝaĵojn al sia venkinto. Ĉu ŝi tiam sentas kuriozan inan feliĉon? Al virinoj sen tia inklino, nun furiozaj, mi pardonpetas. Kvankam mi estas biologie viro, virinoj eble sentas ke nefunkcipova mi estas sekurega?”

Mi havas normalan generan funkciadon, kaj mi deziras scenejon por tion plenumi. Mi intimis kun unu volontulino kaj enamiĝis al ŝi, sed “mi ne rajtas enkapti ŝin per ĉi tiu handikapa korpo”, do mi ne povas ami ŝin ĝuste pro mia amo; tian dilemon mi havas. Ĝin pliakrigas la penso, ke “dum la flegado, iam disrompiĝos ŝia amsento”.

Ŝi iun tagon edziniĝis kaj foriris malproksimen. Mi frakasigis pro perdita amo, kaj provas ĉion forgesi per sindediĉo al komputilumo. Mi korfunde deziras, ke iam iu amu min, se iu virino akceptus tiun ĉi mian korpon.”

“S-ro Yasuo Mitani edziĝis”, Swany Novaĵoj, julio 2006.

Saluton, s-ro Yasuo Mitani. Iom abrupte, mi estas Etsuo Miyoshi, prezidanto de Swany Corp. Fine de la lasta jaro mi legis vian libron “La vivo, barakta sufero”, mi ege emociiĝis pro via pacienco, klopodoj kaj ĝentileco. Do, mi aĉetis 30 librojn kaj disdonis ilin al centoj da japanaj laboristoj en Ĉinio, Usono kaj Japanio.

Mi preĝas ĉiumatene je la sesa kaj duono en Oomoto-sanktejo, kaj mi preĝadis al dio: “Bv. donu al li bonan amatinon”. Antaŭnelonge mi aŭdis de via patrino, ke vi edziĝis, kaj mi treege feliĉas pro tiu novaĵo. Mi gratulegas vin. Nun, dum mi skribas tiun ĉi mesaĝon, el miaj okuloj fluas larmoj.

Antaŭ multaj jaroj via patrino verkis pri siaj spertoj pri vi, kaj mia kompatema patrino, leginte tion, skribis kuraĝigan leteron al ŝi. Ĝus nun mi aŭdis tion de via patrino telefone. Niaj destinoj ŝajne estas interligitaj.

Se vi libere povus skribi tekston, bv. informi min pri via nuna vivo, ekzemple, pri feliĉaĵoj de geedziĝo aŭ pri via budheca edzino, por sciigi al niaj laboristoj. Ĉar ĉiuj legantoj de via libro subtenas vin kaj vian edzinon.

Mia dekstra gambo ne bone funkciis pro poliomjelito tuj post naskiĝo, do dum 66 jaroj mi trouzis la maldekstran gambon. Antaŭ kelkaj jaroj ĝi malfortiĝis, kaj ekde lasta junio mi devas uzi rulseĝon. Sed, feliĉe, mia stato estas pli bona ol la via, do mi sola flugas al Ĉinio, Eŭropo kaj Usono ktp., libere per mia rulseĝo.

Bonvolu pardoni la egan abruptecon, sed mi skribas al vi por gratuli, kaj mi volas elkore kuraĝigi vian noblan edzinon. Ĉi-kune mi sciigas mian nunan situation kaj memklarigon.

S-ro Etsuo Miyoshi,
la 12-an de julio 2006

Saluton, mi ege dankas vin pro via ĝentila retmesaĝo.

Min ege kaj forte impresis, ke, antaŭe ne renkontita, vi preĝadis por mia feliĉo. Mi elkore dankas vin. Danke al via prezidanta preĝado, dio akceptis, kaj mi renkontis senkompare amantan edzinon. Plie – ankaŭ du filinojn samtempe!

Fakte, la pli aĝa filino membras en ĥoro

de gestparolo, kaj ŝia instruisto uzas miajn poeziajn verkaĵojn, do tiel mia onta edzino eksciis pri mia ekzisto. Ankaŭ ŝi travivis ĉiujn malfeliĉojn ĝis nun. Dum infaneco ŝi ne ricevis amon de la patrino, kaj ludis plektante florojn kaj herbojn de la kampoj kaj montoj. Dum la lerneja tempo ŝi bezonis ĉiutage engutadon pro suspekto de leŭkemio. Post geedziĝo ŝi perdis bebon pro akcidento, ricevadis perforton de sia edzo, krome ŝia patro mortis, kaj la edzo forprenis ŝian heredafon. Ŝi ne povis elteni lian perforton kaj divorcis de li. Dum ŝi malespere zorgadis pri siaj du infanoj, ŝi renkontis mian poemon "Mirakla Povo", kiun ŝi kantadas dum sia laboro.

Iom poste mi aperigis la libron "La vivo, barakta sufero", kiun ŝi ekkonis per la interreto, kaj ni konatiĝis (ŝia nomo estas Ikuyo Sano, ni ankoraŭ ne registris la geedziĝon). Ĉiutage ni komuniĝas per komputilo kaj portebla telefono, unu- aŭ dufoje semajne ŝi ŝoforas 40 minutojn al mia handikapulejo. Tio daŭras ĝis nun.

Ankaŭ la du filinoj amikiĝis kun mi, do mi volas loĝi kun ili, sed ankoraŭ kelkaj baroj restas superendaj.

Plie, ŝi prizorgadas la demencan patrinon, zorgas pri la du filinoj, kaj interrilatas kun mi, problema handikapulo; Ikuyo korprofunde respektas min. Interalie, ŝi diris, ke "mi sentas, ke mi naskiĝis por feliĉiĝi vin", kaj brakumas min per sia malgranda korpo. Mi senhezite proponis geedziĝon al ŝi, kiu fiksrigardis min per plenlar-maj grandaj okuloj. Poste, tagon post tago, mi pligrandigos mian senton ke "prefere mi devas feliĉiĝi Ikuyo-n". Mi senpacienas, sed neniel povas helpi ŝin.


Nu, Ikuyo, kiu de infaneco intimiĝis kun floroj, por nia geedziĝo okupas sin serioze pri floraranga laboro. En via urbo ŝi malfer-

mis kunsidojn kelkfoje, kiujn multaj geamikoj partoprenis. Ŝi ankoraŭ petis fari en kuka butikoj nuptan angulon, kie ŝi volas ekspozici kaj vendi buketojn kaj memordonaĵojn. Mi esperas, ke se tio glate iros, nia vivo stabiligos. Aliflanke, tiam malmultiĝos tempo por vidi min, kaj ni multe lastatempe retroŝte diskutas, ke ŝi bezonas fortan helpanton.

Iom longe mi klarigis, kia estis nia renkontiĝo kaj kia estas la nuna situacio.

Mi profunde dankas vian ĝojigan retmesaĝon, ankaŭ Ikuyo tre ĝuis ĝin.

S-ro Yasuo Mitani,
la 14-an de julio 2006



Arto ami: arto feliĉi

Johán Valano, Svislando

Ĉu amo ekzistas? "Kompreneble, amo ekzistas!", vi eble tuj respondos, mire pri tio, ke iu havis la eksterordinaran ideon starigi demandon pri io tiel certa. Kaj tamen! Ofte oni parolas pri amo, kiel pri aĵo. Aĵo, pri kiu multo estas neklara. Neniam sam-lingva plen-kreskulo demandis al mi, montrante glason: "Ĉu tio vere estas glaso?", aŭ la sunon: "Ĉu tio vere estas suno?" Sed ofte okazis, ke junulinoj, post longa rakontado pri knabo kaj pri si, demandis min: "Ĉu tio estas vera amo?", kaj la saman demandon vortigis al mi junuloj, tuj post kiam ili priskribis, kiajn sentojn knabino estigas en ili.

Kial oni ofte sin demandas, ĉu tio, kion oni travivas, estas vera amo aŭ ne? Ĝuste pro tio, ke amo ne estas io, ne estas afero facile priskribebla, kiel glaso aŭ suno. Amo ne estas io, kion oni havas. Ĝi rilatas, ne al havo, sed al esto. Ami estas maniero esti. Maniero esti, kun iu, en rilato malsama ol la rilato kun aliaj personoj. Eble eĉ estus pli ĝuste

diri: maniero vivi, maniero travivi la momenton kun la alia, aŭ sen li aŭ ŝi, maniero senti, senti en si ion ege gravan, kion ni ne povas facile superforti, maniero pensi pri la alia, kiam li aŭ ŝi forestas.

Ĉar amo estas afero de esto, ne de havo, ĝi malsamas laŭ la persono. Via maniero ami ne estas mia maniero ami. Via amo kaj mia amo estas malsamaj, ĉar ni estas malsamaj. Kaj pro tio ke ni estas malsamaj, kaj amo estas maniero rilati, ami ofte kaŭzas malfacilaĵojn. Ŝi kaj li estas du malsamaj personoj, ŝi amos iumanier, li amos alimaniere, nur tiel povas esti. Kiom kaj kiel unu amas, tio ne povas esti sama kiel tio, kiom kaj kiel amas la alia, kaj la faroj, per kiuj la amo eksteriĝas, malsamas laŭ la persono.

Tial ami estas arto. Arto feliĉiĝi sin per agoj, kiuj celas feliĉiĝi la alian, kaj kiuj – ĉar per provo post provo oni komprenis, kion fari – pli kaj pli sukcesas. Necesas lerni, kiamaniere agi, por ke ŝi aŭ li pli feliĉu, kaj tiuj agoj eble tute ne estas tiuj, kiuj faros nin pli feliĉaj. Eble al ŝi ege plaĉos ricevi florojn, eble ŝi komprenos

tion, kiel diron pri amo, dum al li floroj ne havos specialan signifon, lin floroj lasas tute malvarma, sed tio, kio estos por li elmontranto de vera forta amo, eble estos, ke ŝi diros: "Bone, ne interesas vin iri al la kamparo, kion mi persone tre volus ĉe tiel belaj ĉielo kaj suno, sed pro amo al vi mi konsentos, ke ni restu en la urbo kaj iru al la Esperantolibrejo". Kiu vere amas, tiu tute pensas pri tio, kion fari por ke la alia iĝu pli kontenta.

Komprenu min bone! Tio ne signifas, ke ami necesigas perdi

la proprajn ŝatojn kaj interesojn. Se unu el la du ĉiu-foje faras, kion la alia deziras, sed tiu nur faras laŭ la propra deziro, se li aŭ ŝi neniam pensas, kiel kontentigi la alian, tiam la rilato iras sur malĝusta vojo. Unu iĝas la fortulo, kiu decidas kaj direktas, kaj la alia la malfortulo, kiu ĉiam nur sekvas, kaj ne trovas en si la forton diri, ke tio aŭ tio ne plaĉas, kaj ke estus bone, ke la kunulo aŭ kunulino pensu, ke ne ĉiuj ŝatas la samajn aferojn.

Jes, ami estas arto. Bona artaĵo estas ne nur bela, sed



ankaŭ simpla. Sed produkti ion simplan estas malfacile. Estas pli facile skribi ion malsimplan, nekularan, multvortan, ol eldiri la ideon per kelkaj simplaj vortoj kaj tamen perdigi al ĝi nenion el ĝia intereso por tiu, kiu legos. Tio estas same vera pri letero, kiel pri tuta libro. Simile estas pri la arto ami. Trovi la manieron simple ami estas malfacile. Oni ja devas teni sian tutan estaĵon direktita al unu celo: komuna feliĉo, kun zorgo pri la du.

Se vi renkontis iun, kiu ege plaĉas al vi, kun kiu vi sentas multon komunan, kun kiu kune esti estas granda plezuro, kun kiu vi ŝatas fari samajn aferojn, kaj kiun nur vidi igas vin senti vin samtempe pli granda kaj pli malgranda, pli forta kaj pli malforta, preta senkaŭze ekridi, ridegi aŭ eĉ nur simple rideti kun sento de granda kontento, verŝajne tiun vi amas. Amo estas tiel bela, tiel viv-riĉiga, ke indas zorgi pri ĝi kiel pri eta infano, kiel pri eta kreskaĵo, eta floro. Se vi havas ekstere kreskaĵon, kiu ege plaĉas al vi, kaj kiun vi volas plu havi longe, vi devas pensi: kion mi faru, kiam estos ege malvarme vintre, aŭ se somere estos ege varme kaj ĝi ne ricevos akvon el la ĉielo? Tio signifas, interalie, ke vi devas pensi pri tio, kio venos poste.

Same estas pri am-feliĉo. Se

mi volas longe, plaĉe feliĉi, mi devas tut-tempe pensi pri tio, kiamaniere fari la alian kiel eble plej feliĉa. Por tio, mi devas lerni perdi. Akcepti, ke tio, kio ŝajnas al mi ege grava nun, eble fakte ne estas tiom grava, eble mi povas tion ellasi, eble tiu ellaso estas la pago, kiun mi devas pagi nun, por post tempo ricevi la feliĉon, kiun la alia donos al mi danke, ĉar dank' al mi li aŭ ŝi estos pli feliĉa. Kaj mi devas konsenti malhavi portempan plezuron por la multe pli granda plezuro poste kune longtempe feliĉi. Se oni celas daŭran, longtempan feliĉon, oni zorgu pri tio, kiel feliĉigi ne nur sin, sed ankaŭ la alian kaj ne nur la alian, sed ankaŭ sin. Kune.

Ĉe iuj personoj, tio aperas tute natura. Ili dekomence sentis, ke oni ne povas vere feliĉi sola, ke feliĉo necesigas rilaton. La rilato kun unu speciala persono, la persono, kiun oni amas, pli gravas ol la aliaj rilatoj. Ekzistas ankaŭ personoj, por kiuj la ideo, ke oni ne povas feliĉi sola, tute ne estas io klare kaj facile pensebla. Ili amas, ne este, sed have. Ili kredas, ke eblas ricevi amon kiel oni ricevas donaĵon aŭ, eble eĉ pli ĝuste, kiel oni havigas al si ion, kiam oni tion prenas, sen zorgi pri tio, ĉu tio estas io de iu alia. Ili kaptas sinkontentigon per uzo de la alia,

kaj ilin ne tre interesas, ĉu tiu vere akceptas tiun manieron agi. Estas homoj – same viroj, kiel virinoj, eble tamen pli ofte viroj – kiuj agas rilate al la kunulo aŭ kunulino kiel al servisto, kiu devus ĉiam esti preta fari tion, kion ili deziras, kaj kies ŝatoj, timoj, esperoj, plezuroj aŭ deziroj ne indas je atento. Ne tiel oni feliĉas, ĉar al neniuj el ni plaĉas, ke la

alia uzu nin nur por siaj propraj celoj. Ĉar tio ne plaĉas, la persono, kun kiu oni agas prene, kapte, uze, iĝas malkontenta. Se la afero pli kaj pli ofte okazos, la malkontenteco plu kaj plu daŭros. Kaj ne eblas feliĉi, kiam oni vivas kun homo senfine malkontenta.

Tio ŝajnas tiel memkomprenebla, ke, unua-vide, aperas senutile tion diri. Sed en la vivo, tiu forgeso de la rajtoj de la kunvivul(in)o estas io ege ofta. Tial mi permesas al mi rediri la aferon: se vi volas sekvi la regulojn de la arto feliĉi, atentu la deziraĵojn, la timojn, la esperojn, la plezurojn de la kunvivul(in)o. Multaj homoj ne komprenis, ke ni ĉiuj malsamas. Tial, ekzemple, ili malakceptas, ke la aliaj timas ion, kio por ili estas tute ne timiga. Kaj ili ridas pri la timo de la alia. Per tio, ili igas la alian senti sin malsupera, ili sentigas al tiu, ke simila reago estas nekomprenebla, ke timi tiun etan aferon estas io, kio devus ne ekzisti, ĉar ordinara homoj tion ne timas. “Li ne akceptas min tia, kia mi estas”, – la knabino tiam pensas. “Ŝi volus, ke mi estu alia ol mi estas”, – diras al si la knabo. Tio ne estas la vojo feliĉen. Timo ne estas io, kio aperas pro tio, ke oni tion decidis. Jen oni sentas ĝin, kaj neniam helpas scii, ke en tia situacio la aliaj ne timas, nek kredi, ke oni devus ne timi. Se oni timas, oni timas. Oni rimarkas la timon, oni ne elektis ĝin. Kaj ĉar ni estas malsamaj, tio, kio timigas vin, ne estas la samo, kiel tio, kio timigas min. Kion mi diris pri timo, tio estas vera pri multegaj aferoj, ekzemple intereso, ŝatoj, kontentigiloj, povo facile kompreni tion, sed ne tion alian. Se mankas akcepto de tiuj malsamaĵoj, la miskomprenoj kaj la disaj volo povas esti tiel fortaj, ke jen aperas milito inter li kaj ŝi. Kaj neniam milito estas feliĉiga.

Ami necesigas, ke vi pensu pri mi kiel pri iu malsama, kiu rajtas esti malsama ol vi en siaj plezuroj, timoj, esperoj, intereso ktp., kaj kies malsamecojn vi rigardu gravaj. Sed ĝi necesigas ankaŭ, ke mi pensu pri vi la samon: vi estas malsama, kaj vi rajtas, ke mi rigardu grava tion, kio vi estas, kion vi deziras aŭ

celas, kio interesas vin, eĉ se tio ŝajnas al mi nekomprenebla. La arto feliĉi enhavas la arton ami. La arto ami enhavas la arton akcepti, kaj akcepti, ke ne ĉio homa al ni kompreneblas. La arto ami grandparte estas ankaŭ la povo pensi pri la maltuja tempo, pri tio, kiel la aferoj estos poste, post longe, se mi nun agos tiel aŭ tiel ĉi. Indas rigardi, kiel oni agas, kaj sin demandi, ĉu la sekvo estos pli da feliĉo por la du, aŭ ĉu estos pli da malkontento ĉe unu. Pli bone, ol prepari al mi manke de pripensado vivon sen feliĉo, ne fari tuj ion, kion mi ege forte deziras, sed kio havos aĉajn sekvojn por la rilato, kaj atendi, ĝis la deziro estos for* aŭ ĝis mi rimarkos, ke, finfine, ne estas tiel grave ne fari la aferon.

Eble plej malfacile en la arto ami estas akcepti malfeliĉon, kiam oni povas fari nenion por forigi ĝin. Se oni amas, oni deziras, ke la alia feliĉu. Sed malfeliĉoj aperas, kaj oni ne povas per simpla decido malaperigi ilin. Necesas do vivi kun la malfeliĉa kunulo aŭ kunulino, tiel longe, kiel tiu bezonos, ĝis iom post iom li aŭ ŝi rekomencos feliĉi, aŭ almenaŭ eliros el la ega malfeliĉeco. Plej helpas en tiaj okazoj, se oni sukcesas sentigi al la kunulo, ke oni estas apude, kune, kun la sama zorgo, eĉ se tio, kio tuŝas unu, ne same povas tuŝi la alian. Kaj ankaŭ se la malfeliĉulo estas mi, tio estas vera. Se mia kunulo sukcesas sentigi al mi, ke mia malfeliĉo tuŝas ŝin aŭ lin, mi pli rapide eliros el la malfeliĉo. Kunteni en si du sin-kontraŭ-dirajn ideojn – “tion mi deziras” kaj “tion, kion mi deziras, mi ne povas havi, ĉar la vivo estas pli forta ol mi” – estas malfacile, sed necese, se oni volas ame feliĉi.

“Mi scias, ke mi amas vin”, diris franca filozofo Gustave Thibon, “ĉar mi volas, ke vi ne mortu, kaj samtempe mi scias, ke vi mortos”. Pripensindaj vortoj, ĉu ne?

* Se oni ne kontentigas deziron tuj, ĝi komence fariĝas pli kaj pli forta, sed post tempo, se oni sukcesis plu ne jesi al ĝi, ĝi komencas malgrandiĝi ĝis fina foriro (aŭ ĝis posta reapero: povas okazi, ke oni devos rekomenci la aferon plurfoje).



La sinsekvaj ŝtupoj de amo

Claude Piron, Svislando

La komenco

Je la bazo de amo ĉiam estas rilato. Eĉ se oni amas nur sin mem, amo estas rilato. Estas iu, kiu amas, “mi”, kaj iu, kiun tiu amas: “min mem”. Inter ambaŭ – eĉ se “mi” kaj “mem” estas unu sama estaĵo – ekzistas rilato. Mi povas rilati al mi ame, sed ankaŭ sename, eĉ malame, same kiel mi povas rilati al mi estime aŭ malestime. Ke “mi” kaj “mia korpo” okupas la saman lokon, tio ne malhelpas, ke ili havas rilaton inter si.

Komence la celo de la amrilato estas simple pluvivi. Ĵusnaskito amas sian patrinon, ĉar ĝi bezonas ŝin. Diri, ke ĝi amas sian patrinon, estas ne tute ĝuste. Ĝi ne scias, ke tiu estaĵo, kiu havigas al ĝi la lakton, estas “iu”, estas aparta estaĵo, sed ĝi bezonas la rilaton, kaj tiu kontentigas ĝin aŭ ne laŭ tio, ĉu la lakto venas ĝustatempe aŭ ne. Tiu kontentigo en rilato estas la bazo de amo.

Sed tio estas nur unu aspekto de tiuaĝa amo: la fakto esti apud la fonto de la kontenteco estas per si mem plezuro, korpa kaj anima. La korpa estas la plezuro tuŝi, kaj la plezuro senti, ke iu tuŝas nin. Sed ankaŭ kiam tuŝo ne okazas, aperas ama plezuro: la plezuro senti, ke la alia ekzistas, preta doni ion bezonatan. Eĉ kuŝante sola en aparta ĉambro, infaneto povas kontenti, ĉar ĝi iel scias, ke tiu soleco estas nur portempa. La soleca situacio do estas sendanĝera, kaj oni emas ami iun, kiu kreas senton de sendanĝereco. Kontentigi niajn bezonojn, tuŝi nin en plaĉa maniero, dissendi senton de sendanĝereco, tio estas atenti nin, tio estas sciigi, eĉ se senparole: “vi estas grava por mi,” alivorte: “mi amas vin”.

Kelkajn jarojn poste

Infano kvinjara, sepjara, dekjara povas ami kun forto, kiun plenkreskuloj ne imagas. Knabeto povas enamiĝi al instruistino, aŭ knabino al

samklasano, kaj travivi sentojn, kiuj igas la koron bati kun la sama mikso de plezuro, timo kaj doloro, kiel ĉe homo tridekjara, kiu spertis renkonton, pro kiu la tuta vivo ŝanĝiĝas, kaj kiu pensas: tio estas AMO kun granda A. Plenkreskuloj ĝenerale ne kredas je la seriozeco de tiuj infanaj amoj. Rezulte ili ofte fuŝe reagas, ekzemple mokante la infanon, kio povas esti por la etulo kaŭzo de granda sufero, fojfoje kun sekvoj por la tuta vivo. Tia mokado ja povas fuŝi la senton pri memcerteco, tiom helpa en la vivo. Forteco de amo havas neniun rilaton kun aĝo. Ekzistas personoj, en kiuj la plej vigla amo de ilia tuta vivo disvolviĝis, kiam ili estis ok- aŭ naŭjaruloj.

La tempo de korpa ŝanĝiĝo

Kiam la korpo transiras de infana formo al plenkreska, amo kompreneble ŝanĝiĝas, ĉar aperas nova aspekto: sekso. Knabinoj malestimis knabojn, stultajn ĝenulojn emajn nur batali kaj montri al la aliaj, kiom ili pli fortas ol ĉiuj. Nun kun batanta koro ili mire turnas la okulojn al tiuj viriĝantoj kaj malkovras belecon, kiun ili antaŭe ne vidis. Kaj knaboj, por kiuj inoj estis neinteresaj estuloj kun nekompreneblaj gustoj kaj reagoj, nun havas pri ilia beleco neforigeblajn pensojn kaj malfacile supereblajn tuŝdezirojn, kiuj kaŭzas en la korpo strangan bestajn ĝu-bezonojn, neniam spertitajn antaŭe.

Jam tiuaĝe komenciĝas sindemandoj, kiuj reaperos dum la plenkreska vivo. Ĉu mi amas? Ĉu mi amas la personon, aŭ la plezuron diri al mi, ke mi amas? Ĉu mi amas por kapti, plezurigi min, kiel en la tempo, kiam mi estis freŝe naskita du-monatulo kaj mia tuta amo iris al la patrino laktujo? Aŭ ĉu mi amas kun koro donema, ne plu memcentra, kvazaŭ kun emo krei ion tute novan, rilaton, kiu plenigu min, sed ankaŭ same bele plenigu ŝin aŭ lin? Rilaton, kiu estos tiel plena



Facila

je amo, ke ĝi disradios lumon kaj belon senĉese ĉirkaŭ ni?

Enamiĝo

Tiam povas okazi, ke ni renkontas personon, kaj tiu renkonto estas kvazaŭ nin tuŝis fulmo. Subite, tiu persono iĝas estaĵo tute aparta, kvazaŭ kreita nur por ni, kaj fariĝas nia tuta mondo tiel, ke ni vidas ĉion tra ties okuloj. Estas en tiu renkonto promeso pri konstanta ega ĝojo, kiu sentiĝas transmonda, io trans la ordinara travivaĵoj, trans la normala vivo sur-tera, kvazaŭ ĝi igus nin salti de sur ĉi tiu mondo al supera nivelo, ĉiela, bela, ĝuiga, fakte dieca. Ni tiam sentas nian animon pli larĝa, pli vasta, kaj ni emas ride ti al ĉiuj nekonatoj, nur por kundividi kun ili tiun korplenigan senton, ĉar ĝi estas tro granda por nur eta ni, kaj nia koro ŝajne volas krei al ĉiuj: “Vidu, kiel mi feliĉas!”, “Mi renkontis ŝin!”, “Mi ekkonis lin!”

Tio povas esti la komenco de feliĉega vivo, se tiu sento direktiĝas al iu, kiu havas personecon facile kunordigeblan kun la nia. Kaj tio okazas pli ofte, ol oni

ĝenerale kredas. Kompreneble, aperos malfacilaĵoj, kaj disopiniado. Sed la volo kune resti kaj feliĉi estas tiel forta, ke ĉiu post ĉiu akra diskuto aŭ bataleto revenas paco en la paro. Tia amo daŭras tutvive kaj beligas la tutan ekziston.

Sed la fakto, ke la enamiĝa sento ekfajris en nia koro, tute ne signifas, ke nia personeco povos vere feliĉe kunvivi kun tiu, kiu nevole vekis ĝin. Ĝi povas esti imagaĵo kun pure seksa bazo, aŭ revo devenanta de tio, ke ni surmetas sur la vizaĝon, la parolojn, la ir- aŭ agmanieron de la renkontita homo bildon el la imagkrea parto de nia animo. Anstataŭ vidi la estulon, kia li aŭ ŝi vere estas, ni vidas imagitan personon kvazaŭ tiritan el filmo aŭ romano. La elreviĝo, kiu venos poste, pro kontakto kun la vera esto de la alia, povas kaŭzi ege suferigan ŝiron en la koro, kiu faligas en profundan malĝojon, pro kiu la tuta vivo dum iu daŭro iĝas senkolora, sengusta, sen iu ajn plaĉaodoro.

Oni ankaŭ povas enamiĝi, ne



al bildo, sed al iu vidata, kia li aŭ ŝi estas, sed kiu ne respondas al nia amo. Ni fajras, sed la alia restas malvarma. Tio estas ege doloriga, sed kion fari? Igi la alian ami nin kelkfoje eblas, sed plej ofte ne. En amaj sentoj agas multo nekomprenebla, kaj do neregebla, antaŭ kio ni povas nur klini nin. Fojfoje la alia tamen reagis, se ne per amo, almenaŭ per amikiĝo, kaj tiu poste povas evolui al vera amo. Sed se nia amo restas tute senresponda, aŭ se la situacio estas tia, ke la alia, kvankam sente respondema, praktike tamen ne povas aranĝi la aferojn por ke la amrilato povu disvolviĝi, ĝi ne povos vivi. Tiam necesas lerni akcepti ĝian morton. Ne facila faro, sed ĝi aldonas multon al nia vivsperto, kaj per tio grandigas la animon.

La ecoj de vera amo

Amo kapabla longtempe daŭri feliĉige ĉiam enhavas kvin ecojn.

Unue, oni deziras *esti kune*. La simplan fakton de kuna ĉeesto oni sentas io altvalora, samtempe ege serioza kaj tamen povanta veki emon ridi, ridi iom infanece, senkaŭze, pro simpla ĝojo vivi kaj proksimi unu al la alia. Stranga okazaĵo tiam ofte rimarkeblas. Oni vidas belecon en la alia eĉ komprenante, ke la plimulto ne vidas ĝin. Ĝi ja ne estas vizaĝa aŭ korpa. Ĝi estas io alia, iom simila al lumo, kiun elradias la rideto, la okuloj, la tuta esprimo. Amrigardo ne

estas priskribebla. Sed ĝi gravas. Homoj, kiuj neniam ricevis amrigardon dum sia infaneco – da tiaj ekzistas pli ol oni kutime opinias – havas malpli facilan vivon ol la aliaj (sed la devo superi la malfacilaĵojn kun tiu baza manko povas fari, ke ili kreas por si fortan personecon).

Due, amo enhavas *deziron koni*. Oni dezirus scii ĉion pri la alia. Se la persono, kiu plaĉas al vi, ne serioze interesas vin, vi ne troviĝas sur la vojo al vera amo. Sed koni homon estas malfacile. Personeco estas tiom pli riĉa ol ni kredas unuavide! Tiu estas aspekto de la arto ami, en kiu nur malrapide, nur iom post iom oni povas sukcesi. Plene koni homon ja estas neeble, sed progresi en la konado sufiĉas. Kaj estas io feliĉiga en la fakto ne tute koni, kaj do ĉiam malkovri en la alia ion novan, pri kio ni ekmiras.

Trie, plenkreskula amo – kontraste kun infaneca, kiu estas kapta – necesigas volon lasi la alian libera kaj ne malbonfari al li aŭ ŝi. La sento, pro kiu oni tiel agas, havas nomon eksteran al la facillingva vortlisto: *respekto*. Ekzemploj de *nerespekto* helpas vin kompreni, kio ĝi estas. Se vi estas laca, nepre bezonas dormi, kuŝas sur via lito, kaj mi sonigas diskon, kies tro forte brua muziko malebligas vian endormiĝon, mi ne respektas vian rajton ripozi. Se vi prunte donis al mi libron, kaj mi skribas sur ĝi, mi ne respektas

vian libron. Se vi diris al mi sekreton, petante min diri ĝin al neniuj, kaj mi disrakontas ĝin, mi ne respektas vian sekreton.

Mi konas edzon, kiu foje diris al sia edzino: “Ni transloĝiĝos. Mi jam subskribis la paperojn por alpreno de la nova loĝejo”. Kaj ili antaŭe eĉ ne diskutis pri ebla transloĝiĝo! Ŝi eĉ ankoraŭ ne vidis la novan loĝejon, kiam ŝi unuafoje sekvis lin tien. Tiel agi estas malrespekti. Respekto estas nemalhavinda parto de amo. Tiu viro certe ne vere amis sian edzinon. Ne mirige do, ke post nelonge ili disiĝis.

Respekti, tio estas ankaŭ rilati al la alia kiel al memstara persono, kiu havas proprajn volojn, gustojn, interesojn, kiujn oni akceptas tiaj, kiaj ili estas. Se sporto ne interesas vin, dum via kunulo aŭ kunulino ĝin treege ŝatas, kaj vi pro tio malestimas ŝin aŭ lin, tio signifas, ke vi ne akceptas, ke aliulaj gustoj povas diferencii de la viaj. Tio estas malrespekto. Kompreneble, ne temas pri tio, ke vi alprenu la gustojn de la alia, nur, ke vi akceptu, ke gustoj malsamas, kaj ke vi pensu pri tiu diferenco, kiam vi kune decidis ion.

Ni vidis, ke tiu, kiu amas, deziras koni la amatan personon, kaj do normale pri tiu scivolos. Sed povas esti batalo inter la bezono koni kaj la bezono respekti. Kiam oni respektas, oni akceptas, ke parto de la vivo de la alia estas nekonata al ni, oni ne devigas la alian diri al ni ĉion. Oni lasas al la alia tion, kion en kelkaj kulturoj oni nomas ties “sekreta ĝardeno”. Kompreneble en tio estas danĝero, ke la alia uzos tiun eblon por fari aferojn, kiuj kontentigas lin aŭ ŝin, sed estas aĉaj por la alia. Tial paroj funkcias pli bone, se, kvankam ambaŭ sentas sin liberaj rilate la alian, ili kapablas malkaŝe paroli unu al la alia pri tio, kio gravas por ili kaj pri tio, kio povus suferigi la alian, kaj kion tamen ili sentas fortan emon fari. Ankaŭ diri al la alia, kion tiu nepre bezonas scii por senti sin bone en la rilato, estas aspekto de la respekto.

Kvare, vera amo enhavas *zorgemon*. La vorton “zorgi” Plena **Ilustrita** Vortaro difinas, kiel “serioze direkti sian atenton kaj agadon al ies bono”. Ne

eblas pli ĝuste esprimi tiun eron de amo. Por ami, ne sufiĉas deziri esti kune, ne sufiĉas deziri koni, ne sufiĉas respekti, krome necesas atenti la bonon de la alia. Sed tio estas malfacila. Kiel scii, kio estas la bono de iu alia? Ofte gepatroj diras al filo aŭ filino: “Tion mi malpermesas, ke vi faru. Mi decidis tion *por via bono*”. Kelkfoje ili pravas, kaj efektive la juna homo, sekvante la gepatron, ne falos en kaptulon, kiu poste estus fonto de ĉiama bedaŭro. Sed aliffoje la gepatroj imagas la bonon de la ido tute alia ol ĝi estas. Kiom da gejunuloj estis puŝitaj en okupon, kiun ili ege malŝatis kaj en kiu ili malfeliĉis, ĝis – se ili havis la kuraĝon – ili decidis liberigi sin el la gepatra konsilo kaj iri la propran vojon al tio, kio estis por ili pli ĝusta maniero vivi!

Kvine, amo, en sia plej alta disvolviĝa ŝtupo, igas la du gekunulojn preni sur sin *komunajn respondecojn*. Plej ordinara objekto de tia kuna respondeco estas infanoj. Sed la kunrespondeco povas direktiĝi al ĉiaspecaj celoj. Ĝi povas rilati al la loĝejo, al la okupo, al socia aŭ politika agado, aŭ al aliaj kampoj. Estas malfacile imagi, kiel du anoj de unu paro, kiuj profunde amas unu la alian, povus havi neniun komunan respondecon. Eble tio estas la afero, kiu plej ligas unu al la alia la du, kiuj amas.

Ĉu la vorto “ligas” ĝenas vin? Tamen en amo estas ligo. Se la amo estas altnivela, bonkvalita, la ligo estas forta, ne facile rompebla, tamen tute ne streĉa. Oni estas ligita, sed libera. Tiu ŝajna kontraŭdiro estas unu ekzemplo de la multaj sin-kontraŭdiraj aspektoj de amo: esti libera, sed ligita; voli funde koni, sed respekti la sekretojn; kune esti sed akcepti, ke nekunaj momentoj povas esti necesaj; kune respondi pri iuj aferoj, sed lasi la alian sola respondeculo pri aliaj...

Multo estas neklarigebla en koraj aferoj. Amo povas fari nian koron vasta, sed nia menso, rilate al ĝi, ĉiam restas eta, eta, eta.

Ilustri – enmeti bildojn por pliklarigi aŭ plibeligi tekston.

Poligamio? Kial ne?!

Manfred Westermayer,
Germanio

Poligamio estas geedziĝo kun pli ol unu partnero. Poliginio signifas, ke unu viro havas plurajn edzinojn, kaj polian-drio, inverse, – ke unu virino havas plurajn edzojn samtempe. Poligamio estas kontraŭleĝa en plej multaj socioj.

Ĉar mi estas viro, mi skribas ĉefe el vira vidpunkto; eble virino verkus artikolon el sia vidpunkto. En la modernaj socioj pli kaj pli ofte geedzoj divorcas pro diversaj kialoj, kaj poste unu aŭ ambaŭ denove geedziĝas kun aliaj partneroj. Tio estas akceptata en la plej multaj socioj. La kaŭzoj por divorco estas diversaj, verŝajne, plej ofte, ĉar viro trovis alian virinon (aŭ estis trovita de alia virino?), kaj sekve la edzino ne akceptas tion kaj postulas divorcon, aparte kiam la alia virino ricevas bebon de ŝia edzo. Tia disiĝo kaj finfine la divorco ĉiam kaŭzas animajn vundojn, des pli kiam la paro jam havas infanojn. Por la infanoj la plej malfacila situacio estas perdi unu el la gepatroj pro divorco, aparte kiam la rilato inter la divorcintoj malboniĝas.

Kial tio okazas? Kial viroj ne estas tiom fidelaj? Ili ja dum la enamiĝa tempo kaj okaze de la geedziĝo eble ĵuris eternan fidelecon – aparte se okazis religia geedziĝceremonio. Laŭ biolo-

gia vidpunkto, viroj kaj virinoj havas malsamajn strategiojn por zorgi pri la estonteco. Virino, kiu ja investis multon de sia propra korpo por naski bebon, zorgas por kiel eble plej stabilaj kondiĉoj por kreskigi la infanon, havi helpon, kiam ŝi maljuniĝas, ne konsciante pri la pludonado de sia genetika heredaĵo. Viroj havas similajn celojn, sed, krome, ili preferas distribui sian genetikan heredaĵon – eble por malgrandigi la riskon de perdo kaj por certigi la kvaliton.

En kelkaj socioj – afrikaj, arabaj, (antaŭe – Red.) mormonaj* – estas laŭleĝa eblo havi plurajn edzinojn samtempe (kutime malpli ol kvar). Gravan rolon tie ludas socialaj kaŭzoj: ekzemple kiam edzino perdis la edzon (dum militemaj tempoj tio okazis plej ofte), la frato kutime devis zorgi pri la bofratino, kaj tiel ŝi fariĝis lia alia edzino. La regulo ĉiam postulas, ke la edzo

same bone zorgu pri ĉiuj edzinoj. Ankaŭ en Afriko ekzistas poligamiaj socioj, kie ĉiu edzino havas propran dometon kaj estas memstara. La araba versio estas haremo, kiam la edzinoj kune loĝas, sed plene dependas de la edzo.

Ekzistas ankaŭ alimaniera socio, kie virinoj posedas la terenon (matriarka socio) kaj pro tio povas havi plurajn edzojn. Ekzemple, mi spektis televidon, ke virino en Ladako (Himalajo) samtempe edzigis du fratojn, ĉar la alia frato ne havis vivobazon vivante sola.

Laŭ la moderna pensado kaj liberigo de sociaj limoj, tiel ke ankaŭ samseksemuloj rajtas vivi kune kaj geedziĝi en kelkaj landoj, eble sekvas la ideo, ke ankaŭ poligamio povas esti akceptebla. Kompreneble, ĝi devas baziĝi sur la plene libera akceptado de ĉiuj kunpartneroj, kaj sur la reguloj, kiuj certigas samajn devojn kaj rajtojn, kaj donas al la infanoj la certecon esti en unu familio.

Kiamaniere la kunvivado povus funkcii? Ĉiuj partneroj povus loĝi en unu granda loĝejo aŭ domo kun komunaj kuirejoj kaj loĝĉambroj, sed propraj dormoĉambroj por ĉiuj; aŭ la virinoj loĝu en apartaj loĝejoj. Ĉiukaze ili devus loĝi tiom proksime, ke la infanoj povu ĝui la ĉeeston en granda familio. Kiam – kiom longe – la viro kune loĝas kun unu el la edzinoj jam estas detalo, kiun la partneroj devas decidi.


Mi legis libron de sociologo Frank Joachim**, kiu – iomete ŝerce – diskutis la ideon pri

okpersonaj geedziĝoj, do, de granda familio el kvar paroj, kiuj konstante aŭ rotaciantas estas proksimaj partneroj. La ĉefa ideo estis, ke tiamaniere reciproka helpo povas stabiligi la socion. Li ne diskutis samseksan kaj malsamseksan kunvivadon en tia granda familio, kvankam ankaŭ tio estus imagebla.

Certe tia kunvivado devas baziĝi sur libervola decido kaj reciproka respekto de la partneroj, kaj devas esti formale agnoskita de la socio. Hodiaŭ ja eblas klare analizi, kiu estas la biologia patro de infano, kio ja certe interesas ĉiujn infanojn; do, tio ne plu estas problemo. Laŭ la nuna moralo, verŝajne, malmultaj virinoj akceptus poligamion, sed preferus divorci. Tamen, se ekzistus la leĝa eblo, ĝi donus plurajn avantaĝojn kaj al la familio, kaj al la socio.

* mormono – ano de religia komunumo, fondita en 1830 de Jozefo Smith en Usono, predikanta pri Jesuo, sed bazita sur nova revelacio (N.PIV); plena nomo – Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj. Kvankam en la frua tempo poligamio en mormona socio estis praktikata, en 1890 la eklezio malpermesis poligamion kaj ekskomunikas ĉiujn, kiuj praktikas ĝin – sed ankaŭ nun iuj sektoj de mormonoj praktikas poligamion – Red.
** Frank Joachim, “Die 8er Ehe, Variationen ueber die Monogamie”, Kabel-Verlag, 1993.

Ĉu vi havas opinion pri tiu ĉi aŭ aliaj artikoloj de tiu ĉi numero? Skribu vian opinion, kaj ni kun plezuro aperigos ĝin en unu el la sekvaj numeroj!



Mormonoj defendantaj la rajton je poligamio

Ribelo de artefaritaj floroj



Saliko, Finnlando

Estas ie lando, kie la vintro regas preskaŭ tutjare kaj suferigas la homojn per frosto, malhelo kaj neĝo. Tial la loĝantoj konstruis por si grandegan subvitran ĝardencentron, kie ili povas pasigi siajn liberajn horojn kvazaŭ en bela parko.

En la ĝardencentro troviĝas diversaj forcejoj, ĉiu kun sia temperaturo, lumo kaj humideco. En la Rozejo kreskas nur rozoj, kiujn la vizitantoj rajtas admiri tra vitra vando, sed ili ne rajtas eniri tiun sanktejon de bonaj odoroj kaj ravaj koloroj. En la aliaj kreskejoj floras aliaj floroj: krizantemoj, tulipoj, amarilidoj, hiacintoj, narcisoj, primuloj, diantoj kaj aliaj. En novembro kaj decembro, ĝuste kiam la tagoj estas plej mallongaj kaj krepuskaj, la atenton kaptas blankaj aŭ rozkoloraj jul-arboj super la florbedoj. Ili estas plenplenaj je graciaj floroj, kiuj kvazaŭ ŝprucas laŭlonge de la verdaj branĉoj, kaj ĉiu floro ĉarmas. Gravaj estas ankaŭ la senfloraj plantoj en siaj argilaj aŭ plastaj potoj, ili serpente grimpas, rigide staras aŭ ĉarme pendas. Ili forigas la malvarmon kaj sopiron el la koroj de la vizitantoj, kiuj povas ankaŭ ripozi kaj manĝi frandaĵojn en la eleganta kafejo de la ĝardencentro, kie sur ĉiu tablo staras florumo kaj bombonujeto. Infanoj tie ofte elektas glaciaĵon en bela vitra bovlo kun beroj kaj fruktopecoj kaj kuketon.

En la koro de la ĝardencentro, inter arbejoj el sudaj landoj, situas kaĝego kun du blankaj papagoj, kiujn la infanoj de la viz-

itantoj treege ŝatas. Ofte ŝajnas, ke la birdoj nur dormetas, sed kaŝe ili palpebrumas al la infanoj kaj en sia sekreta lingvo ili interŝanĝas tiklajn rimarkojn pri la uloj ekster la kaĝo. Tamen oni ne povas nei, ke ili ankaŭ songas pri la ĝangalo, de kie oni ilin perforte forprenis antaŭ dek jaroj. Nun ili estas jam maljunaj, kaj la danĝeroj de la ĝangalo eble estus troaj por ili; en la kaĝo ili estas sekuraj kaj ĉiuj admiras ilin. Ili ankaŭ havas sufiĉe por manĝi.

Proksime al la papagoj lirlas fontano, kaj la sonoj de la akvo plaĉas al ĉies oreloj. Subakve videblas ruĝaj lumvezikoj, kvazaŭ vulkaneto tie elspatus iom da fajro kaj fumo. Ĉirkaŭe kreskas verdaj muskoj kaj aliaj molaj plantoj, kiuj bonfartas en humida ombro. En pli luma loko pli fore oni trovas orkideojn, kies interesajn korolojn ĉiuj vizitantoj ŝatas pririgardi kaj flari. Ili estas eĉ pli multekostaj ol la rozoj, kaj tion la orkideoj bone scias kaj pri tio ili estas fieraj.

Tamen kelkaj klientoj diris, ke la floroj estas tro multekostaj kaj tro rapide velkas. Ili deziris ion daŭran, florojn kiuj ne velkas. Ĝuste por tiaj klientoj estis konstruita vendohalo plena je plastaj kaj silkaj ornamplantoj, kiujn oni fabrikis plej eble bone imitante la naturajn. Tie staras blankaj lekantoj, helbluaj miozotoj, densbluaj cejanoj kaj kampanuloj, flavegaj heliantoj, karmezinaj fukcioj kun ĉarma blanka subjupeto – fakte, ĉiaj artefaritaj floroj kaj plantoj sen odoro kaj vivo. La plastaj rozoj opinias sin pli valoraj ol la vundeblaj vivaj rozoj de la Rozejo, ĉar ili scias, ke ili senŝanĝe same aspektos de

sezono al sezono, de jaro al jaro.

En unu aprila tago la ĝardencentron hazarde enflugis malgranda birdo. Ĝi ne povis kompreni, kie ĝi estis. Ege maltrankvila, ĝi flugadis inter la artefaritaj plantoj, jen ĝi sidiĝis sur tigon, jen ripozis sub folio, sed nenie ĝi trovis semojn, insektojn aŭ vermojn. Fine ĝi, jam preskaŭ en ŝoko, envenis la centran parton de Verdlando kaj iom trinkis el la fontano por trankviligi sin (kvankam ĝi timis la lumvezikojn, ĝi nepre devis sensoifigi sin). Poste ĝi rimarkis la dormetantajn papagojn kaj demandis ilin, kie ĝi do estas kaj kial la plantoj en la vendohalo estas tiel nenature malmolaj, senodoraj kaj strangaj. “Ili ne vivas”, – respondis la papagoj, – “Ili estas faritaj de homoj en fabriko.” Kaj ili rakontis ĉion pri la tuta ĝardencentro. Ju pli la birdeto eksciis, des pli ĝi eksopiris pri sia arbaro, pri la nuboj super la vitraj tegmentoj. La papagoj diris al ĝi, kie en la tegmento situas malfermaj klapetoj, kaj finfine ĝi sukcesis elflugi. Finfine en la blua ĉielo, sen vandoj kaj obstakloj, ĝi sentis sin libera kaj ĝoja, kvankam estis malvarme kaj ĝi rimarkis, ke falko gvatas ĝin. Rapidege ĝi kaŝiĝis en la plej densa arbaro.

En alia tago la vendohalon de la artefaritaj plantoj enflugis du abeloj. Unue ili ĝojis, ĉar ĉie ili vidis allogajn korolojn, sed baldaŭ ili elreviĝis, ĉar la belaj floroj enhavis nek nektaron nek polenon. Krome, kelkaj el ili nenature malbonodoris. La abeloj plendis kaj riproĉis la florojn, sed kiam ili aŭdis ke tiuj estas homfaritaj nenaturaĵoj, ili ekkompatis ilin. La vivo de tiaj floroj ja estas teda

kaj senfrukta. La abeloj decidis rakonti al ili pri la naturo ekstere. Ili rakontis pri la karesaj sunradioj, pri refreŝiga roso, pri pluvo kaj tondro, pri la sinsekvo de sezonoj. Ĉio tio sonis tiel ekscite, ke la artefaritaj plantoj preskaŭ ploris, ĉar ili komprenis, ke al ili mankas multego kaj ke ilia vivo estas sencela kaj vana. Vera vivo ĉiam ŝanĝiĝas, disvolviĝas, kaj ĝuste tio faras ĝin vivinda.

Antaŭ la sunsubiro la abeloj forflugis al siaj florejoj kaj abelujo, kaj la pordoj de la ĝardencentro estis ŝlositaj. Nur la ĝardenlaboristoj restis por akvumi kaj sarki, por fekundigi kaj tondi kaj por ĉion bele ordigi post la vendoplena tago. Sed ĉe la artefaritaj floroj neniuj laboris; ili ja ne bezonis prizorgadon. Ili sentis sin solecaj kaj forgesitaj. En la Rozejo ŝvelis novaj burĝonoj. La artefaritaj floroj ne povis forgesi, kion ili aŭdis de la abeloj. Ili perdis sian memfidon. Se eblus, ili klinus sian kapon kaj hontus.

En la sekva tago la ĝardencentron vizitis Magiisto. La artefaritaj floroj bone memoris lin, li ja vizitis la centron ĉiujrintempe. La vintrojn li pasigis ĉe Mediteraneo, sed la sennoktajn somermonatojn de Nordio li ŝatis tiom, ke li ĉiam revenis en sian vilaon en majo. Poste li kutimis inviti la najbarojn en sian domon kaj distris ilin per novaj programeroj antaŭ abunda kaj franda noktomanĝo. La reveno de la Magiisto en la vilaon ĉiujrintempe estis evento tre grava por liaj najbaroj.

Post la butikumado la Magiisto iris ripozi en la kafejon kaj mendis grandan tason da ĉokolado kun kukoj. Poste li ankoraŭ mendis ovolikvoron, kiun li gustumis kaj kirlis en la buŝo. Por li tio estis granda ĝuo. De sia tablo li povis vidi preskaŭ ĉiujn kreskejojn, sed plej bone li vidis la halon de la silkaj kaj plastaj floroj. Nun li sentis ian nekutiman ekscitiĝon, malĝojon kaj emon alproksimiĝi al tiuj plantoj. Li elprenis el sia poŝo sian trian orelon, ŝaltis ĝin kaj tuj aŭdis, pri kio interflustris la floroj. Ili petegis, ke li helpu ilin eskapi de la ĝardencen-

tro, kie ili nur enuis kaj al neniuj utilis. Ili rakontis al li, kion ili aŭdis de la birdoj kaj la abeloj, kaj ili demandis, ĉu tio estis vera. “Jes, tio estas vera,” – diris la Magiisto en sian trian orelon, kiun per butonpremo li povis transformi en elsendilon. “Sed tio estas ankaŭ danĝera,” – li aldonis. La floroj demandis, ĉu la Magiisto povus sorĉe transformi ilin en verajn florojn kaj lasi ilin pasiĝi almenaŭ unu semajnon en la naturo ekster la ĝardencentro.

La Magiisto, kiu mem oftege vojaĝis kaj kiu konis la ĝojojn kaj malĝojojn de la mondo, kompatis la plantojn, sed li devis averti ilin, ke se li helpus al ili eskapi, li tamen ne povus helpi al ili reveni. Ili enradikiĝos kaj neniam plu povos ŝirmi sin kontraŭ la vetero. En aŭtuno ili devos malaperi kiel ĉiuj aliaj floroj en Nordio. Ĉu ili ne bedaŭros kaj ne sopiros pri la varma vendohalo? La floroj opiniis, ke ne gravas; ili deziregis nur vivi veran vivon ekstere. “Ni deziras aŭdi la susuradon de la vento, ni soifas la roson kaj pluvon, ni volas senti la abelojn kaj burdojn rampi inter niaj petaloj,” – suspiris la floroj de la vendohalo, – “Bonvolu helpi al ni eskapi! Tio estas nia ribelo kontraŭ nenatura juneco.”

En la sekva mateno la laboristoj revenantaj en la ĝardencentron rimarkis, ke ĉe la pordo kreskas tropeoloj, kiujn ili neniam antaŭe rimarkis, kaj ankaŭ en la herbejo staras kuriozaj plantoj, kiuj fakte ne devus kreski tie, sed ili aspektas tre ĉarme. Kiam ili rigardis en la vendohalon de la artefaritaj plantoj ili konsterniĝis. Ili vidis nur renversitajn korbojn kaj ujojn sen plantoj. Ili ne povis kredi, ke iu kliento povus aĉeti ĉiujn plantojn. La maljunaj blankaj papagoj provis sciigi ilin pri la ribelo de la plastaj kaj silkaj floroj, sed ili nur demandis sin, kial la papagoj estas tiel kriemaj kaj maltrankvilaj. Ĉu la ĝardencentron nokte eniris ŝtelistoj? Unu el la laboristoj baldaŭ frapis la pordon de la oficejo de la ĉefĝardenisto kaj sciigis lin pri la situacio. La ĉefo volis tuj vidi la vendohalon propraokule: ĝi aspektis ĝuste tiel kiel diris la laboristoj. Poste li tuj iris foliumi siajn katalogojn, ĉar li sciis, ke li devas rapide mendi novajn artefaritajn plantojn, ĉar povas veni klientoj, ekzemple alergiuloj, kiuj nepre bezonas tiajn.

Promenantoj en la apuda parko tiutage trovis plantojn, kiujn ili neniam antaŭe vidis tie. En la herbejo bluis cejanoj kaj inter la arbustoj aperis karmezinaj fuksioj. Infanoj en la kamparo trovis liliojn kaj rozojn, bovinisto trovis etan palmon en la paŝtejo, kaj ĉiuj demandis sin, ĉu la klimato subite plivarmiĝis tiel, ke nun ĝermas kaj kreskas semoj kaj bulboj, kiujn kunportis turistoj el foraj landoj. Oni telefonis al la redakcio de la loka gazeto, kaj la redaktoro venis foti kaj intervjui la homojn kiuj trovis la ekzotajn plantojn. La novaĵo estis videbla ankaŭ tele-



vide. Pri tio oni parolis dum du tagoj, sed post unu semajno la afero interesis nenium. Oni neniam eksciis, ke la Magiisto helpis al la artefaritaj floroj ribeli kontraŭ eterna juneco kaj transformis ilin en verajn vivantajn plantojn.

La plantoj kaj floroj ege ĝuis sian ŝanĝiĝon. Ili sentis ke al ili kreskis radikoj, kiuj povis ensorbi akvon sed ankaŭ vundiĝi kontraŭ ŝtonoj. Tio feliĉigis ilin kvankam ankaŭ dolorigis. Ili sentis papiliojn tuŝeti iliajn stamenojn kaj burdojn kaj abelojn grimpi al ilia pistilaro. Ho, kiel tio tiklis ilin! Ili volis ridegi, sed ili povis nur ŝvingi siajn korolojn en varmeta vento. Ili aŭdis pepadojn de birdetoj, rukuladon de kolomboj kaj kriojn de korvoj. Vespere ili sentis, ke ili mem bonodoras. Plej gravis por ili, ke neniuj tago similis al la antaŭa.

La somero finiĝis kaj noktoj fariĝis malhelaj kaj malvarmaj. Tiam kelkaj el la antaŭaj plastofloroj eksopiris pri la ŝirmo de la ĝardencentro, kiu radiis kiel giganta lanterno en la foro. Okazis tamen tiel, ke neniuj el ili povis elradikiĝi. Iliaj petaloj forfalas, la tigoj sekiĝis, flaviĝis kaj falis la folioj. La plejparto de la plantoj tamen ankaŭ nun ĝojis. Ili aŭdis siajn semojn tinti en la sekiĝintaj kapsuloj kaj semujoj. Ili vidis kelkajn semojn ekflugi. Birdoj alvenis kaj kaptis semojn en la aero aŭ enbekigis ilin de sur la grundo. La plantoj ne malĝojis, ili ja havis tiom multe da semoj! Ili ŝatis la birdetojn. Venis ankaŭ tiu, kiu unue rakontis al ili pri la mondo ekster la ĝardencentro. Ĝi baldaŭ flugos suden, ĉar ĝi ne povus elteni vintron.

Ankaŭ la Magiisto, antaŭ ol flugi al Mediteraneo, venis adiaŭi la plantojn, kiujn li printempe sorĉis. Li konsolis ilin, ke ili vivis ne vane. El la radikoj kaj semoj rekreskos floroj. Post ok aŭ naŭ monatoj venos nova varma sezono, lumo kaj pluvo. La vera vivo eterne daŭros, kaj ĉiam alternos ĝojo kaj malĝojo, dormo kaj maldormo. Al la palmeto en la paŝtejo li tamen devis diri, ke ĝi ne eltenos la nordan vintron, kaj ĝi respondis, ke ĝi tamen kontentas pri la semajnoj, kiam ĝi vere vivis.

En la sekva nokto ekblovis glacia vento, kaj neĝoflokoj ŝirme kovris ĉiujn kreskaĵojn.





El la taglibro

Dmitrij Cibulevskij, Ukrainio

Scivolemo ofte alportas al la homo malagrablaĵojn, eĉ danĝeron. Sed malgraŭ tio, kutime oni riskas, strebas ekscii ion novan por si. Tiel oni malkovras diversajn naturajn leĝojn, aperas gravaj eltrovoj... Ankaŭ mi estas ege scivolema. Foje preterirante ian forbrulintan konstruaĵon, mi tien eniris por simple rigardi, kio okazis tie, kio restis. Kaj inter la malpuraĵoj mi trovis ial sufiĉe bone konserviĝintan lernejanan maldikan kajeron, nur kies finaj paĝoj suferis pro la fajro. Neniu povas diveni, kiu estis la aŭtoro de tiuj skribaĵoj, en kiu instituto studis la aŭtoro. Pro tio mi riskas publikigi la skribitajn notojn, kiuj entenas sufiĉe intimajn detalojn... Jen kio estis en ĝi.

London, la 3-an de septembro

Mi estas studentino. Por mi tio estas grava evento en la vivo. Eble pro tio mi ekdeziris skribi pri mia studenta vivo notojn en tiel nomatan taglibron. Certe estos nur iaj eĉ ne ĉiutagaj notoj pri la plej gravaj okazintaĵoj.

Hodiaŭ estis la unua tago de mia lernado en la instituto. Malgraŭ la lekcioj, ĉiuj gestudentoj plejparte rigardis unu al la alia, strebante iom konatiĝi. Ja ni devos kune studi kvin lon-

gajn jarojn. Ni ĉiuj venis el diversaj lernejoj, eĉ aliurbanoj multas. Kompreneble, ankaŭ la niveloj de niaj scioj estas diversaj. Iu pli profunde regas la studobjekton, iu estas preskaŭ analfabeta. Ankaŭ laŭaspekte ni estas diversaj. Urbanoj diferencas de vilaĝanoj; ne per la vestaĵoj – lastatempe ĉiuj jam posedas modernajn vestojn, niaj bazaroj funkcias bone... Kaj la karakteroj... Certe tio plej gravas en la interrilatoj.

Vendredon, la 7-an de septembro

La unua semajno en la instituto pasis. La lecionoj tute ne similas tiujn en la lernejo. Instruistoj lekcias aŭtomate, ne atentante, ĉu ni sukcesas ĉion enkapigi, aŭ bezonatas pli malrapida prezento de la materialo.

Ofte ni devas ŝanĝi aŭditoriojn. Sed la paŭzoj ne longe daŭras. Ni eĉ ne ĉiam sukcesas manĝeti – malgraŭ tio ke kafejoj multas, ili estas preskaŭ en ĉiu etaĝo. Ankaŭ du manĝejoj konstante funkcias. La instituto estas grandega konstruaĵo. En ĝi lernas eble tri-kvar mil studentoj. Inoj pli multas, ĉar la estonta profesio “instruisto” allogas inojn unuavice.

En nia grupo el 30 studentoj estas nur ses junuloj. Do, se la instituton oni nomas “la instituto de fianĉinoj”, tio eĉ pli taŭgas por nia grupo. Mi jam rimarkis, ke ĉiuj ses junuloj

estas jam “distribuitaj” inter niaj studentinoj. Mi persone ne “partoprenis” la distribuadon, eĉ ne interesiĝis pri la knaboj, des pli tiuj, kiuj estas en nia grupo, tute ne meritas esti “distribuitaj”, kompreneble laŭ mia persona opinio...

Sabaton, la 8-an de septembro

Hodiaŭ mi ne havis lekciojn. Mi decidis daŭrigi la hieraŭan priskribon. Jen do. Temis pri la junuloj.

En aŭditorioj mi sidas kutime ne en la unuaj vicoj kaj ne en la lastaj. Ie meze. Apudas iom diketa bone vestita samaĝulino, loĝanta relative proksime al mi kaj vizitinta, kiel mi eksciis, najbaran lernejon. Ni sukcesis jam konatiĝi, iom ekplaĉi unu al la alia kaj emas kune prepari la hejmtaskojn.

Ankaŭ ŝi ne interesiĝas pri la junuloj. Ŝi jam havis ne tre bonan sperton. Malgraŭ la samaĝeco, ŝi sukcesis jam edziniĝi kaj... divorci. La eksedzo estis ia donĵuano, celanta nur, evidente, fari iajn “rekordojn” pri siaspecaj “venkoj”.

Rigardinte al niaj junuloj, mia novkonatino esprimis la opinion pri ili per unu vorto: “Fi!” Sed jam de la tria tago ŝi atente ekrigardis al nia instruisto pri historio.

- Kion vi pensas, – demandis mi. – Li ja pliaĝas pli ol duoble!
- En la personaj rilatoj gravas

ne la aĝo, – respondis ŝi.

Poste mi rimarkis, ke al nia instruisto pri literaturo inklinas multaj junulinoj de nia grupo, kurso kaj de la tuta instituto. Eble li meritas tion?

London, la 15-an de oktobro

Pli ol monaton mi nenion notis en la libreto. La lecionoj pasis ordinaraj, sen iaj esceptoj – profesoroj prelegis siajn studobjektojn, oftis seminarioj, dum kiuj ni prezentadis niajn sciojn... Ankoraŭ nenion mi notis pri niaj instruistoj, kiuj konstante vizitas nian grupon kaj strebas doni ian novan materialon, enkapigi al ni ion interesan de sia vidpunkto, kaj kontroladas niajn sciojn. Fakte tiu esprimo “strebas doni...” ne estas ĝusta – certe ili prezentas ion vere novan kaj interesan. Sed ĉu ni ĉiam estas pretaj tion “preni”?

Komence de la oktobro estas festata unu profesia festo, nome la Tago de Instruisto. Kutime, oni solene gratulas siajn instruistojn, enmanigante ordinaraj florojn. Studentoj ankaŭ de nia grupo decidis fari la samon. Ni decidis inter niaj gestudentoj, kiu kiun gratulos. Ĉiuj ses knaboj estis plene laborigitaj – instruistinoj multas, kaj certe estus pli bone, se ilin gratulus niaj knaboj... La studentinoj same ne restis “sen laboro” – ja en nia grupo ankaŭ instruistoj lekcias, fakte ili pli multnombri, ol instruistinoj...

Kaj jen min trafis la loto gratuli ĝuste la instruiston pri literaturo. Komence mi volis proponi plenumi tiun taskon al mia najbarino, sed pli poste mi decidis tamen lasi tion por mi. Kaj ĉio pasis tre bone. Eĉ versojn mi citis bele...

Ĉiuj niaj instruistoj havas sian kromnomon, algluiĝintan jam antaŭ longa tempo ĉefe pro iuj karakteraj trajtoj, ekstera aspekto, iu maniero instrui aŭ ŝatataj esprimoj dum la instruado. “Dikulino”, “Barbulo”, “Aŭtomato”, “Okulvitrulo” – jen estas nur kelkaj kromnomoj de niaj instruistoj. Interese estas ankaŭ, eĉ iom strange, ke ĉefe instruas al ni viroj, sed ne virinoj, kiel mi jam indikis pli frue.

En “la instituto de fianĉinoj”... Plejparte tio estas mezaĝaj kaj jam sufiĉe aĝaj personoj, multaj el kiuj havas jam ian sciencan gradon – kandidato aŭ doktoro de iuj sciencoj. Sed estas kelkaj relative junaj. Mi rimarkis, ke nek la aĝo, nek la scienca grado influas la kvaliton de la instruado. Multaj tamen prezentas la materialon, interesigante la studentojn, donas iajn faktojn kaj nuancojn, kiujn ne eblas trovi en lernoliteraturo.

Sabaton, la 20-an de oktobro

Pasis ankoraŭ unu semajno. Ĉi tie mi volus daŭrigi la priskribon de niaj instruistoj. Komence de la semajno mi jam notis, ke niaj instruistoj malsame prezentas la materialon. Al kelkaj el ili oni kun plezuro venadas por aŭskulti iliajn prelegojn, ĉar vere ili faras la rakontojn kun tioma allogo, ke ni, la studentoj, sidas “kun malfermitaj buŝoj”, strebante enkapigi laŭeble pli multon. Sed al kelkaj oni venas preskaŭ kontraŭvole, nur por ne ricevi punojn pro la nevizitado de la lecionoj.

Nia instruisto pri literaturo, Nikolaj Petroviĉ – interalie tio estas ĝuste la instruisto, kiun mi gratulis okaze de lia profesia festo – ne tiom juna (eble li havas jam pli ol 40 jarojn), alta, sportaspekta persono, ŝajne apartenas nek al tiuj, kiuj rakontas interesege, nek al tiuj, kiuj prezentas materialon pli malbone, ol ĝi estas priskribita en la lernolibroj.

Kompreneble, tio al mi ŝajnis nur dekomence.

Lia monotona voĉo dum la unuaj minutoj de la leciono tuj indiferentigis studentojn al liaj lecionoj. Sed tiel estis nur en la komencaj minutoj de la leciono. Poste la situacio plene ŝanĝiĝadis. Li ĉiam rakontadis tiom interese, tiom alloge, ke fakte ĉiuj studentoj kun granda plezuro kaj atento aŭskultis lin. Ankaŭ seminariojn li gvidis profesie.

Hieraŭ li donis al ni la taskon verki referaĵon pri iu el verkistoj kun proksimuma titolo “Vivo kaj verkoj de ...”. Ĉiuj rajtis memstare elekti por si la

temon, alivorte elekti verkiston, kies vivon ili volus priskribi. Mi refoje dankis miajn gepatrojn, precipe la patron pro tio, ke ili alkitimigis min multon legi kaj legi atente. Krome, en la deka klaso de la lernejo ni jam havis taskon prepari referaĵon, uzante plurajn fontojn, kio multe helpis al mi nun. Unuvorte oni instruis jam en la lernejo scipovi uzi literaturo. Mi elektis por mi la temon “Vladimir Kiriloviĉ Malik, lia vivo kaj verkoj”. Tiu verkisto (lia vera nomo estas Siĉenko, li estas kievano kaj ĉefe verkis pri historiaj eventoj en Ukrainio) al mi tre plaĉis. Pli ĝuste, al mi tre plaĉis liaj verkoj. Sed estas malfacile trovi iujn sciindaĵojn pri lia vivo – mankis literaturo. Sed mi decidis persiste labori – mi tion scipovis – kaj prepari bonan referaĵon.

Vendredon, la 16-an de novembro

Hodiaŭ mi fordonis al la instruisto mian referaĵon, pri kiu, laŭ mia opinio, mi sukcesis. Tiu “lerneja trejnado”, kiel ni ĝin nomis inter si, multe helpis al mi en la laboro. La referaĵo estis ampleksa, multpaĝa, havanta plurajn citaĵojn el la verkoj de la aŭtoro. Sed kion diros la instruisto?

Vendredon, la 23-an de novembro

Hodiaŭ por mi estis vera festo. Hodiaŭ nia Nikolaj Petroviĉ anoncis la rezultojn. Kiom kompatindaj estas tiuj instruistoj, al kiuj baldaŭ apartenos ankaŭ mi – dum nelonga periodo ili devas kontroli ĉion, kion preparas la studentoj aŭ lernantoj. Bone, se inter tiuj estas “normalaj” personoj, preparantaj kvalitajn laborojn. Sed plejparte la laboroj estas aĉaj. Kaj la instruisto devas ĉion ĉi legi... Al mi vere estis tre agrable, ke mia nomo estis menciita kiel la nomo de studento, preparinta la plej bonan referaĵon.

- Nia ĉefa tasko estas instrui al vi, kiel necesas labori kun literaturo, uzante plurajn fontojn, helpmaterialon kaj certe pli multe legi librojn, legi ilin profunde, komprenante, kion la

aŭtoro volis diri... – tiel komencis sian parolon Nikolaj Petroviĉ. – Sed vi devas legi ne nur la beletran literaturo. La verkoj de kritikistoj same estas legindaj kaj eĉ legendaj...

- Mi ĝojas, – daŭrigis li, – ke inter niaj novaj studentoj estas tiuj, kiuj profunde interesiĝas pri literaturo, ŝatas legi kaj scipovas labori kun pluraj fontoj. Jen estas vere laŭdinda laboro, kies aŭtoro uzis diversajn fontojn, malgraŭ tio ke la elektita temo de la referaĵo estis sufiĉe komplika...

Dum kelka tempo li daŭre laŭdis mian referaĵon, kio al mi estis agrable. Mi sentis, ke mi vere preparis kvalitan referaĵon, eble eĉ pli, sed aŭskulti laŭdajn vortojn pri si estas agrable afero...

Poste, survoje hejmen, mi daŭre pensis pri la pasinta tago kaj komprenis, ke tiu instruisto pri literaturo, Nikolaj Petroviĉ ne plu estas por mi nura instruisto. Mi pli kaj pli pensas pri li, pri lia instruado, pri lia konduto dum la lecionoj, pri liaj kutimaj gestoj kaj ŝatataj esprimoj... Eble ne vane multaj niaj studentoj ne estas al li indiferentaj?

Ĉu mi enamiĝis?..

Sabaton, la 15-an de decembro

Pasis ankoraŭ preskaŭ tuta monato. La tagoj similis unu la alian. Miaj samgrupoj komencis prepariĝi por la renkonto de la Nova Jaro. Ĉe ni, en nia lando, tiu festo ial estas escepte ĉarma, kaj ĉiuj homoj tre ŝatas ĝin. Certe estas tia tavolo, por kiuj ajna festo estas preteksto por ne labori, ne lerni, simple pasigi tempon, ludante kaj dancante. Ĉi-foje ankaŭ mi decidis iom ripozi kaj partopreni la komunan festenon.

Fakte, ne tiom granda grupo decidis komune renkonti la Novjaron, nur eble deko da personoj – pli multis, certe, la knabinoj.

Preskaŭ lastmomente estis decidite, ke ni invitu ankaŭ du instruistoj. Inter la invititoj estis Nikolaj Petroviĉ. Kaj mia koro perdis la trankvilon – ja la etoso dum la festo estos ne la instituta. Ni dancos, ŝercos, drinkos...

La knaboj sendube jam faris siajn elektojn, kun kiu ili dancos kaj kiun emos kisi... Sen tio ja ne povos esti.

Ankaŭ la knabinoj provis anticipi “ŝpari” por si eventualan kavaliron. Fakte nur unu paro estis netuŝebla – ili jam havis ŝajne profundan senton kaj eĉ temis pri eventuala baldaŭa edziĝa festo. Sed ĉiuj ceteraj...

Ankaŭ ĉi-foje mi ne enmiksiĝis en tiujn distribuojn. Mi emis nure ripozi, sed ne strebis al la amindumado.


Dimanĉon, la 6-an de januaro

La festo estis sukcesa. Ni ĉiuj vane estis maltrankvilaj – kaj knaboj kaj knabinoj estis egalkvantaj. Feliĉe, neniu el nia kompanio dum la vesperonokto ebriiĝis, kio oftas kutime dum similaj aranĝoj. Mi entute ne ŝatas ebriulojn, des pli se ili estas en la sama kompanio. Per tute aliaj okuloj mi komencis rigardi al unu el niaj knaboj. Li vere estis tre klera, konis multajn anekdotojn, kiujn sukcesis trafe rakontadi. El la invititaj instruistoj estis nur Nikolaj Petroviĉ. Iu el la studentoj diris al mi, ke li estas solulo. En lia aĝo... Eble io okazis al li? Ja laŭ la aspekto li estas brava viro...

Ni multe dancis. Li scipovas tre elegante danci kaj ne nur malnovajn, kiel opinias nuntempa junularo, malmodernajn dancojn – tangon, valson... – sed ankaŭ la nuntempajn. Ankaŭ tiujn li scipovas danci, bone sentante muzikan ritmon... Unuvorte, mi ricevis veran plezuron de tiu dancado.

Kaj la paroloj... Malgraŭ la festo, ni multe parolis pri la lecionoj, pri la institutaj aferoj. Vere, oni ne vane diras, ke similaj aranĝoj donas la eblon tre bone konatiĝi kun ajna persono. Ŝajnas, ke mi eksciis pri Nikolaj Petroviĉ multon. Malgraŭ tio ke li parolis pri si nenion.

(daŭrigota)



Paŭlo Moĵajev, Ukrainio

Supernova. Disko kun 13 titoloj kaj muzikvideo. Vinilkosmo, Donneville, 2006. 54 min., tekstolibreto.

Tiu ĉi albumo estas la frukto de trijara kunlaboro inter tri brazilanoj: Rogener Pavinski (voĉo kaj baso), Alexandre Mancini (gitaro) kaj Roĝer Borĝes (konata ankaŭ kiel DJ

Supernova ne vere superas

Roger, kiu priumis drumojn kaj sintezilojn). La albumon konsistigas 13 kantoj kaj – jen surprizo! – vere profesie farita, eĉ se senartifika, muzikvideo (muzik-filmeto) spektebla per komputilo, verŝajne la unua profesia muzikvideo en Esperanto. Tamen, krom la muzikvideon, la albumo proponas al plimulto de la publiko preskaŭ nenion elstaran.

Unue, la speco mem de la muziko – sufiĉe peza roko kun iom da simfoniaj elementoj, tamen, iel senorde enplektitaj en la rokan kanvason – eble ne estas tro populara eĉ inter la junularo. Due, ĉiuj kantoj estas tre monotonaj, ege similaj unu al la alia; la melodieco preskaŭ mankas, estas preskaŭ neeble rekanti la kant-motivon. Trie, la

tekstoj de la albumo estas ege simplaj, por ne diri primitivaj. Malgraŭ tio, ke temas jen pri la amo, jen pri misoj de la moderna socio, jen pri alvokoj al la monda solidaro, la plejparto de la tekstoj prezentas nur aron de malfacile kunligeblaj frazoj; mi persone havis la impreson, ke la kantoj sonus neniel malpli bone, se ĉiuj tekstoj estus simpla “la-la-la”, tiom pli, ke la prononcado de la kantisto tute ne ĉiam estas klara. En ĉiuj kantoj la sentekstaj partoj estas sufiĉe longaj, kun multaj ripetoj, kio vicfoje substrekas la poezian subnivelecon de la albumo. Nu, eble por rok-muziko la tekstoj ja ne estas tre gravaj? Ĉu pli gravas la bela voĉo de la plenumanto? Sed ankaŭ la kapabloj de la ĉefkan-

tisto estas tute ne admirindaj; aldone, multaj lokoj, kie aŭdeblas kelkaj voĉoj, sonas muzike mise.

Ĉu do io pozitiva? Ja jes. La sonoj estas tre bonkvalitaj, la tekstolibreto plaĉa kaj la tekstoj preskaŭ senriproĉaj lingve. Ankaŭ la muzikvideo por la kanto “Pasio en katen’” (interalie, spektebla ĉe <<http://Farbskatol.net>>) per sia nura ĉeesto faras la albumon atentinda. Tamen ĉe fina pritakso mi persone emas konkludi, ke *Supernova* ne estis vere supera: en la mondo estas verŝajne miloj da bandoj, prezentantaj simil-specan muzikon multe pli bone.

Tamen por Esperanto-muziko la albumo estas certe evento. Se vi ŝatas pezan rokon – konatiĝu pli proksime, eble la disko estos interesa por vi.

Anonce

Odesa Somero – ĉe l’mar’ kaj rivero

Por naturemuloj kaj naturamantoj (sed ne nudistoj!); organizas Odesa Junulara Esperanto-klubo “Verdaĵo”

En julio-aŭgusto 2007, kun speciala turista priservo por individuoj aŭ malgrandaj grupoj (2-3 personoj). Ekskursoj al netuŝitaj naturlokoj de suda Ukrainio: Rivero Dnestro – 2-3-taga ekskurso, noktumo en tendo aŭ kampa domo; birdoj, akvaj lilioj ktp. Laguno Kujalnik, “Ukrainia Morta Maro”, saliteco pli ol 100 g/l, kuracaj ŝlimoj, riĉa naturo – 1-taga ekskurso. Vilaĝo Vilko, “Ukrainia Venecio”, kun kanaloj anstataŭ stratoj; specifa malnovortodoksa diservo – 1-taga ekskurso. Dum prinaturaj ekskursoj eblas speciala ĉiĉeronado de profesia ornitologo.

En Odeso: ekskurso tra la centro de la bela urbo; ekskurso al famaj odesaj katakomboj – subteraj labirintaj galerioj; ekskursoj al odesaj muzeoj kaj zoologia ĝardeno. Ekskurso al bestoĝardeno de la urbo Nikolajev, la plej impona kaj granda en Ukrainio – 1-taga. Ekskurso al 2,5-jarmila fortikaĵo Tira, kun restaĵoj de skita tombejo, greka, ĝenova, turka urboj – 1-taga. La prezo por 10-taga turismado (loĝado en Odeso, kun ekskursoj) estas 300 eŭroj de unu persono (pagoj surloke). Pliaj detaloj kaj interkonsentoj: <verda99@mail.ru>, <verda2004@rambler.ru>.

Rat-man en Esperanto!

© Leo Ortolani, 2006

Estas tradukita en Esperanton de Daniele Binaghi

Pli da informoj pri la projekto RoMEo estas ĉe <www.pecorElettriche.it/esperanto/RoMEo/default.asp>



Respondoj al la enigmo sur p. 15

7	4	6	5	2	3	8	9	1
8	1	2	9	6	7	4	3	5
9	5	3	1	4	8	7	2	6
5	9	8	7	3	2	1	6	4
2	3	1	6	5	4	9	7	8
6	7	4	8	9	1	2	5	3
4	2	7	3	1	5	6	8	9
1	6	5	2	8	9	3	4	7
3	8	9	4	7	6	5	1	2

9	3	4	8	7	1	2	5	6
8	2	7	5	9	6	3	1	4
1	6	5	3	4	2	9	8	7
7	1	2	4	8	5	6	9	3
6	8	3	9	1	7	4	2	5
4	5	9	6	2	3	1	7	8
3	4	1	2	5	8	7	6	9
2	9	8	7	6	4	5	3	1
5	7	6	1	3	9	8	4	2



Amo, ĉu granda aŭ malgranda vorto?

Guillermo Bes Salazar, Kubo

Laŭ la **silaboj**, ĝi jes ja estas malgranda vorto ĉar ĝi enhavas nur du silabojn kaj tri literojn, sed laŭ la difino de la vorto, ĝi estas granda vorto, ĉar ĝi havas profundan kaj vastan signifon.

Laŭ la Plena Vortaro de Esperanto kun Suplemento, amo signifas:

- **inklino** al iu, ŝati kare iun
- ŝati, volonte uzi aŭ fari ion
- havi, senti, porti amon al iu aŭ io
- kor-inklino, kor-ligiĝo, **simpatio**.

Kiam oni parolas pri amo, multaj personoj ofte ekpensas pri amo inter **gefianĉoj** aŭ amo inter geedzoj, sed ili ne estas la nuraj eblaj amoj en la mondo.

Ekzistas aliaj amoj inter la homoj, amo eblas inter:

- infanoj
- geamikoj
- familianoj (tio estas, inter gepatroj kaj gefiloj, geavoj kaj genepoj, gefratoj, gekuzoj, kaj tiel plu)
- samlandanoj
- kunlaborantoj
- samklasanoj
- ktp.



Ankaŭ eblas havi, senti amon al:

- vivo
- homoj
- lando kaj patrio
- profesio (kariero)
- laboro
- naturo (plantoj kaj bestoj).
- ktp.

Ĉiujare en preskaŭ ĉiuj mondopartoj oni festas la Tagon de la Amo aŭ Tagon de Sankta Valenteno – multaj personoj interŝanĝas kisojn, brakumojn, donacetojn, sed tio plejofte okazas inter personoj, kiuj amas unu la alian kiel paro kaj ne kiel geamikoj, gefratoj, samlandanoj, kunlaborantoj ktp.

Same kiel la vorto “amo” limiĝas ne nur al gefianĉoj kaj geedzoj, ni devas bone atenti pri tio kaj plifortigi la amon inter ĉiuj homoj, inter ĉiuj landoj, plifortigi la amon al patrio, naturo, kaj ĝenerale dis-vastigi kaj planti amon tra la tuta mondo – tiel la pli bona mondo eblos por ĉiuj!

fianĉo – estonta edzo
inklino – emo, ŝato
silabo – sono aŭ songrupo, kiun oni prononcas per unu voĉ-el-laso
simpatio – inklino inter du personoj pro simileco de gustoj, opinioj ktp.

Kotiztabelo de UEA por 2007

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	15	38	95	57	34	190
Aŭstrio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Belgio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Brazilo/eŭro	5	12	29	17	10	58
Britio/pundo	6	16	39	24	15	78
Ĉeĥio/krono	200	490	1220	770	460	2440
Danio/krono	70	170	425	270	160	850
Estonio/eŭro	5	12	31	20	12	62
Finnlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Francio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Germanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Greklando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hispanio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Islando/eŭro	9	23	57	34	20	114
Israelo/eŭro	7	18	45	27	16	90
Italio/eŭro	9	23	57	36	22	114
Japanio/eno	1400	3400	8500	5100	3000	17000
Kanado/dolaro	14	34	86	52	31	172
Malto/eŭro	6	16	39	24	15	78
Nederlando/eŭro	9	23	57	36	22	114
Norvegio/krono	75	190	470	280	170	940
Nov-Zelando/dolaro	224	18	45	112	67	40
Pollando/zloto	20	50	122	76	46	244
Portugalo/eŭro	9	23	57	36	22	114
Rusio/eŭro	5	12	29	17	10	58
Slovakio/krono	230	570	1425	910	550	2850
Svedio/krono	80	210	530	340	200	1060
Svislando/franko	14	36	90	54	32	180
Usono/dolaro	11	27	67	40	24	134
TARIFA A/eŭro	6	16	39	23	14	78
TARIFA B/eŭro	5	12	29	17	10	58
ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio; Kipro kaj Slovenio laŭ Malto; Liĥtenŝtejno laŭ Svislando; Bulgario, Latvio, Litovio kaj Rumanio laŭ Estonio.						
TARIFA A: Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.						
TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.						
MALLONGIGOJ:						
MG – Membro kun Gvidlibro						
MJ – Membro kun Jarlibro						
MJT – MJ malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon <i>KONTAKTO</i> kaj la bultenon <i>TEJO tutmonde</i>)						
MA – Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la revuon <i>Esperanto</i>)						
MA-T – MA malpli ol 30-jara (individua membro de TEJO; ricevas ankaŭ la revuon <i>KONTAKTO</i> kaj la bultenon <i>TEJO tutmonde</i>)						
SA – Simpla abono de revuo <i>Esperanto</i> sen membreco						
Kto – Simpla abono de revuo <i>KONTAKTO</i>						
SZ – Societo Zamenhof (subtena kotizo aldone al membreco)						
PT – Patrono de TEJO: 3-oblo de MJ (ricevas <i>KONTAKTO</i> kaj <i>TEJO Tutmonde</i>)						
DM – Dumviva Membro: 25-oblo de MA (ricevas dumvive la samon kiel MA)						
DMJ – Dumviva Membro kun Jarlibro: 25-oblo de MJ (ricevas dumvive la samon kiel MJ)						
Kiel individuaj membroj de TEJO (MJT aŭ MA-T) por 2006 estos registritaj tiuj individuaj membroj de UEA, kiuj estos malpli ol 30-jaraj la 1an de januaro 2006 (t. e. kiuj naskiĝis en 1976 aŭ poste). Ankaŭ Dumvivaj Membroj samtempe membras en TEJO, dum ili estas malpli ol 30-jaraj.						
Eblas abon ankaŭ al <i>TEJO tutmonde</i> sen membreco en TEJO. La abonprezo estas duono de la MJ-kotizo por la koncerna lando.						
Oni povas pagi pere de la perantoj de UEA, aŭ rekte al UEA per ĝiro al ĝia banka aŭ poŝta konto, per ĉeko aŭ poŝtmandato, aŭ per kreditkarto.						

Ĉu vi serĉas korespondamikon?

Sendu al *Koresponda Servo Mondskala* jenajn detalojn: nomo, adreso, sekso, aĝo, profesio, geedza stato, kiom da korespondantoj vi deziras, en kiuj landoj kaj pri kiuj temoj. Kunsendu 2 internaciajn respondkuponojn, aŭ, se ili ne estas aĉeteblaj en via lando, neuzitan poŝtmarkon. KSM pludonos viajn informojn al alia(j) korespondemulo(j), kiu(j) konformas al viaj deziroj. Vi ricevos rektan respondon. KSM estas servo de UEA.

Skribu: **Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio**

JUNA AMIKO – internacia e-revuo de ILEI por lernejoj kaj komencantoj

- aĝas 30 jarojn kaj aperas 3-foje jare (aprilo, septembro, decembro) sur po 52 plurkoloraj paĝoj kun plenkoloraj kovriloj;
- havas kunlaborantojn el ĉiuj kvin kontinentoj;
- rabato ĝis 50%!

Karakterizas ĝin:

modela stilo kaj **facila lingvaĵo** (1500 vortradikoj sen glosoj), **enhavo tre varia**: rakontoj, fabeloj, raportoj, informoj, interesaĵoj, enigmoj, kvizoj, versaĵoj, ludoj, kantoj, humuro, lingvaj konsiloj, interkultura, kuriozaĵoj, voĉo de legantoj k.a. kun multaj ilustraĵoj.

JUNA AMIKO estas fonto de taŭgaj legaĵoj por komencantoj, fidinda helpilo por E-kursgvidantoj.

Vizitu nian TTT-ejon: <www.junaamiko.inf.hu> aŭ en <www.lernu.net>!

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu patrono de TEJO

Pagante trioblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon; de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- revuon *KONTAKTO*
- bultenon *TEJO Tutmonde* (oficiala organo de TEJO)
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso
- aliajn laŭokazajn servojn kaj publikigaĵojn

Mia lasta vojaĝo en Afganion



Saidnabi (plej dekstre) kun afganaj esperantistoj

Saidnabi Saidilhomzoda, Taĝikio

Oni diras, ke se iu unufoje vizitos Kabulon, li(ŝi) enamigos al tiu urbo por ĉiam. Fakte, nun tiu urbo nenion havas krom detruaĵojn kaj infekciojn, sed tamen la vivstilo, afableco kaj gastamo de afganoj entuziasmigis la korojn. Tamen la ĵus diritaj vortoj rilatas ne ĉiujn afganojn; viziti la landon estas tre danĝere por fremduloj, pro tio estas bone se oni ĉi tie vestos naciajn afganajn vestaĵojn.

Fine de majo mi denove estis invitita viziti la Kabulan Universitaton fare de estimata s-ro Fukuda Tosihiro el Tokio. Forflugante el la Duŝanbea flughaveno kun ioma malfruo mi iom nervozigis, tamen malgraŭ la malfruo s-ro Fukuda renkontis min; la renkontiĝo kun li estis tre agrabla por mi. Sekvamatene ni promenis tra la urbo kaj posttagmeze ni vizitis la Kabulan Universitaton. Ni

volis renkonti estimatan drinon H. B. Gazanfar, sed pro sia sanstato ŝi havis ferion, do ni sukcesis paroli kun ŝi nur telefone. En la universitato ni renkontis la instruistojn de la rusa lingvo kaj inter ili kaj ni okazis ege agrabla diskuto rilate al Esperanto. Ĝuste en tiu universitato mi iam organizis la kurson de Esperanto; estis proponoj ripeti ĝin, do eble la kurso iam okazos denove.


Sekvatage ni ekvojaĝis al Bamijano per aŭto. La vojo estas 8 horojn longa; dum la vojaĝo oni povas vidi belegajn verdajn pejzaĝojn kaj multajn historiajn lokojn, kiuj apartenas al antikvaj pratempoj. Unu el ili estas “Ŝahre Zuha” – la urbo, kiu situas sur monto kaj estas tre antikva, tamen, nun estas danĝere viziti ĝin pro minoj, kiujn lasis taliboj. Oni ĉie povas vidi ruĝ-farbitajn ŝtonojn, kiuj signifas min-danĝeron. Preterveturante la belajn pejzaĝojn oni povas vidi ankaŭ multegajn tombejojn kaj solajn

tombojn, kaj ĉe vido de ili oni povas ekaŭdi en la animo la voĉkriojn de la ĉi-tieaj ŝtonoj, arboj kaj plantoj: “Sufiĉas milito, sufiĉas frat-mortigado, kial vi mortigas unu la aliajn tiel, kiel eĉ bestoj ne faras tion?”. Bedaŭrinde, multaj homoj ne povas aŭdi tiujn kriojn pro surdeco de la animo.

Bamijano estas ege bela historia loko, mi vidis ĉi tie pejzaĝojn, kiujn mia kapo eĉ ne imagis. Tagmanĝante ni vizitis Bamijan Universitaton, kie ni fotiĝis, kaj s-ro Fukuda donacis multajn lernolibrojn al universitata instruisto s-ro

al vi, ke vi estas en iu Montenegra loko, dum la ruĝaj montoj memorigas iun meksikan pejzaĝon kun indianoj, kiujn vi spektis en diversaj filmoj. S-ro Fukuda faris multajn fotojn, ĉiuj fotoj estas multvaloraj por li, li ĉiam uzis/as la esprimon “multekostaj fotoj”. En Band-e Amir estas kvin lagoj kun diversaj nomoj, ni uzis boaton kaj povis vidi kvar el ili, sed la kvinan ni ne esploris pro serpento-danĝero.

Antaŭ la rea vojo al ni okazis ridinda situacio. Pro malvarma vetero s-ro Fukuda aĉetis du sveterojn kaj unu li



Kabulo

Gulomali. Poste ni vizitis historiajn Budho-lokojn. Estis du statuoj de Budho: “Malgranda Budho” kaj “Granda Budho”, kiujn rompis taliboj, kaj nun en tiu loko multas laborantoj de Unesco, kiuj faras la riparlaborojn. Ankaŭ ĉi tie oni povas vidi ruĝajn ŝtonojn, kiuj “diras”: zorgu pri vi mem. Bamijanaj homoj estas laboremaj, simplaj kaj pacamaj. Multaj loĝas proksime al montetoj, kie antaŭe en pratempoj homoj loĝis en kavernoj, tamen bedaŭrinde, ĝis nun oni povas vidi ege mizerajn familiojn, kiuj loĝas en la samaj kavernoj, iom moderniginte ilin.

Post Bemijano ni ekveturis al Band-e Amir laŭ la longa montara vojo. Tamen, kiam vi atingas la lokon, vi forgesas la longecon de la vojo pro belaj, kiujn vi vidas. Ŝajnas

donis al mi. Ni surmetis ilin, promenis, vespermanĝis, fiere fotiĝis kaj sekvamatene ekveturis al Kabulo. Dum la vojo nia ŝoforo informis nin, ke tiuj sveteroj estas porvirinaj, kaj ni ridante demetis ilin. Finfine ni atingis Kabulon, kvankam nian aŭton kelkfoje haltigis policistoj por kontrolo.

Kaj fine venis la adiaŭa momento, kaj post unusemajna vojaĝo ni devis reveni al niaj landoj. Mi estis kaj estas ege danko al s-ro Fukuda pro ĉiuj liaj noblaj klopodoj rilate al afganaj esperantistoj; aparta sincera danko al li – pro lia invito; ja ĉio, kion mi vidis, ĉiuj amikoj, kiujn mi havas tie – ĉio ĉi okazis dank’ al li.

Fotoj: Fukuda Tosihiro, Japanio



Lernejo por rifuĝintoj